



PROLETOJ DE ĈIUJ LANDOJ, UNUIGU!

THE UNIVERSITY OF CHICAGO

VORTOJ DE
PREZIDANTO
MAŬ ZEDONG



FREMDLINGVA ELDONEJO
PEKINO 1967

TRATTATO DI
PREDICANTO
MATEMATICHE


Presita en Ĉina Popola Respubliko



ВСТУП
К ПЕЧАТНИ
МАШИНАМ

Презента en Ĉina Popola Respubliko





張毛之席福

書以毛之席的話

照毛之席的指示

如左

林聲

Studu la verkojn de Prezidanto Maŭ,
aŭskultu liajn instruojn kaj agu laŭ liaj
instrukcioj.

Lin Biaŭ

*Sur la antaŭa paĝo estas faksimilo
de la manskribaĵo de Kamarado
Lin Biaŭ, kaj ĝian tradukon oni
trovu supre.*

ANTAŬPAROLO AL LA DUA ELDONO

Kamarado Maŭ Zedong estas la plej granda marksist-leninisto en la nuna epoko. Kamarado Maŭ Zedong genie, kreive kaj plenamplekse heredis, defendis kaj disvolvis marksism-leninismen, kaj levis ĝin al tute nova stadio.

La penso de Maŭ Zedong estas marksism-leninismo de la epoko, en kiu imperiismo iras al kompleta disfalo, dum socialismo iras al venko en la tuta mondo. La penso de Maŭ Zedong estas potenca ideologia armilo por oponi imperiismon, potenca ideologia armilo por oponi reviziismon kaj dogmismon. La penso de Maŭ Zedong estas la gvidprincipo de ĉiuj laboroj de niaj tuta partio, tuta armeo kaj tuta lando.

Tial, la plej baza tasko de la politik-ideologia laboro de nia partio estas ĉiam alte teni la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, armi la cerbon de la tutlanda popolo per la penso de Maŭ Zedong kaj persiste meti ĝin en komandon en ĉiuj laboroj. La vastaj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj amasoj, la vastaj amasoj de revoluciaj kadroj kaj intelektuloj devas efektive posedi la penson de Maŭ Zedong; ili ĉiuj devas studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti liajn instruojn, agi laŭ liaj instrukcioj kaj esti liaj bonaj batalantoj.

En la lernado de la verkoj de Prezidanto Maŭ, oni devas studi kun demandoj, studi kaj apliki ilin kreive, kombini studon kun apliko, studi unue kion oni urĝe bezonas por rikolti tujajn rezultojn, kaj peni plej energie pri aplikado de ĉio studita. Por efektive posedi la penson de Maŭ Zedong oni devas ripetade studi multajn fundamentajn vidpunktojn de Prezidanto Maŭ, kaj estas plej bone parkere memori,

konstante studi kaj apliki kelkajn devizojn. Sur la ĵurnaloj estas necese, en kombino kun praktiko, konstante publikigi cititajn vortojn de Prezidanto Maŭ, por ke la legantoj povu ilin studi kaj apliki. La sperto de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ fare de la vastaj popolamasoj en la lastaj jaroj pruvis, ke la elekta studo de cititaj vortoj de Prezidanto Maŭ kun demandoj estas bona metodo por studi la penson de Maŭ Zedong, kaj povas facile rikolti tujajn rezultojn.

Por helpi la vastajn popolamasojn pli bone studi la penson de Maŭ Zedong, ni kompilis la nunan libron *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Organizante la studon, diversaj institucioj kaj organizaĵoj devas elekti koncernan enhavon en kombino kun la situacio, taskoj kaj la ideologia stato kaj laborstato de la amasoj.

Nun en nia granda patrio aperas nova epoko en kiu la laboristoj, kamparanoj kaj

soldatoj ekposedas marksism-leninismon, la penson de Maŭ Zedong. La penso de Maŭ Zedong fariĝos neelĉerpebla forto kaj senkompare potenca spirita atombombo, post kiam ĝi estas posedita de la vastaj popolamasoj. La grandkvanta eldono de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* estas rimedo de primara graveco por posedigi la penson de Maŭ Zedong al la vastaj amasoj kaj antaŭenigi la ideologian revoluciigon de nia popolo. Ni esperas ke ĉiuj kamaradoj serioze kaj diligente studos, levos tra la tuta lando novan alttajdon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la verkoj de Prezidanto Maŭ, kaj sub la granda ruĝa standardo de la penso de Maŭ Zedong luktos por konstrui nian landon en grandan socialisman landon kun moderna agrikulturo, moderna industrio, moderna scienco kaj kulturo kaj moderna nacidefendo!

Lin Biaŭ

16 decembro 1966

ENHAVO

I. La Komunista Partio	1
II. Klasoj kaj Klasbatalo	9
III. Socialismo kaj Komunismo	25
IV. La Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo	50
V. Milito kaj Paco	65
VI. Imperiismo kaj Ĉiuj Reakciuloj Estas Paperaj Tigroj	80
VII. Kuraĝi Batali kaj Kuraĝi Venki	90
VIII. Popola Milito	97
IX. Popola Armeo	110
X. Gvido de Partia Komitato	115
XI. La Amasa Linio	130
XII. Politika Laboro	147
XIII. Rilatoj inter Oficiroj kaj Soldatoj	163
XIV. Rilatoj inter la Armeo kaj la Popolo	168

XV.	Tri Vastaj Demokratioj	173
XVI.	Edukado kaj la Trejnado de Trupoj	181
XVII.	Servi al la Popolo	186
XVIII.	Patriotismo kaj Internaciismo	191
XIX.	Revolucia Heroismo	198
XX.	Konstrui Nian Landon Diligente kaj Ŝpareme	204
XXI.	Sin Apogi sur Propraj Fortoj kaj Penege Lukti	213
XXII.	Pensmetodo kaj Labormetodo	223
XXIII.	Enketo kaj Studo	253
XXIV.	Korekto de Eraraj Ideoj	261
XXV.	Unuiĝo	276
XXVI.	Disciplino	279
XXVII.	Kritiko kaj Memkritiko	283
XXVIII.	Komunistoj	294
XXIX.	Kadroj	304
XXX.	Junularo	317
XXXI.	Virinaro	323
XXXII.	Kulturo kaj Arto	329
XXXIII.	Lernado	335

I. LA KOMUNISTA PARTIO

La kerna forto, kiu gvidas nian aferon, estas la Komunista Partio de Ĉinio.

La teoria bazo, kiu orientas nian penson, estas marksism-leninismo.

Inaŭgura parolado en la Unua Sesio de la Unua Tutlanda Kongreso de Popolaj Repraŭzentantoj de la Ĉina Popola Respubliko (15 septembro 1954).

Por revolucii, estas necese havi revolucionan partion. Sen revolucia partio, sen revolucia partio konstruita laŭ la revolucia teorio kaj revolucia stilo de marksism-leninismo, estas ne eble gvidi la laboristan klason kaj

la vastajn popolamasojn venki imperiismon kaj ĝiajn lakeojn.

“Unuiĝu Tutmondaj Revoluciaj Fortoj, Batalu kontraŭ Imperiisma Agresado!” (novembro 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Sen klopodado de la Komunista Partio de Ĉinio, sen ĉinaj kompartianoj kiel la ĉefa subtenilo de la ĉina popolo, ne estas eblaj la sendependiĝo kaj liberiĝo de Ĉinio, nek estas eblaj la industriigo kaj modernigo de agrikulturo en Ĉinio.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La Komunista Partio de Ĉinio estas la gvidkerno de la tuta ĉina popolo. Sen

tia kerno, la socialisma afero ne povas venki.

Parolo je la ĝenerala akcepto al la delegitoj de la Tria Tutlanda Kongreso de la Nov-demokratia Junulara Ligo de Ĉinio (25 majo 1957).

Partio bone disciplinita, armita per la teorio de marksism-leninismo, aplikanta la metodon de memkritiko kaj kunligiganta kun la popolamaso; armeo gvidata de tia partio; unueca fronto de ĉiuj revoluciaj klasoj kaj ĉiuj revoluciaj grupoj sub la gvido de tia partio—jen estas la tri ĉefaj armiloj, per kiuj ni venkas la malamikojn.

“Pri Popol-demokratia Diktaturo”
(30 junio 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ni devas fidi la amasojn, ni devas fidi la Partion—tio estas du fundamentaj

principoj. Se ni dubas tiujn principojn,
ni elfaros nenion.

*Pri la Problemo de Agrikultura
Kooperigo* (31 julio 1955).

La Komunista Partio de Ĉinio armita
per la teorio kaj ideologio de marksism-
leninismo alportis al la ĉina popolo novan
stilon de laboro, stilon, kiu ĉefe estas kom-
biniĝo de teorio kun praktiko, intima inter-
ligiĝo kun la popolamasoj kaj apliko de
memkritiko.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo
1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ
Zedong*, vol. III.

Neniu politika partio, kiu gvidas grandan
revolucionan movadon, povas gajni venkon,
se al ĝi mankas revolucia teorio, historia

scio kaj profunda kompreno pri la praktika movado.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ni iam antaŭe diris, ke la stilĝustiga movado estas “ĝenerala marksisma eduka movado”. Stilĝustigado signifas, ke la tuta Partio lernu marksismon per kritiko kaj memkritiko. Dum la stilĝustiga movado ni certe lernos pli da marksismo.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Estas tre malfacila kaj giganta tasko bonigi la vivkondiĉojn de la centmilionoj da loĝantoj de Ĉinio kaj konstrui nian landon ekonomie kaj kulture postrestintan en landon riĉan, potencon kaj kulture altedisvolvitan. Ni devas konduki stilĝusti-

gardon, nun kaj estonte, kaj senĉese elimi-
ni el ni ĉion eraran ĝuste por tio, ke ni
povu pli kompetente surŝultrigi tiun taskon
kaj pli bone kunlabori kun ĉiuj honestaj
samaspirantoj ekster la Partio, kiuj decideme
dediĉas sin al la reformo.

*Parolado en la Tutlanda Konferenco
de la Komunista Partio de Ĉinio pri
Propaganda Laboro (12 marto 1957).*

Politiko estas la elirpunkto de ĉiuj prak-
tikaj agadoj de revolucia partio kaj sin
manifestas en la procezo kaj fina rezulto
de la agadoj. Ĉiu ajn agado de revolucia
partio estas efektivigo de politiko. Se ĝi
ne efektivigas ĝustan politikon, ĝi do
efektivigas eraran politikon; se ĝi ne efek-
tivigas ian politikon konscie, ĝi do efek-
tivigas ĝin blinde. Tio, kion ni nomas
sperto, estas la procezo kaj fina rezulto de
la efektivigo de politiko. Nur tra la prak-
tiko de la popolo, tio estas, tra sperto, ni

povas konstati, ĉu la politiko estas ĝusta aŭ ne, kaj determini, en kia grado ĝi estas ĝusta aŭ erara. Sed la praktiko de homoj, precipe la praktiko de revolucia partio kaj revoluciaj amasoj, ne povas ne ligiĝi kun tiu aŭ alia politiko. Tial, antaŭ ol efektiviĝi ĉiun agadon, ni devas eksplicite al la partianoj kaj amasoj la politikon, kiun ni difinis laŭ la cirkonstancoj. Alie, la partianoj kaj amasoj apartiĝos de la gvido de nia politiko, agos blinde, kaj efektiviĝos eraran politikon.

“Pri la Politiko Koncerne al Industrio kaj Komercio” (27 februaro 1948), *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, vol. IV.

Nia partio difinis la ĝeneralan linion kaj ĝeneralan politikon de la ĉina revolucio kaj ankaŭ diversajn specifajn liniojn por laboro kaj diversajn specifajn politikojn. Sed, multaj el niaj kamaradoj ofte memoras apartajn specifajn liniojn por laboro kaj

apartajn specifajn politikojn de nia partio, kaj forgesas ĝiajn ĝeneralan linion kaj ĝeneralan politikon. Se ni efektive forgesas la ĝeneralan linion kaj ĝeneralan politikon de nia partio, ni do fariĝos blindaj, neperfektaj kaj nebulkapaj revoluciuloj, kaj, kiam ni efektivigos specifan linion por laboro kaj specifan politikon, ni perdos la orientiĝon kaj ŝanceliĝos jen dekstren jen maldekstren, kaj nia laboro suferos.

“Parolado en Konferenco de Kadroj en la Liberigita Regiono de Ŝanhi kaj Sujjuan” (1 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Politiko kaj taktiko estas la vivo de la Partio; gvidantaj kamaradoj de ĉiuj niveloj devas plene priatenti ilin kaj en neniu okazo ilin neglekti.

“Cirkulero pri la Situacio” (20 marto 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

II. KLASOJ KAJ KLASBATALO

Klasoj batalas, iuj klasoj venkas kaj aliaj malaperas. Tio estas historio, tio estas la historio de civilizacio dum kelkmil jaroj. Interpreti historion laŭ tiu ĉi vidpunkto estas historia materiismo; stari sur la kontraŭa flanko de tiu ĉi vidpunkto estas historia ideismo.

“Forĵetu Iluziojn, Preparigu por Bataloj” (14 aŭgusto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

En klasa socio ĉiu vivas en certa klasa pozicio kaj ĉia penso estas senescepte stampita per la brulmarko de klaso.

“Pri Praktiko” (julio 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La ŝanĝoj en socio rezultas ĉefe el la disvolviĝo de la internaj kontraŭdiroj en la socio, nome, la kontraŭdiro inter la produktaj fortoj kaj la produktaj rilatoj, la kontraŭdiro inter klasoj kaj la kontraŭdiro inter la nova kaj la malnova. La disvolviĝo de tiuj kontraŭdiroj puŝas socion antaŭen kaj antaŭenpuŝas la anstataŭigon de la malnova socio per la nova.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

La kruelaj ekonomia ekspluatado kaj politika subpremado al la kamparanoj fare de la bienula klaso devigis la kamparanojn multfoje ribeli kontraŭ la regado de la bienula klaso. . . Nur tiuj klasbataloj de la kamparanoj, kamparanaj ribeloj kaj kamparanaj militoj estis la vera movforto

de la disvolviĝo de historio en la feŭda socio de Ĉinio.

“La Ĉina Revolucio kaj la Komunisto Partio de Ĉinio” (decembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

En analizo ĝis la fino, nacia batalo estas problemo de klasbatalo. Inter la blankuloj en Usono tiuj, kiuj subpremas nigrulojn, estas nur la reakciaj regantaj rondoj. Ili absolute ne povas reprezenti la laboristojn, kamparanojn, revoluciajn intelektulojn kaj aliajn progresemajn personojn, kiuj konsistigas la plejparton de la blankuloj.

“Deklaro por Subteni la Justan Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Rasa Distingo de la Usona Imperiismo” (8 aŭgusto 1963), *Unuiĝu la Popoloj de la Tuta Mondo por Frakasi la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn*.

La organizado de la popolo dependas de ni. La faligo de la reakciuloj de Ĉinio dependas de la organizado de la popolo fare de ni. Ĉio reakcia ja ne falos, se vi ĝin ne faligas. Tio estas same kiel ĉe balado: kien ne alvenas la balailo, tie la polvo kutime ne foriras per si mem.

“La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito” (13 aŭgusto 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La malamiko ne pereos per si mem. Nek la ĉinaj reakciuloj nek la agresivaj fortoj de la usona imperiismo en Ĉinio fortiriĝos memvole de la scenejo de historio.

“Daŭrigu la Revolucio ĝis la Fino” (30 decembro 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Revolucio ne estas regalo de gastoj per festeno, nek literatura verkado, nek pen-

trado aŭ brodado ; ĝi ne povas esti tiel eleganta, tiel trankvila kaj malrapidema, tiel ĝentila, tiel milda, afabla, ceremonia, sindetena kaj grandanima. Revolucio estas ribelo, perforta agado fare de unu klaso por renversi alian.

“Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan” (marto 1927), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Ĉiang Kajŝek ĉiam klopodas forkapti de la popolo ĉiun colon da potenco kaj depreni ĉiun colon da profito. Kaj ni? Nia politiko estas lin oponi pinton kontraŭ pinto, batali pro ĉiu colo da tero. Ni agas laŭ la maniero de Ĉiang Kajŝek. Li ĉiam klopodas trudi militon al la popolo, li tenas glavon en la maldekstra mano, kaj tenas glavon ankaŭ en la dekstra mano. Kaj ni, laŭ lia maniero, ankaŭ ekprenas glavojn. . . . Nun Ĉiang Kajŝek jam estas

akriganta siajn glavojn, tial ankaŭ ni devas akriigi la niajn.

“La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito” (13 aŭgusto 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Kiuj estas niaj malamikoj? Kiuj estas niaj amikoj? Tio estas demando kun primara graveco por la revolucio. La baza kaŭzo, kial ĉiuj estintaj revoluciaj bataloj en Ĉinio atingis tiel malmulte, estis tio, ke oni ne sukcesis unuiĝi kun la veraj amikoj por ataki la verajn malamikojn. Revolucia partio estas gvidanto de la amasoj, kaj neniu revolucio sukcesas, kiam la revolucia partio erare ilin gvidas en la revolucio. Por garantii, ke nia revolucio ne estos erare gvidata kaj nepre sukcesos, ni ne povas ne atenti pri unuiĝo kun niaj veraj amikoj por ataki niajn verajn malamikojn. Por distingi verajn amikojn de veraj malamikoj, ni ne

povas ne fari ĝeneralan analizon pri la ekonomia pozicio de la diversaj klasoj en la ĉina socio kaj pri ilia respektiva sintenado al la revolucio.

“Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio” (marto 1926), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. I.

Niaj malamikoj estas ĉiuj kiuj estas en ligo kun imperiismo — la militaristoj, burokratoj, kompradora kaj grandbienula klasoj kaj la reakcia sektoro de la intelektuloj de ili dependantaj. La gvida forto de nia revolucio estas la industria proletaro. Ĉiuj duonproletoj kaj etburĝoj estas niaj plej proksimaj amikoj. Rilate al la ŝanccligema mezburĝaro, ĝia dekstra alo povas esti nia malamiko kaj ĝia maldekstra alo nia amiko — sed ni devas esti konstante singardemaj kontraŭ ĝi, por ke ĝi ne kreu konfuzon interne de niaj batalvicoj.

“Analizo de la Klasoj en la Ĉina Socio” (marto 1926), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. I.

Kiu ajn staras en la flanko de la revolucia popolo, estas revoluciulo. Kiu ajn staras en la flanko de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo, estas kontraŭrevoluciulo. Kiu ajn staras en la flanko de la revolucia popolo nur en vortoj sed agas alie, estas revoluciulo en parolo. Kiu ajn staras en la flanko de la revolucia popolo ne nur en parolo sed ankaŭ en agado, estas revoluciulo en la plena senco.

Ferma parolado en la Dua Sesio de la Unua Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsilia Konferenco (23 junio 1950).

Mi opinias, ke, por ni, se persono, partio, armeo aŭ lernejo ne estas oponata de la malamikoj, tio estas nebona, tio sendube signifas, ke ni kunfluas en malpuraĵon kun la malamikoj. Se la malamikoj oponas nin, tio estas bona, tio pravas, ke ni strekis inter ni kaj la malamikoj klaran dividlinion. Se la malamikoj furioze nin oponas kaj pen-

tras nin tute nigraj kaj sen ia ajn virto, tio estas eĉ pli bona kaj ne nur pruvas, ke ni strekis klaran dividlinion inter ni kaj la malamikoj, sed ankaŭ pruvas, ke nia laboro produktis tre bonan rezulton.

Esti Oponata de la Malamikoj Estas Afero Bona sed Ne Malbona (26 majo 1939).

Ni devas subteni ĉion, kion la malamiko oponas, kaj oponi ĉion, kion la malamiko subtenas.

“Interparolo kun Tri Raportistoj de la Centra Novaĝ-agentejo, *Saodang Bao* kaj *Xinmin Bao*” (16 septembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Nia starpunkto estas tiu de la proletaro kaj la popolamasoj. Por membroj de la Komunista Partio, tio ĉi signifas teni sin

sur la starpunkto de la Partio, sur la starpunkto de la spirito kaj politiko de la Partio.

“Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an” (majo 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Post kiam la malamikoj kun armiloj estas ekstermitaj, restas ankoraŭ malamikoj sen armiloj, ili nepre faros vivmortan lukton kontraŭ ni, ni devas nepre ne subtaksi tiujn ĉi malamikojn. Se ni ne tiel elmetas kaj ekkonas la problemon nun, ni faros grandegan eraron.

“Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio” (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La imperiistoj kaj enlandaj reakciuloj certe ne volonte akceptas sian malvenkon kaj ili ankoraŭ faros sian lastan baraktadon. Post paciĝo de la tuta lando, ili ankoraŭ

ĉiamaniere entreprenos sabotadon kaj malordigadon kaj ili ĉiutage kaj ĉiminute intencos restariĝi en Ĉinio. Tio estas neevitebla kaj tute senduba, kaj sub nenia cirkonstanco ni devas malstreĉi nian singardemon.

Inaŭgura parolado en la Unua Plena Sesio de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (21 septembro 1949).

En nia lando, kvankam socialisma transformo estas fundamente plenumita koncerne posedsistemon, kaj la grandaj uraganaj amasaj klasbataloj karakterizaj por la revoluciaj periodoj estas fundamente finitaj, tamen la postrestaĵoj de la renversitaj bienula kaj kompradora klasoj ankoraŭ ekzistas, la burĝaro ankoraŭ ekzistas kaj la remuldo de la etburĝaro nur ĵus komenciĝis. Klasbatalo ankoraŭ ne finiĝis. La klasbatalo inter la proletaro kaj burĝaro, la klasbatalo inter diversaj politikaj fortoj kaj la klas-

batalo en la ideologia kampo inter la proletaro kaj burĝaro estos ankoraŭ longdaŭraj, zigzagaj kaj iam eĉ tre akraj. La proletaro volas transformi la mondon laŭ sia mondkoncepto, kaj ankaŭ la burĝaro volas tion fari laŭ la sia. En tiu rilato la problemo kiu venkos kaj kiu malvenkos inter socialismo kaj kapitalismo ankoraŭ ne estas vere solvita.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

En nia lando la lukto inter socialismo kaj kapitalismo en la ideologia kampo por decidi kiu venkos kaj kiu malvenkos, ankoraŭ bezonas sufiĉe longan tempon por esti fine solvita. La kialo estas, ke la influo de la burĝaro kaj de la intelektuloj devenintaj de la malnova socio ankoraŭ restos longe en nia lando, kaj kiel ilia klasa ideologio ĝi ankoraŭ restos longe en nia lando. Se oni havas ne sufiĉan aŭ tute

nenian konon pri tiu ĉi situacio, oni faros grandegajn erarojn kaj ignoros la necesan ideologian luktadon.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

En nia lando, ankoraŭ longe ekzistos burĝa kaj etburĝa ideologio, antimarksisma ideologio. La socialisma sistemo estas jam fundamente establita en nia lando. Ni jam akiris fundamentajn venkojn en la transformado de la posedsistemo de produktaj rimedoj, sed ni ankoraŭ ne komplete triumfis sur la politika kaj ideologia frontoj. Ankoraŭ ne estas vere solvita la problemo kiu venkos kaj kiu malvenkos ideologie inter la proletaro kaj la burĝaro. Ni ankoraŭ devas fari longdaŭran bataladon kontraŭ la burĝa kaj etburĝa ideologio. Estas erare ne kompreni tion kaj forlasi la ideologian lukton. Ni devas kritiki ĉiajn ideojn erarajn, ĉiajn

herbojn venenajn kaj ĉiajn demonojn kaj diablojn, kaj neniel permesi ilin inundi senbride. Tamen la kritiko devas esti argumentoplena, analiza kaj konvinka, sed ne kruda, burokratisma aŭ metafizika, dogmisma.

*Parolado en la Tutlanda Konferenco
de la Komunista Partio de Ĉinio pri
Propaganda Laboro (12 marto 1957).*

Ambaŭ dogmismo kaj reviziismo iras kontraŭ marksismo. Marksismo nepre devas progresi, disvolviĝi kun la disvolviĝo de la praktiko, kaj ne povas stagni. Se ĝi haltus kaj restus ĉiam stereotipa, ĝi do perdus la vivon. Tamen ĝiaj bazaj principoj ne estas malobserveblaj. Ilin malobservante oni faros erarojn. Trakti marksismon per metafizika vidpunkto kaj ĝin konsideri io ŝtoniĝinta estas dogmismo. Nei la bazajn principojn de marksismo kaj nei ĝian universalan veron estas reviziismo. Reviziismo estas speco de burĝa ideologio.

La reviziistoj ignoras la diferencojn inter socialismo kaj kapitalismo, inter la diktaturo de proletaro kaj la diktaturo de burĝaro. Tio, por kio ili pledas, fakte ne estas socialisma linio, sed linio kapitalisma. En la aktualaj cirkonstancoj, reviziismo estas pli malutila ol dogmismo. Nun unu el niaj gravaj taskoj sur la ideologia fronto estas disvolvi kritikadon kontraŭ reviziismo.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Reviziismo, aŭ dekstrema oportunismo, estas burĝa pensfluo kiu estas pli danĝera ol dogmismo. La reviziistoj, la dekstremaj oportunistoj, havas ankaŭ marksismon sur la lipoj kaj ankaŭ atakas "dogmismon". Sed tio kion ili atakas estas ĝuste la plej fundamentaj elementoj de marksismo. Ili kontraŭstaras aŭ distordas materiismon kaj dialektikon, kontraŭstaras aŭ intencas malfortigi la popol-demokratian diktaturon kaj

la gvidan rolon de la Komunista Partio, kaj kontraŭstaras aŭ intencas malfortigi socialisman transformadon kaj socialisman konstruadon. Post la fundamenta venko de la socialisma revolucio en nia lando, sin trovas en la socio ankoraŭ nombro da personoj kiuj revas pri restarigo de la kapitalisma sistemo. Ili volas batali kontraŭ la laborista klaso sur ĉiuj frontoj, inkluzive la ideologian fronton. Kaj en tiu ĉi lukto, la reviziistoj estas iliaj plej bonaj helpantoj.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

III. SOCIALISMO KAJ KOMUNISMO

Komunismo estas kompleta ideologia sistemo de la proletaro, kaj samtempe nova socia sistemo. Tiu ideologia sistemo kaj tiu socia sistemo diferencas de ĉiu alia ideologia sistemo kaj ĉiu alia socia sistemo, kaj estas la plej kompletaj, plej progresaj, plej revoluciaj kaj plej raciaj en la tuta homa historio. La ideologia sistemo kaj socia sistemo de feŭdismo jam fariĝis objekto trovanta sian lokon nur en la historia muzeo. Parto de la ideologia sistemo kaj socia sistemo de kapitalismo jam eniris la historian muzeon (en Sovetunio), dum aliaj partoj similas al “agonianto mortanta rapide, kiel la suno subiranta malantaŭ la okcidentajn montojn”, kaj baldaŭ eniros la his-

torian muzeon. Nur la ideologia sistemo kaj socia sistemo de komunismo estas plenaj de bela juneco kaj balaas la tutan mondon kun la impeto de lavango kaj forto de fulmotondro.

“Pri Nova Demokratio” (januaro 1940), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La socialisma sistemo finfine anstataŭos la kapitalisman sistemon, tio estas objektiva leĝo sendependa de homa volo. Ne gravas kiel ajn la reakciuloj provas reteni la radon de historio, frue aŭ malfrue revolucio nepre okazos kaj certe triumfos.

Parolado ĉe la Kunveno de la Superega Soveto de Sovetunio por Celebrigi la 40-an Datrevenon de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (6 novembro 1957).

Ni komunistoj neniam kaŝas nian politikan vidpunkton. Nia estonta aŭ maksim-

muma programo celas puŝi Ĉinion antaŭen al socialisma socio kaj komunisma socio, tio estas definitiva kaj senduba. La nomo de nia partio kaj nia marksisma mondkoncepto klare montras tiun estontan, plej altan idealon senlime human kaj senlime belan.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La tuta ĉina revolucia movado gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio estas komplete revolucia movado, ampleksanta la du revoluciajn stadiojn, demokratian kaj socialisman, kiuj estas du revoluciaj procezoj malsamaj en karaktero, kaj la dua procezo povas esti plenumita nur post kiam la unua procezo estas finita. La demokratia revolucio estas la necesa preparo por la socialisma revolucio, kaj la socialisma revolucio estas la neevitebla tendenco de la

demokratia revolucio. La fina celo de ĉiuj komunistoj estas peni per ĉiuj fortoj definitive efektivigi socialisman socion kaj komunisman socion.

“La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio” (decembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. II.

La celo de socialisma revolucio estas por liberigi la produktajn fortojn. La ŝanĝo de individua al socialisma kolektiva posedanteco en agrikulturo kaj metioj kaj de kapitalisma al socialisma posedanteco en privataj industrio kaj komerco certe kaŭzas grandegan liberigon de la produktaj fortoj. Tiamaniere la sociaj kondiĉoj estas kreitaj por grandskale disvolvi industrian kaj agrikulturan produktadon.

Parolado en la Plej Alta Ŝtata Konferenco (25 januaro 1956).

Ni estas nun efektivigantaj revolucion ne nur en la socia sistemo, la ŝanĝo de privata al publika posedanteco, sed ankaŭ en tekniko, la ŝanĝo de metia produkto al grandskala moderna maŝina produkto, kaj la du revolucioj estas interkunigitaj. En agrikulturo, sub kondiĉoj en nia lando, devas esti unue kooperigo kaj poste la uzo de granda maŝino (en kapitalismaj landoj oni kapitalismigas agrikulturon). Tial ni neniel devas rigardi industrion kaj agrikulturon, socialisman industriigon kaj la socialisman transformadon de agrikulturo kiel du apartigajn kaj izolitajn aferojn, kaj ni neniel devas emfazi unu flankon kaj neglekti la alian.

*Pri la Problemo de Agrikultura
Kooperigo (31 julio 1955).*

La nova socia sistemo estas ĵus establita, necesas tempo por ĝin firmigi. Ni ne povas supozi, ke la nova sistemo fariĝas

tute solida tuj post sia fondiĝo. Tio ne eblas. Estas necese ĝin firmigi paŝo post paŝo. Por ĝin firmigi definitive, ni devas efektiviĝi la socialisman industriigon de la lando, persisti en la socialisma revolucio sur ekonomia fronto kaj, plie, konstante kaj pene fari socialisman revolucian batalon kaj socialisman edukadon sur politika kaj ideologia frontoj. Krom tio, estas necesa ankaŭ la kunordiĝo de diversaj kondiĉoj internaciaj.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

En nia lando, la lukto por firmigi la socialisman sistemon kaj la batalo de “kiu venkos kiun” inter socialismo kaj kapitalismo ankoraŭ daŭros dum tre longa historia periodo. Tamen ni ĉiuj devas vidi, ke tiu ĉi nova sistemo de socialismo certe firmiĝos. Ni certe sukcesos konstrui socialisman

landon kun moderna industrio, moderna agrikulturo, moderna scienco kaj kulturo.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Tiuj intelektuloj, kiuj montriĝas malamikaj al nia ŝtato, estas treege malmultaj. Tiaj homoj ne ŝatas nian ŝtaton de proleta diktaturo, sed sopiras al la malnova socio. Ĉiam kiam prezentiĝas okazo, ili kreas malordojn kun la intenco renversi la Komunistan Partion kaj restarigi la malnovan Ĉinion. Inter la proleta linio kaj la burĝa, inter la socialisma linio kaj la kapitalisma, ili obstinas en la lasta. Sed tiu ĉi linio praktike estas neefektivigebla; pro tio, ili fakte estas pretaj kapitulaci al imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo. Tiaj homoj, troviĝantaj en diversaj rondoj: politika, industria kaj komerca, kultura, eduka,

scienca kaj teknika kaj religia, estas ekstreme reakciaj.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Serioza problemoj estas la edukado de la kamparanoj. Disa estas la kamparana ekonomio, kaj laŭ la sperto de Sovetunio, nur post longa tempo kaj zorga laboro, oni povos efektiviĝi la socialigon de agrikulturo. Sen socialigo de agrikulturo, ne povas esti komplete, firma socialismo.

“Pri Popol-demokratia Diktaturo” (30 junio 1949), Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong, vol. IV.

Ni devas fidi, unue, ke la vastaj amasoj de la kamparanoj volas suriri paŝon post paŝo la socialisman vojon sub la gvido de la Partio, kaj due, ke la Partio kapablas gvidi la kamparanojn suriri tiun vojon.

Tiuj du punktoj estas la esenco kaj la ĉefa fluo de la afero.

Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo (31 julio 1955).

La gvidantaj organoj de kooperativoj devas establi en si la dominan pozicion de la nunaj malriĉ-kamparanoj kaj novaj malsuperaj mez-kamparanoj, kun la malnovaj malsuperaj mez-kamparanoj kaj la superaj mez-kamparanoj — novaj kaj malnovaj— kiel la helpa forto. Nur tiamaniere povas esti efektivigita la unuiĝo inter la malriĉ-kamparanoj kaj mez-kamparanoj, firmigitaj la kooperativoj, disvolvita la produkto kaj korekte plenumita la socialisma transformado de la tuta kamparo laŭ la politiko de la Partio. Sen tiu kondiĉo, la mez- kaj malriĉ-kamparanoj ne povas esti unuiigitaj, la kooperativoj ne povas esti firmigitaj, produkto ne povas esti disvolvita kaj la socia-

lisma transformado de la tuta kamparo ne povas esti efektivigita.

Enkonduka noto al "Kiel la Mez-kamparana Domino en Vutang-a Agrikultura Produkta Kooperativo de Gaŭŝan-subdistrikto en Ĉangŝa-gubernio Ŝanĝiĝis en la Malriĉ-kamparanan Dominon" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo*, vol. II.

Estas necese unuiĝi kun la mez-kamparanoj, kaj estas erare ne tiel fari. Sed sur kiuj devas sin apogi la laborista klaso kaj la Komunista Partio en la kamparo por unuiĝi kun la mez-kamparanoj kaj realigi la socialisman transformadon de la tuta kamparo? Certe sur neniu alia ol la malriĉ-kamparanoj. Tia estis la kazo kiam la batalo kontraŭ la bienuloj estis farata kaj la agrara reformo estis efektivigata, kaj tia estas ankaŭ la kazo hodiaŭ kiam la batalo kontraŭ la kulakoj kaj aliaj kapitalismaj elementoj estas farata por efektivigi la

socialisman transformadon de agrikulturo. En ambaŭ tiuj revoluciaj periodoj, la mez-kampanoj ŝanceliĝis en la komencaj etapoj. Nur post kiam ili klare vidis la ĝeneralan tendencon de eventoj kaj la proksimiĝantan triumfon de la revolucio, la mez-kampanoj venos en la flankon de la revolucio. La malriĉ-kampanoj devas fari persvadan laboron al la mez-kampanoj kaj gajni ilin en sian flankon, por ke la revolucio vastiĝu tagon post tago ĝis la fina venko.

Enkonduka noto al "La Leciono de la Estiĝo de 'Mez-kampana Kooperativo' kaj 'Malriĉ-kampana Kooperativo' en Fu-an-gubernio" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kampano*, vol. II.

Estas serioza la tendenco al kapitalismo inter la bonhavaj kampanoj. Tiu tendenco fariĝos furioza, se nur ni iomete malatentas politikan laboron inter la kampanoj dum

la kooperiga movado kaj por tre longa periodo poste.

Enkonduka noto al "Firma Batalo Devas Esti Farata kontraŭ la Tendenco al Kapitalismo" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo*, vol. I.

La agrikultura kooperiga movado estis serioza ideologia kaj politika batalo tuj de la komenco. Ĉiu kooperativo ne povas esti establita ne trairinte tian batalon. Antaŭ ol tute nova socia sistemo povas esti konstruita sur la sidloko de la malnova, la sidloko devas esti tute balaita. Ĉiam, restaĵoj de malnovaj ideoj reflektantaj la malnovan sistemon restas en la cerboj de homoj por longa tempo, kaj ili neniel facile cedas. Post kiam kooperativo estas establita, ĝi devas trairi multajn pliajn batalojn antaŭ ol ĝi povas sin firmigi. Eĉ tiam, se

ĝi en momento malstreĉas siajn penojn,
ĝi ankoraŭ povas disfali.

Enkonduka noto al "Serioza
Leciono" (1955), *Socialisma Alt-
tajo en la Ĉina Kamparo*, vol. I.

En la lastaj jaroj la spontaneaj fortoj de kapitalismo kreskis tagon post tago en la kamparo, novaj riĉ-kamparanoj jam ĉie aperis kaj multaj bonhavaj mez-kamparanoj klopodas fariĝi riĉ-kamparanoj. Aliflanke, pro manko de sufiĉaj rimedoj de produkto, multaj malriĉ-kamparanoj ankoraŭ vivas en malriĉeco, iuj el ili estas en ŝuldo kaj aliaj vendas aŭ luigas sian teron. Se tiu tendenco iras nehaltigate, la polarizo en la kamparo neeviteble serioziĝos tagon post tago. Tiuj kamparanoj, kiuj perdis sian teron kaj tiuj kiuj restas en malriĉeco plendos, ke ni faras nenion por savi ilin de ruiniĝo aŭ por helpi ilin venki siajn malfacilojn. Nek la bonhavaj mez-kamparanoj kiuj disvolviĝas en la kapitalisma direkto estos

kontentaj je ni, ĉar ni povos neniam kontentigi iliajn postulojn, se ni ne intencas iri la kapitalisman vojon. Ĉu la laborist-kampana alianco povas daŭre stari firme en tiuj cirkonstancoj? Evidente ne. Nur sur nova bazo povas esti solvo por tiu ĉi problemo. Kaj tio signifas efektiviĝi, paŝon post paŝo, la socialisman transformadon de la tuto de agrikulturo samtempe kun la paŝo-post-paŝa efektiviĝo de socialisma industriigo kaj de la socialisma transformado de metioj kaj kapitalismaj industrio kaj komerco; en aliaj vortoj, ĝi signifas efektiviĝi kooperigon kaj elimini la riĉ-kampanan ekonomian sistemon kaj la individuan ekonomian sistemon en la kamparo, por ke la tuta kampara popolo kune pliriĉiĝos. Ni opinias ke tio estas la nura vojo por firmigi la laborist-kampanan aliancon.

*Pri la Problemo de Agrikultura
Kooperigo (31 julio 1955).*

Ĉionampleksa planado kaj multflanka konsiderado... aludas al ĉionampleksa planado kaj multflanka konsiderado por la interesoj de la sescent-miliona loĝantaro de nia lando. Kiam ni skizas planojn, traktas aferojn aŭ pensas pri problemoj, ni devas ĉiam eliri el la punkto ke Ĉinio havas loĝantaron de sescent milionoj. Ĉi tion ni neniam forgesu.

Pri la Ĝusta Traktaĵo de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Krom la gvidado de la Partio, decida faktoro estas nia loĝantaro de sescent milionoj. Pli da homoj signifas pli da diskutado, pli da entuziasmo kaj pli da energio. La popolamasoj estis neniam antaŭe tiel inspiritaj, tiel altaj en batalspirito kaj tiel senlime entuziasmaj kiel nun.

Rekomendi Lun Kooperativon (15 aprilo 1958).

Krom iliaj aliaj karakterizoj, la elstara karakterizo de la sescent milionoj da popoloj de Ĉinio estas ke ili estas "malriĉaj kaj blankaj". Tio ŝajnas malbona afero, sed fakte ĝi estas bona afero. Malriĉeco naskas la deziron por ŝanĝo, la deziron por agado kaj la deziron por revolucio. Sur blanka papero sen ia ajn ŝanĝo, la plej novaj kaj plej belaj skribaĵoj povas esti skribataj, la plej novaj kaj plej belaj bildoj povas esti pentrataj.

Rekomendi Iun Kooperativon (15
aprilo 1958).

Post la tutlanda venko de la ĉina revolucio kaj la solvo de la agra problemoj, restos ankoraŭ du fundamentaj kontraŭdiroj en Ĉinio. La unua estas enlanda, t.e., la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la burĝaro. La dua estas eksterlanda, t.e., la kontraŭdiro inter Ĉinio kaj la imperiismaj landoj. Pro tio, la ŝtata potenco de la popola respubliko sub la gvido de la laborista

klaso, post la venko de la popol-demokratia revolucio, devas esti ne malfortigita sed fortigita.

“Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio” (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

“Ĉu vi ne volas aboli ŝtatan potencon?” Jes, ni volas, sed nun ankoraŭ ne; nun ni ankoraŭ ne povas. Kial? Ĉar ekzistas ankoraŭ imperiismo, ekzistas enlande ankoraŭ reakciuloj, ekzistas enlande ankoraŭ klasoj. Nia nuna tasko estas fortigi la popolan ŝtatmaŝinon — tio signifas ĉefe la popolan armeon, la popolan policon kaj la popolajn juĝejojn — por fortikigi la nacian defendon kaj protekti la popolajn interesojn.

“Pri Popol-demokratia Diktaturo” (30 junio 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Nia ŝtato estas ŝtato de popol-demokratia diktaturo sub la gvido de la laborista klaso surbaze de la alianco de laboristoj kaj kamparanoj. Por kio estas tiu ĉi diktaturo? Ĝia unua funkcio estas subpremi en la lando la reakciajn klasojn, reakciulojn kaj tiujn ekspluatantojn kiuj rezistas socialisman revolucion, subpremi tiujn kiuj penas detrui nian socialisman konstruadon, tio estas, por solvi la kontraŭdirojn inter ni kaj la malamikoj en la lando. Ekzemple, aresti, juĝi kaj kondamni iujn kontraŭrevoluciulojn kaj senigi dum difinita periodo la elementojn de bienula kaj burokrat-kapitalista klasoj je la rajto de voĉdono kaj libereco de parolo — ĉio ĉi tio estas en la sfero de la diktaturo. Por konservi la socian ordon kaj gardi la interesojn de la vasta popolo, ni devas ankaŭ praktiki diktaturon super ŝtelistoj, friponoj, murdistoj, incendiistoj, kanajlaj klikoj kaj aliaj malbonaj elementoj kiuj serioze disrompas

la socian ordon. La dua funkcio de la diktaturo estas defendi nian landon kontraŭ renversa agado kaj ebla agreso fare de la eksteraj malamikoj. Se aperos tia situacio, la diktaturo prenos sur sin la taskon solvi la kontraŭdiron inter ni kaj la eksteraj malamikoj. La celo de la diktaturo estas defendi nian tutan popolon, por ke ĝi povu pace labori kaj konstrui nian landon en socialisman landon kun modernaj industrio, agrikulturo, scienco kaj kulturo.

Pri la Ĉusta Traktado de Kontraŭdironoj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

La popol-demokratia diktaturo bezonas la gvidon de la laborista klaso. Ĉar nur la laborista klaso estas la plej malproksimvida, plej malegoisma kaj plej ĝisfunde revolucia. La tuta revolucia historio pruvas, ke sen la gvido de la laborista klaso

revolucio malsukcesas, kaj kun la gvido de la laborista klaso revolucio venkas.

“Pri Popol-demokratia Diktaturo”
(30 junio 1949), *Elektitaj Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. IV.

La fundamento de popol-demokratia diktaturo estas la alianco de la laborista klaso, la kamparanaro kaj la urba etburĝaro, kaj ĉefe la alianco de la laborista klaso kaj la kamparanaro, ĉar tiuj du klasoj konsistigas 80% ĝis 90% de la ĉina loĝantaro. La renverso de imperiismo kaj la Kuomintang-reakciularo ŝuldas ĉefe al la forto de tiuj du klasoj. La transiro de nova demokratio al socialismo dependas ankaŭ ĉefe de la alianco de tiuj du klasoj.

“Pri Popol-demokratia Diktaturo”
(30 junio 1949), *Elektitaj Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. IV.

Klasbatalo, porprodukta batalo kaj scienca eksperimentado estas la tri grandaj revoluciaj movadoj por konstrui potencon socialisman landon. Tiuj movadoj estas solida garantio, por ke komunistoj sin liberigu de burokratismo, iĝu imunaj kontraŭ reviziismo kaj dogmismo, kaj restu por ĉiam nevenkeblaj. Ili estas fidinda garantio, por ke la proletaro povu unuiĝi kun la vastaj laborantaj amasoj por realigi demokratian diktaturon. Se, pro manko de tiuj movadoj, la bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, malbonaj elementoj kaj diversspecaj demonoj estus permesataj amase elrampi, dum niaj kadroj fermus siajn okulojn al ĉio ĉi tio kaj multaj eĉ ne povus distingi inter la malamikoj kaj ni mem, sed kunlaborus kun la malamikoj kaj fariĝus koruptitaj, senmoraligitaj kaj dispartigitaj de la malamikoj, se niaj kadroj estus tiel eltrenitaj aŭ la malamikoj sukcesus enŝteliĝi, kaj se multaj el niaj laboristoj, kamparanoj kaj intelektuloj fariĝus same

sendefendaj kontraŭ la samtempe praktika-
taj molaj kaj malmolaj taktikoj de la mal-
amikoj, do antaŭ ol pasos nelonga tempo,
eble nur kelkaj aŭ dekkelkaj jaroj, maksim-
ume, kelkaj jardekoj, neeviteble okazus
kontraŭrevolucia restariĝo tra la tuta lan-
do, la marksism-leninisma partio sendube
fariĝus reviziisma partio, faŝisma partio,
kaj la tuta Ĉinio ŝanĝus sian koloron.

Noto pri "Sep Bone Skribitaj
Dokumentoj de Ĝeĝiang-provinco
Koncerne la Partoprenon de Kad-
droj en Korpa Laboro" (9 majo
1963), citita laŭ *Pri la Pseŭdokomu-
nismo de Ĥruŝčov kaj Ĝia Historia
Leciono por la Mondo.*

La popol-demokratia diktaturo uzas du
metodojn. Al la malamikoj, ĝi uzas la
metodon de diktaturo, tio estas, por tiel
longa periodo, kiel estas bezonata, ĝi ne
permesas ilin partopreni en politika akti-
vado, devigas ilin obei la leĝon de la popola

registaro kaj okupiĝi en korp-laborado, kaj tra korp-laborado transformas ilin en novajn homojn. Kontraŭe, al la popolanoj ĝi uzas la metodon ne de devigo sed de demokratio, tio estas, ĝi nepre devas permesi ilin partopreni en politika aktivado kaj ne devigas ilin fari ĉi tion aŭ tion, sed uzas la metodon de demokratio por eduki kaj persvadi ilin.

Ferma parolado en la Dua Sesio de la Unua Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (23 junio 1950).

Por rapide disvolvi la socialisman aferon en Ĉinio sur pli firma bazo, la ĉina popolo kondukas sub la gvido de la Komunista Partio vivplenan stilĝustigan movadon. Tio estas, per la metodo de prezentado de faktoj kaj rezonado gvidate kaj libere disvolvi tutpopolan debaton en la urboj kaj kamparo pri tiaj demandoj kiaj la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo, la baza sistemo kaj

gravaj politikoj de la ŝtato, la laborstilo de partiaj kaj registaraj laborantoj, la bonstato de la popolo kaj aliaj, kaj per tio korekte solvi diversajn aktualajn kontraŭdirojn interne de la popolo, kiuj estas nepre solvendaj nuntempe. Tio estas socialisma movado de memeduko kaj memremuldo de la popolo.

Parolado ĉe la Kunveno de la Superega Soveto de Sovetunio por Celebri la 40-an Datrevenon de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (6 novembro 1957).

Ekstreme peniga tasko kuŝas antaŭ ni en la granda laboro de konstruado. Kvan-kam ni havas pli ol dek milionojn da membroj en nia partio, tamen ili estas ankoraŭ tre malgranda malplimulto en la tutlanda loĝantaro. Multe da laboro en niaj registaraj institucioj kaj publikaj organizoj kaj entreprenoj devas esti farata de personoj ekster la Partio. Neeblas bone fari nian

laboron, se ni ne kapablas nin apogi sur la popolamasoj kaj kunlabori kun personoj ekster la Partio. Dum ni daŭre plifortigas la unuiĝon de la tuta Partio, ni devas ankaŭ daŭre plifortigi la unuiĝon de ĉiuj niaj nacioj, demokratiaj klasoj, demokratiaj partioj kaj popolaj organizoj, kaj daŭre plifirmigi kaj plivastigi nian popol-demokratian unuecfronton, kaj ni devas serioze forigi ĉiujn malbonajn fenomenojn en ia ajn ĉenero de nia laboro, kiuj estas malutilaj al la unuiĝo inter la Partio kaj la popolo.

*Inaŭgura Parolado ĉe la Oka Tutlanda
Kongreso de la Komunista Partio de
Ĉinio (15 septembro 1956).*

IV. LA ĜUSTA TRAKTADO DE KONTRAŬDIROJ INTERNE DE LA POPOLO

Antaŭ ni estas du specoj de sociaj kontraŭdiroj — la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo. Tiuj ĉi du specoj de kontraŭdiroj estas tute malsamaj en naturo.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Por ĝuste koni tiujn ĉi du malsamajn specojn de kontraŭdiroj [la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj kaj tiuj interne de la popolo], oni devas unue kompreni klare kio estas “la popolo” kaj kio “la malamikoj”. . . . En la nuna stadio, en la

periodo de socialisma konstruado, ĉiuj klasoj, tavoloj kaj sociaj grupoj, kiuj aprobas, subtenas kaj partoprenas la aferon de socialisma konstruado, apartenas al la kategorio de la popolo, dum ĉiuj sociaj fortoj kaj grupoj, kiuj rezistas kontraŭ la socialisma revolucio, sin tenas malamikaj al socialisma konstruado kaj penas ĝin detruigi, estas malamikoj de la popolo.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

En la kondiĉoj de hodiaŭa Ĉinio, tio kion ni nomas kontraŭdiroj interne de la popolo inkluzivas la jenon: kontraŭdiroj interne de la laborista klaso, kontraŭdiroj interne de la kamparanaro, kontraŭdiroj interne de la intelektularo, kontraŭdiroj inter la laborista kaj kamparana klasoj, kontraŭdiroj inter la laboristoj kaj kamparanoj unuflanke kaj la intelektuloj aliflanke, kontraŭdiroj inter la laborista klaso kaj

aliaj sekcioj de la laboranta popolo unuflanke kaj la nacia burĝaro aliflanke, kontraŭdiroj interne de la nacia burĝaro, k. t. p. Nia popola registaro estas registaro kiu efektive reprezentas la interesojn de la popolo kaj servas al ĝi, sed sin trovas ankaŭ certaj kontraŭdiroj inter la registaro kaj la popolamasoj. Tiuj inkluzivas la kontraŭdirojn inter la ŝtataj intereso, la kolektivaj intereso kaj la individuaj intereso, inter demokratio kaj centralizismo, inter la gvidantoj kaj la gvidatoj, kaj inter la burokrata laborstilo de iuj el la laborantoj de la ŝtataj organoj kaj la popolamasoj. Ankaŭ ili estas kontraŭdiroj interne de la popolo. Ĝeneral-dire, la kontraŭdiroj interne de la popolo estas kontraŭdiroj sur la bazo de fundamenta identeco de la intereso de la popolo.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

La kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj estas antagonismaj kontraŭdiroj. Inter la laborantaj popolanoj la kontraŭdiroj interne de la popolo estas neantagonismaj, dum tiuj inter la ekspluatata kaj ekspluatanta klasoj havas, krom la antagonisma flanko, ankaŭ la flankon neantagonisman.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Kiel ni devas juĝi en la politika vivo de nia popolo la pravon kaj malpravon de niaj vortoj kaj agoj? Ni pensas, ke laŭ la principoj de nia Konstitucio, laŭ la volo de la plej granda plimulto de la popolo kaj la politikaj pozicioj kune proklamitaj en diversaj okazoj de niaj politikaj partioj kaj grupoj, la kriterioj por praveco de vortoj kaj agoj ĝenerale povas esti determinitaj jene:

(1) Vortoj kaj agoj devas esti utilaj por unuigi kaj ne disigi nian diversnacion

popolon.

(2) Ili devas esti utilaj kaj ne malutilaj al socialisma transformado kaj socialisma konstruado.

(3) Ili devas esti utilaj por firmigi kaj ne detrui aŭ malfortigi la popol-demokratian diktaturon.

(4) Ili devas esti utilaj por firmigi kaj ne detrui aŭ malfortigi la demokratian centralizismon.

(5) Ili devas esti utilaj por firmigi kaj ne forigi aŭ malfortigi la gvidadon de la Komunista Partio.

(6) Ili devas esti utilaj kaj ne malutilaj al internacia socialisma solidareco kaj la internacia solidareco de la pacamaj popoloj tra la tuta mondo.

El tiuj ĉi ses kriterioj, la plej gravaj estas la socialisma vojo kaj la gvidado de la Partio.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

La problemo de elimino de kontraŭ-revoluciuloj estas problemo de lukto en la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj. Interne de la popolo iuj havas iom malsamajn opiniojn rilate al tiu ĉi problemo. Sin trovas du specoj de homoj kies opinioj diferencas de la niaj. Tiuj kiuj havas dekstreman penson faras nenian distingon inter ni kaj la malamikoj kaj erare prenas la malamikojn por homoj el ni mem. Ili rigardas kiel amikojn tiujn personojn, kiujn la vastaj popolamasoj rigardas kiel malamikojn. Tiuj kiuj havas "maldekstreman" penson tiel pligrandigas la kontraŭdirojn inter ni kaj la malamikoj ke ili erare prenas iujn kontraŭdirojn interne de la popolo por tiuj inter ni kaj la malamikoj, kaj rigardas kiel kontraŭrevoluculojn ankaŭ tiujn personojn kiuj estas efektive ne tiaj. Ambaŭ opinioj estas eraraj. Neniu el ili ebligas nin ĝuste trakti la pro-

blemon de eliminado de kontraŭrevolu-
ciuloj aŭ ĝuste taksu tiun ĉi laboron.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Kvalite malsamaj kontraŭdiroj povas esti solvataj nur per kvalite malsamaj metodoj. Ekzemple, la kontraŭdiro inter la proletaro kaj la burĝaro estas solvata per socialisma revolucio; la kontraŭdiro inter la popolamasoj kaj la feŭda sistemo estas solvata per demokratia revolucio; la kontraŭdiro inter la kolonioj kaj imperiismo estas solvata per nacia revolucia milito; la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la kamparanaro en socialisma socio estas solvata per la kolektivigo kaj mekanikigo de la agrikulturo; la kontraŭdiro interne de la Komunista Partio estas solvata per kritiko kaj memkritiko; la kontraŭdiro inter la socio kaj la naturo estas solvata per la disvolvado de la produktaĵoj fortoj.

... Uzi malsamajn metodojn por solvi malsamajn kontraŭdirojn estas principo kiun marksist-leninistoj devas severe observi.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

Pro tio ke la karaktero de la kontraŭdiroj inter ni kaj la malamikoj diferencas de tiu de la kontraŭdiroj interne de la popolo, ankaŭ la manieroj por solvi ilin devas esti malsamaj. Por mallonge diri, la antaŭa estas problemo de klara distingo inter ni kaj la malamikoj, dum la lasta estas problemo de klara distingo inter pravo kaj malpravo. Kompreneble, la problemo de distingo inter ni kaj la malamikoj estas ankaŭ problemo de distingo inter pravo kaj malpravo. Ekzemple, la problemo kiuj estas pravaj, ni aŭ la reakciuloj enlandaj kaj eksterlandaj — la imperiistoj, la feŭdistoj kaj la burokrat-kapitalistoj — estas ankaŭ problemo de pravo kaj malpravo,

sed ĝi estas problemo de pravo kaj malpravo de alia kategorio diferenca en naturo de tiu interne de la popolo.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Ĉiujn problemojn de ideologia naturo, ĉiujn disputeblajn problemojn interne de la popolo ni povas solvi nur per demokratiaj metodoj, per metodoj de diskuto, de kritiko, de persvado kaj eduko, kaj ne per devigaj kaj subpremaj metodoj.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Por entrepreni produktadon kaj lernadon efike kaj pasigi sian vivon bonorde, la popolo volas ke ĝia registaro, la gvidantoj de produktado kaj de kulturaj kaj edukaj organoj publikigu diversajn konvenajn administrajn ordonojn kun deviga naturo. Estas

komuna scio de ĉiuj, ke sen tiaj administraj ordonoj la konservado de socia ordo estas nebla. Administraj ordonoj kaj la metodo de persvado kaj edukado estas du flankoj, kiuj interkompletigas unu la alian por solvi la kontraŭdirojn interne de la popolo. Administraj ordonoj publikigitaj por la konservado de socia ordo ankaŭ devas esti akompanataj per persvadado kaj edukado, ĉar en multaj kazoj solaj administraj ordonoj ne efikas.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Neeviteble, la burĝaro kaj etburĝaro manifestas siajn ideologiojn. Ili nepre esprimas sin obstine per diversaj rimedoj en politikaj kaj ideologiaj problemoj. Estas neeble postuli ke ili tion ne faru. Ni ne devas uzi metodojn de subpremo por malebligi ilin sin esprimi, sed devas permesi al ili sin esprimi, kaj samtempe,

kiam ili sin esprimas, argumenti kun ili kaj fari konvenajn kritikojn. Sendube, ni devas kritiki ĉiuspecajn erarajn ideojn. Ne fari kritikon rigardante erarajn ideojn ĉien inundadi kaj lasante ilin libere okupi la merkaton estas certe ne prave. Eraroj devas esti kritikataj kaj venenaj herboj kontraŭbatalataj, kiam ajn ili estas trovitaj. Sed tia kritiko ne devas esti dogmista, kaj ni ne devas uzi metafizikan metodon sed peni apliki dialektikan metodon. Necesas scienca analizo kaj sufiĉe konvinkaj argumentoj.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Ni devas, ... kritiki la difektojn de la popolo, sed tion ni devas fari vere el la starpunkto de la popolo kaj el sincera varma deziro protekti kaj eduki ĝin. Se ni traktus niajn kamaradojn kiel malamikojn, tio

do metus nin sur la starpunkton de la mal-
amikoj.

“Paroladoj ĉe la Literatura kaj
Arta Kunsido en Jan-an” (majo
1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ
Zedong*, vol. III.

Kontraŭdiro kaj batalo estas universalaj
kaj absolutaj, sed la metodoj por solvi
kontraŭdirojn, t. e., la formoj de batalo
varias laŭ la diferencoj en la naturo de la
kontraŭdiroj. Iuj kontraŭdiroj estas ka-
rakterizitaj per malkaŝa antagonismo kaj
aliaj ne. Konforme al la konkreta disvol-
viĝo de objektoj, iuj kontraŭdiroj, origine
ankoraŭ ne antagonismaj, disvolviĝas en
antagonismajn, dum aliaj, origine antagonis-
maj, disvolviĝas en neantagonismajn.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

Sub ordinaraj cirkonstancoj, kontraŭdiroj interne de la popolo ne estas antagonismaj. Sed, se ili ne estas konvene traktataj, aŭ se ni perdas nian atentemon kaj malstreĉas nian gardemon, ankaŭ povas estiĝi antagonismo. En socialismaj landoj tiaj okazaĵoj estas ĝenerale nur fenomenoj lokaj kaj maldaŭraj. Tiel estas, ĉar en la socialismaj landoj la ekspluatado de homo al homo estas forigita kaj la interesoj de la popolo estas fundamente la samaj.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

En nia lando, la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la nacia burĝaro apartenas al la kategorio de kontraŭdiroj interne de la popolo. La klasbatalo inter la du klasoj estas ĝenerale klasbatalo interne de la popolo, ĉar la nacia burĝaro de nia lando havas duoblan karakteron. En la periodo de la burĝ-demokratia revolucio, ĝi havis

flankon revolucieman, kaj ankaŭ flankon kompromiseman. En la periodo de socialisma revolucio, ĝi havas la flankon de ekspluatado al la laborista klaso por gajni profiton, kaj ankaŭ tiun de subtenado al la Konstitucio kaj volonteco akcepti socialisman transformadon. La nacia burĝaro diferencas de la imperiistoj, bienuloj kaj burokrat-kapitalistoj. La kontraŭdiro de ekspluatanto kaj ekspluatato, kiu ekzistas inter la nacia burĝaro kaj la laborista klaso, estas ja kontraŭdiro antagonisma. Sed en la konkretaj kondiĉoj de nia lando, la antagonisma kontraŭdiro inter la du klasoj, se bone traktate, povas esti transformita en neantagonisman kontraŭdiron kaj solvita en paca maniero. Tamen, se ĝi ne estas bone traktata, se ni ne alprenas la politikon de unuiĝo, kritikado kaj edukado en rilato kun la nacia burĝaro, aŭ la nacia burĝaro ne akceptas tiun nian politikon, do la kontraŭdiro inter la laborista klaso kaj la na-

cia burĝaro povas turniĝi en kontraŭdiron inter ni kaj la malamikoj.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

La enlandaj reakciuloj en socialisma lando, en koluzio kun la imperiistoj, utiligas la kontraŭdirojn interne de la popolo por inciti malunuecon kaj malakordon kaj ventumi la flamojn de malordo, intencante atingi siajn konspirajn celojn. La leciono de la hungara evento indas nian atenton.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

V. MILITO KAJ PACO

Milito estas la plej alta formo de batalo por solvi kontraŭdirojn, kiuj troviĝas en certa stadio de disvolvo, inter klasoj, nacioj, ŝtatoj aŭ politikaj grupoj, kaj ĝi komencis ekzisti de kiam estiĝis privata propraĵo kaj klasoj.

“Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio” (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. 1.

“Milito estas daŭrigo de politiko.” En tiu senco milito estas politiko, kaj milito mem estas agado kun politika karaktero; ekde la antikveco sin trovas neniu milito sen politika karaktero. . . .

Sed milito havas siajn apartajn karakterojn. En tiu senco milito ne egalas al

politiko ĝenerale. "Milito estas daŭrigo de politiko per aliaj rimedoj." Kiam politiko, disvolviĝinte ĝis certa stadio, ne povas plu antaŭeniri kiel kutime, tiam eksplodas milito por forbalai la obstaklojn sur la vojo de politiko. ...Kiam la obstakloj estas forigitaj kaj la politika celo atingita, la milito ĉesas. Sed, se la obstakloj ne estas komplete forbalaitaj, la milito devas ankoraŭ daŭri por plene efektiviĝi la celon. ...Tial ni povas diri, ke politiko estas milito sen sangverŝo, dum milito estas politiko kun sangverŝo.

"Pri Longdaŭra Milito" (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. II.

En la historio militoj estas dividitaj en du specojn: justaj kaj maljustaj. Ĉiuj progresemaĵoj militoj estas justaj, dum ĉiuj malhelpas progreson, estas maljustaj. Ni komunistoj oponas ĉiujn maljustajn militojn, kiuj malhelpas pro-

greson, sed ni ne oponas progresemajn, justajn militojn. Rilate al la lastaj, ni komunistoj ne nur ne oponas, sed eĉ aktive partoprenas ilin. Rilate al maljustaj militoj, ekzemple, en la Unua Mondmilito ambaŭ flankoj batalis por imperiismaj interesoj, tial la komunistoj de la tuta mondo firme oponis tiun militon. La rimedoj por oponi tian militon estas: antaŭ la eksplodo de milito oni devas ĉiamaniere preventi ĝin; kaj post ĝia eksplodo, oni devas oponi militon per milito, oponi maljustan militon per justa milito, se tio estas iel ebla.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

En klasa socio revolucioj kaj revoluciaj militoj estas neeviteblaj kaj sen ili la salto en socia disvolvigo ne povas plenumiĝi, la reakcia reganta klaso ne povas esti ren-

versita kaj tiel la popolo ne povas akiri ŝtatpotencon.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

Revolucia milito estas ia antitoksino, kiu ne nur eliminis la venenon de la mal-amiko, sed ankaŭ purigas nin de niaj propraj malpuraĵoj. Ĉiu justa revolucia milito enhavas grandegan forton, ĝi povas transformi multajn objektojn aŭ elhaki la vojon por tio. La ĉina-japana milito transformos kaj Ĉinion kaj Japanion; se Ĉinio nur persistas en la Rezistmilito kaj pri la unueca fronto, la malnova Japanio certe estos transformita en novan Japanion kaj la malnova Ĉinio en novan Ĉinion, ankaŭ homoj kaj ĉio alia en Ĉinio kaj Japanio estos transformitaj dum kaj post la milito.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. II.

Ĉiu komunisto devas kompreni tiun ĉi veron: “El la pafilo venas ŝtatpotenco”.

“Problemoj de Milito kaj Strategio” (6 novembro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La centra tasko kaj plej alta formo de revolucio estas kapti ŝtatpotencon per armita forto kaj solvi problemon per milito. Tiu ĉi marksism-leninisma principo de revolucio validas universale, tiel por Ĉinio kiel por ĉiuj aliaj landoj, tute senescepte.

“Problemoj de Milito kaj Strategio” (6-novembro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Sen armita batalo, nek la proletaro, nek la popolo, nek la Komunista Partio havus ian pozicion en Ĉinio, kaj estus neebla triumfo de la revolucio. En la dek ok jaroj [depost la fondiĝo de la Partio], la disvolviĝo, firmiĝo kaj bolŝevikiĝo de nia partio iris en revoluciaj militoj; sen armita

batalo ne estus la hodiaŭa Komunista Partio. Kamaradoj en la tuta Partio ne devas forgesi tiun sperton, kiun ni ricevis kontraŭ sango.

“Inaŭguraj Vortoj por *La Komunisto*” (4 oktobro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Rigardate el la vidpunkto de marksisma doktrino pri la ŝtato, la armeo estas la ĉefa konsistiganta parto de ŝtata potenco. Kiu volas kapti la ŝtatan potencon kaj teni ĝin, tiu devas havi fortan armeon. Iuj mokas nin kiel pledantojn de la teorio de “ĉiopoveco de milito”. Jes, ni estas pledantoj de la ĉiopoveco de revolucia milito; tio ne estas malbona, sed estas bona kaj marksisma. La pafiloj de la Rusa Komunista Partio kreis socialismon. Ni kreos demokratian respublikon. Sperto de la klasbatalo en la epoko de imperiismo instruas nin, ke nur per la forto de la pafilo la laborista klaso kaj la laborantaj amasoj povas venki

la armitajn burĝaron kaj bienulojn. En tiu ĉi senco ni povas diri, ke nur per pafiloj la tuta mondo povas esti transformita.

“Problemoj de Milito kaj Strategio” (6 novembro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ni estas pledantoj por la forigo de milito, ni ne volas militon; sed milito povas esti forigita nur tra milito, kaj por forigi la pafilon estas necese preni la pafilon.

“Problemoj de Milito kaj Strategio” (6 novembro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Militon, tiun monstron de reciproka buĉado inter homoj, la progreso de homa socio fine eliminis, cetere en ne tre malproksima estonteco. Sed sin trovas nur unu rimedo por ĝin elimini, t.e. opozicii militon per milito, opozicii kontraŭrevolucionan militon per revolucia milito, opozicii

nacian kontraŭrevolucionan militon per nacia revolucia milito kaj opozicii kontraŭrevolucionan klasan militon per revolucia klasa milito. . . . Kiam homa socio progresos ĝis la stadio, en kiu klasoj kaj ŝtatoj eliminiĝos, tiam malaperos ĉiaj ajn militoj, tiel kontraŭrevoluciaj kaj revoluciaj, kiel maljustaj kaj justaj; tio ja estos la epoko de eterna paco de homaro. Ni studas la leĝojn de revolucia milito, elirante el la deziro elimini ĉiujn militojn; tio estas limlinio por distingi nin komunistojn disde ĉiuj ekspluataj klasoj.

“Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio” (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Nia lando kaj ĉiuj aliaj socialismaj landoj deziras pacon, tion deziras ankaŭ la popoloj de ĉiuj landoj en la mondo. Tiuj, kiuj avidas militon kaj ne volas pacon, estas nur iuj monopolaj kapitalistaj grupoj en plen-

mano da imperiismaj landoj, kiuj sin riĉigas depende de agreso.

Inaŭgura Parolado ĉe la Oka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio (15 septembro 1956).

Por gajni longdaŭran pacon en la mondo, ni devas pluapaŝe disvolvi nian amikecon kaj kunlaboron kun ĉiuj frataj landoj en la socialisma tendaro kaj plifortigi la solidarecon kun ĉiuj pacamaj landoj. Ni devas peni por starigi normalajn diplomatiajn rilatojn sur la bazo de reciproka respekto al teritoria integreco kaj suvereneco kaj de egaleco kaj reciproka utilo, kun ĉiuj landoj, kiuj volas pace konekzisti kun ni. Ni devas doni aktivan subtenon al la nacia sendependiga kaj liberiga movado en diversaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko, kaj al la paca movado kaj justaj bataloj de ĉiuj landoj en la mondo.

Inaŭgura Parolado ĉe la Oka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio (15 septembro 1956).

Rilate al la imperiismaj landoj, ni ankaŭ devas unuiĝi kun iliaj popoloj kaj klopodi pace kunekzisti kun tiuj landoj, komerci kun ili kaj bremsi iun ajn eblan militon, sed ni nepre ne portu iajn nerealajn pensojn pri ili.

*Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭ-
aĵoj Interne de la Popolo (27 febru-
aro 1957).*

Ni esperas pacon. Tamen, se imperiismo insistas militi, ni havas nenian alternativon krom fari la firman decidon batali ĝis la fino antaŭ ol rekomenci nian konstruadon. Se vi ĉiutage timas militon, do kion vi faros, kiam alvenos milito? Unue mi diris, ke la orienta vento superas la okcidentan kaj milito ne eksplodos, kaj nun mi aldonis tiujn klarigojn pri la situacio okaze ke eksplodos milito. Tiamaniere ambaŭ ebloj estas enkalkulitaj.

Parolado ĉe la Moskva Kunveno
de Komunistaj kaj Laboristaj
Partioj (18 novembro 1957).

Tra la tuta mondo homoj estas nun priparolantaj, ĉu eksplodos tria mondmilito. Rilate al tiu ĉi problemo, ni devas esti mense preparitaj, kaj samtempe fari analizon. Ni staras firme por paco kaj kontraŭ milito. Sed, se la imperiistoj volas nepre lanĉi militon, ni ankaŭ ne devas ĝin timi. Nia sinteno en tiu ĉi problemo estas la sama kiel nia sinteno al ĉiuj "tumultoj": unue, ni ilin kontraŭstaras; due, ni ilin ne timas. Post la Unua Mondmilito aperis Sovetunio kun loĝantaro nombranta ducent milionojn. Post la Dua Mondmilito estiĝis socialisma tendaro kun totala loĝantaro nombranta naŭcent milionojn. Se la imperiistoj nepre volas lanĉi trian mondmiliton, ni estas certaj ke aliaj pluraj centmilionoj da homoj sin turnos al socialismo; tiam postrestos al la imperiistoj jam ne multe da tereno kaj povos okazi ankaŭ plena disfalo de la imperiisma sistemo.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interns de la Popolo (27 februaro 1957).

Subfosado, malsukceso, denove subfosado, denove malsukceso, kaj tiel ĝis pereo — jen estas la logiko de imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj tra la mondo en rilato al la afero de la popolo, kaj ili neniam iros kontraŭ tiu ĉi logiko. Tio estas leĝo marksisma. Kiam ni diras: “Imperiismo estas feroca”, tio signifas ke ĝia naturo estas neŝanĝebla, la imperiistoj neniam volos formeti siajn buĉistajn tranĉilojn, kaj ili neniam fariĝos budhoj, ĝis sia pereo.

Batalo, malsukceso, denove batalo, denove malsukceso, denove batalo, kaj tiel ĝis venko — jen estas la logiko de la popolo, kaj ankaŭ ĝi neniam iros kontraŭ tiu ĉi logiko. Tio estas alia leĝo marksisma. La revolucio de la rusa popolo iris laŭ tiu ĉi leĝo kaj ankaŭ la revolucio de la ĉina popolo iras laŭ tiu ĉi leĝo.

“Forĵetu Iluziojn, Preparaĝu por Batalo!” (14 aŭgusto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ni devas neniam pro venko malstreĉian atenton al la freneza intrigo de venĝo de la imperiistoj kaj iliaj lakeoj. Kiu ajn malstreĉas sian atenton, tiu senarmigos sin en politiko kaj metos sin en pasivan pozicion.

“Parolado ĉe la Prepara Kunveno de la Nova Politika Interkonsiliĝa Konferenco” (15 junio 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La imperiistoj kaj iliaj lakeoj, la ĉinaj reakciuloj, neniam rezignacias pri sia malvenko en ĉi tiu tero Ĉinio. Ili plue kompletos unu kun la alia kaj oponos la ĉinan popolon per ĉiuj eblaj rimedoj. Ekzemple, sendi siajn lakeojn enŝteliĝi en la internon de Ĉinio por entrepreni splitigan kaj subfosan laboron. Tio estas certa; ili neniam forgesos tiun ĉi laboron. Ekzemple, instigi la ĉinajn reakciulojn kaj eĉ aldoni siajn proprajn fortojn por blokadi

ĉinajn havenojn. Se nur estas eblo, ili certe tiel faros. Plue, se ili ankoraŭ volos aventuri, tio ne estas neebla, ke ili sendos parton da siaj trupoj por invadi kaj ĝeni ĉinajn landlimojn. Ĉion ĉi tion ni devas plene enkalkuli.

“Parolado ĉe la Prepara Kunveno de la Nova Politika Interkonsiliĝa Konferenco” (15 junio 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La mondo progresas, la estonteco estas brila kaj neniu povas ŝanĝi tiun ĉi ĝeneralan tendencon de historio. Ni devas konstante fari propagandon al la popolo pri la faktoj de monda progreso kaj la brila estonteco por ke la popolo starigu sian memfidon en venko.

“Pri la Ĉongking-a Intertraktado” (17 oktobro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La komandantoj kaj batalantoj de la tuta Popola Liberiga Armeo devas absolute neniom malstreĉi sian batalvolon; ĉia penso, kiu malstreĉas la batalvolon aŭ subtaksas la malamikojn, estas erara.

“Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio” (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

VI. IMPERIISMO KAJ ĈIUJ REAKCIULOJ ESTAS PAPERAJ TIGROJ

Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj. En aspekto la reakciuloj estas timindaj, sed fakte ili ne havas forton eksterordinaran. Rigardate el longperioda vidpunkto, vere potenca forto apartenas ne al la reakciuloj, sed al la popolo.

“Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong” (aŭgusto 1946), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Kiel ĉio en la mondo havas duoblan naturon (t.e. la leĝo de unueco de kontraŭoj), tiel ankaŭ imperiismo kaj ĉiuj reakciuloj havas duoblan naturon, ili estas veraj tigroj kaj ankaŭ paperaj tigroj. En la his-

torio, antaŭ ol sia preno de la regpotenco kaj en periodo da tempo post tio, la sklavposedantaro, la feŭda bienularo kaj la burĝaro estis vivplenaj, estis revoluciuloj, estis progresemuloj, estis veraj tigroj. En sekvinta periodo da tempo, ĉar iliaj kontraŭaj flankoj: la sklavararo, kamparanaro kaj proletaro paŝon post paŝo kreskis en forto kaj batalis kontraŭ ili pli kaj pli intense, ili do paŝon post paŝo turniĝis en la malon, en reakciulojn, en postiĝintojn, en paperajn tigrojn kaj fine estis aŭ estos reversitaj de la popolo. La klasoj reakciaj, postiĝintaj kaj putriĝintaj, ankoraŭ havas tian duoblan naturon eĉ en sia lasta vivmorta batalo kontraŭ la popolo. Unufianke, ili estas veraj tigroj, homojn manĝantaj, milionojn, dekmilionojn da homoj manĝantaj. La afero de la popola batalado trapasis periodon de malfaciloj kaj penoj, kaj survoje estiĝis multaj zigzagoj. Por forigi la regadon de imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo en Ĉinio, la ĉina

popolo elspezis tempon de pli ol cent jaroj, oferis ĉirkaŭ kelkdek milionojn da homvivoj kaj nur tiam akiris la venkon de 1949. Vidu, ĉu ili ne estis vivaj tigroj, feraj tigroj kaj veraj tigroj? Tamen ili fine turniĝis en paperajn tigrojn, mortajn tigrojn kaj fabkazeajn tigrojn. Tio estas historiaj faktoj. Ĉu oni ne vidis kaj aŭdis tion? Ja miloj kaj dekmiloj! Miloj kaj dekmiloj! Tial laŭesence, laŭ longperioda vidpunkto kaj laŭ strategia vidpunkto oni nepre devas rigardi la imperiismon kaj ĉiujn reakciulojn paperaj tigroj kiel ili fakte estas. Sur tio ni devas formi nian strategian penson. Aliflanke, ili estas vivaj, feraj kaj veraj tigroj, ili povas manĝi homojn. Sur tio ni devas formi nian manovran penson kaj taktikan penson.

Farolado ĉe la Vuĉang-kunveno de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (1 decembro 1958), citita en la klariga noto de "Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong", *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Mi diris, ke ĉiuj laŭdire potencaj reakciuloj estas nur papertigroj. La kialo estas, ke ili izoliĝas de la popolo. Vidu, ĉu Hitler ne estis papertigro? Ĉu li ne estis faligita? Mi diris ankaŭ, ke la caro estis papertigro, la ĉina imperiestro estis papertigro, la japana imperiismo estis papertigro, kaj jen ili ĉiuj falis. La usona imperiismo ankoraŭ ne falis kaj cetere havas atom-bombojn. Sed mi kredas, ke ankaŭ ĝi falos, ankaŭ ĝi estas papertigro.

Parolado ĉe la Moskva Kunveno
de Komunistaj kaj Laboristaj
Partioj (18 novembro 1957).

“Levi ŝtonegon kaj ĝin faligi sur siajn proprajn piedojn” estas ĉina popoldiro por priskribi la konduton de iuj stultuloj. La reakciuloj en diversaj landoj ĝuste estas stultuloj de tia speco. Iliaj diversaj persekutoj kontraŭ la revoluciaj popoloj, en la fina analizo, servas nur por akceli la popolan revolucion al pli vasta kaj pli

intensa skalo. Ĉu la ĉiamanieraj persekutoj al la revolucia popolo fare de la caro kaj Ĉiang Kajŝek ne servis nur por stimuli la grandan rusan revolucion kaj la grandan ĉinan revolucion?

Parolado ĉe la Kunveno de la Superega Soveto de Sovetunio por Celebri la 40-an Datrevenon de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (6 novembro 1957).

La usona imperiismo invadis ĉinan teritorion Tajvan kaj ĝin okupas de naŭ jaroj. Antaŭ nelonge ĝi ekspedis siajn armitajn trupojn por invadi kaj okupi Libanon. Usono starigis centojn da militaj bazoj en multaj landoj tra la tuta mondo. La ĉina teritorio Tajvan, Libano kaj ĉiuj militaj bazoj de Usono sur fremda teritorio estas pendig-maŝoj ĉirkaŭ la kolo de la usona imperiismo. Estas neniu alia ol usonanoj mem, kiuj faris tiujn ĉi pendig-maŝojn, metis ilin ĉirkaŭ sian propran kolon

kaj donis la aliajn finojn de la ŝnuroj al la ĉina popolo, la popoloj de la arabaj landoj kaj ĉiuj popoloj de la tuta mondo, kiuj amas pacon kaj oponas agreson. Ju pli longe la usonaj agresantoj restos en tiuj lokoj, des pli streĉitaj fariĝos la pendigmaŝoj ĉirkaŭ ilia kolo.

Parolado en la Plej Alta Ŝtata Konferenco (8 septembro 1958).

La vivo de la imperiistoj ne daŭros longe, ĉar ili ĉiam faras malbonajn aferojn. Ili speciale nutras kaj subtenas diverslandajn reakciulojn, kiuj estas kontraŭ la popolo, ili perforte okupas multajn koloniojn, duonkoloniojn kaj militajn bazojn, kaj minacas la pacon per atoma milito. Tiel, ili devigas pli ol 90 procentojn de la loĝantaro de la mondo amase leviĝi nun aŭ estonte en batalo kontraŭ ili. Tamen la imperiistoj ankoraŭ vivas nun, ankoraŭ tiranas en Azio, Afriko kaj Latinameriko. En la Okcidento, ili ankoraŭ subpremas la popolamasojn en sia propra lando. Ĉi

tiu situacio nepre devas esti ŝanĝita. Fini la agreson kaj subpremon de imperiismo, ĉefe de la usona imperiismo, estas la tasko de la popoloj de la tuta mondo.

Parolo kun raportisto de la Hinhua-a Novaĵ-agentejo (29 septembro 1958).

Agante tirane ĉie, la usona imperiismo metas sin en la pozicion de malamiko de la tutmonda popolo kaj igas sin pli kaj pli izolita. La atombomboj kaj hidrogenaj bomboj en la manoj de la usona imperiismo ne povas timigi ĉiujn kiuj ne volas fariĝi sklavoj. La furioza tajdo de la tutmonda popolo kontraŭ la usonaj agresantoj estas nerezistebla. La batalo de la tutmonda popolo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj certe akiros pli grandajn venkojn.

“Parolo por Subteni la Panaman Popolon en Ĝia Justa Patriota Batalo kontraŭ la Usona Imperiismo” (12 januaro 1964), *Unuiĝu la Popoloj de la Tuta Mondo por Frakasi la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn.*

Se la usonaj monopolaj kapitalistaj grupoj persistas efektiviĝi siajn politikojn de agreso kaj milito, do, certe venos la tago, kiam ili estos pendigitaj de la popoloj tra la tuta mondo. La sama sorto atendas ankaŭ la kunkrimulojn de Usono.

Parolado en la Plej Alta Ŝtata Konferenco (8 septembro 1958).

Por batali kontraŭ la malamikoj, ni formis al ni dum longa tempo jenan koncepton: strategie ni devas malestimi ĉiujn malamikojn, sed taktike ni devas trakti ilin ĉiujn serioze. Alivorte, ni nepre devas ilin malestimi en la tuto, sed ni devas trakti ilin serioze en ĉiu aparta konkreta problemo. Se ni ne malestimas la malamikojn en la tuto, ni faros oportunisman eraron. Marks kaj Engels estis nur du homoj, tamen ili jam deklaris siatempe, ke kapitalismo estos renversita tra la tuta mondo. Sed, se ni ne traktas serioze la malamikojn en konkretaj problemoj, en problemo koncerne

ĉiun apartan malamikon, ni faros aventurisman eraron. Militon oni povas fari nur batalon post batalo, kaj la malamikojn oni povas ekstermi nur parton post parto. Fabrikojn oni povas konstrui nur unun post alia, kaj la kampojn la kamparanoj povas plugi nur pecon post peco. Tiel oni faras ankaŭ en manĝado. Strategie ni malestimas la manĝadon: la manĝaĵon ni povas forkonsumi. Sed konkrete manĝante, ni devas preni la manĝaĵon buŝon post buŝo, kaj estas neeble formanĝi tutan festenon en unu gluto. Tio estas nomata solvo unu post alia kaj en milita literaturo tio estas nomata frakaso de la malamikoj unu post alia.

Parolado ĉe la Moskva Kunveno de Komunistaj kaj Laboristaj Partioj (18 novembro 1957).

Mi opinias, ke nun la internacia situacio atingis novan turnopunkton. Hodiaŭ en la mondo estas du ventoj: la orienta kaj

okcidenta. Estas ĉina popoldiro: "Aŭ la orienta vento superas la okcidentan, aŭ la okcidenta vento superas la orientan." Mi kredas, ke la karakterizo de la nuna situacio estas, ke la orienta vento superas la okcidentan, tio estas, la socialisma forto havas subigan superecon al la imperiisma forto.

Parolado ĉe la Moskva Kunveno
de Komunistaj kaj Laboristaj
Partioj (18 novembro 1957).

VII. KURAĜI BATALI KAJ KURAĜI VENKI

La popoloj de la tuta mondo unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn! La popoloj de la tuta mondo havu kuraĝon, aŭdacu batali, ne timu malfacilojn kaj marŝu antaŭen unuj sekvante aliajn. Do la mondo nepre apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj estos senescepte ekstermitaj.

“Deklaro por Subteni la Popolon de Kongolando (Leopoldvilo) kontraŭ Usona Agreso” (28 novembro 1964), *Unuiĝu la Popoloj de la Tuta Mondo por Frakasi la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn.*

Surbaze de la marksism-leninisma scienco, la Komunista Partio de Ĉinio klarkape taksis la internacian kaj enlandan situacion, kaj komprenis, ke ĉiuj atakoj de la reakciuloj en- kaj ekster-landaj ne nur devas sed ankaŭ povas esti venkitaj. Kiam aperis sur la ĉielo nigraj nuboj, ni jam indikis, ke tio estas nur fenomeno provizora, kaj ke baldaŭ forpasos la mallumo kaj aperos aŭroro.

“La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj”
(25 decembro 1947), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

En la homa historio, ĉiuj pereontaj reakciaj fortoj ĉiam faras lastan baraktadon kontraŭ la revoluciaj fortoj, kaj ankaŭ iuj revoluciuloj ofte dum iu tempo estas konfuzitaj de tia fenomeno de la malamiko, kiu estas forta en aspekto sed sensuka en la interno, kaj ne povas vidi la esencon ke

la malamiko baldaŭ pereos kaj ili mem baldaŭ venkos.

“La Turnopunkto de la Dua Mondmilito” (12 oktobro 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Se ili [Kuomintango] batalos, ni ekstermos ilin komplete. Tiel estas la afero: se ili atakas kaj ni ekstermas ilin, ili estos kontentaj; iom ekstermas, iom kontentaj; multe ekstermas, multe kontentaj; komplete ekstermas, komplete kontentaj. Problemoj de Ĉinio estas komplikaj, ankaŭ nia cerbo devas esti iom komplika. Se ili atakos, ni batalos, batalos por akiri pacon.

“Pri la Ĉongking-a Intertraktado” (17 oktobro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Se iu ajn atakas nin kaj la kondiĉoj estas favoraj por batali, nia partio certe lin ekstermos firme, ĝisfunde, tute kaj komplete sur la starpunkto de sindefendo (ni ne batalas

senpripense, sed kiam ni batalas, ni devas nepre venki). Ni devas absolute ne esti timigitaj de la terura aspekto de reakciuloj.

“Pri la Paca Traktado kun Kuomintango — Ĉirkulero de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio” (26 aŭgusto 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Laŭ nia propra deziro eĉ unu tagon ni ne volas militi. Sed se la situacio devigos nin militi, ni povos militi ĝisfine.

“Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong” (aŭgusto 1946), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ni volas pacon, sed, se nur la usona imperiismo rifuzas forlasi siajn arogantajn kaj maljustajn postulojn kaj intrigon plivastigi agreson, la firma decido de la ĉina popolo estas nur daŭrigi la batalon kune kun la korea popolo. La kialo ne estas

tio, ke ni estas militemaj. Ni estas volontaj tuj ĉesigi la militon kaj lasi la restintajn problemojn por estonta solvo. Sed la usona imperiismo ne estas volonta tion fari. Do bone, ni batalu plu. Kiom ajn da jaroj la usona imperiismo volas batali, ni estas pretaj batali tiom longe, ĝis kiam ĝi estos volonta ĉesi, ĝis kiam la ĉina popolo kaj korea popolo gajnos kompletan venkon.

Parolado ĉe la Kvara Sesio de la Unua Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco (7 februaro 1953).

Ni devas elimini el niaj propraj vicoj ĉiujn malfortajn kaj senpovajn ideojn. Ĉiuj vidpunktoj, kiuj supertaksas la forton de la malamiko kaj subtaksas tiun de la popolo, estas eraraj.

“La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj” (25 decembro 1947), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj absolute ne povas meti la esperon de sia liberiĝo sur la “prudentecon” de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Nur per plifortigo de sia unuiĝo kaj persistado ĉe la batalo, ili povos gajni la venkon.

“Deklaro por Oponi kontraŭ la Kliko de Usono kaj Ngo Dinh Diem en Ĝia Agresado kaj Buĉado al la Popolo de Suda Vjetnamio” (29 aŭgusto 1963), *Unuiĝu la Popoloj de la Tuta Mondo por Frakasi la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn.*

Ni estu ĉiam bone preparitaj, kiam ajn eksplodos la interna milito tutlanda. Se, frue, komenciĝos ĝi jam morgaŭ matene, ni estas ankaŭ en preparado. Tio estas la unua punkto. La nuna internacia kaj enlanda situacio eble povas portempe lokalizi la internan militon, kaj ĝi povas provizore konsisti nur el militoj kun loka karaktero. Tio estas la dua punkto. Por

la unua punkto ni estas en preparado, la dua jam delonge ekzistas. Unuvorte, ni devas esti preparitaj. Preparite ni povos ĝuste trakti ĉiuspecajn komplikajn situaciojn.

“La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito” (13 aŭgusto 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

VIII. POPOLA MILITO

La revolucia milito estas milito de la amasoj; ĝi povas esti farata nur per mobilizo de la amasoj kaj dank' al ilia apogo.

“Zorgu la Vivon de la Amasoj,
Priatentu Metodojn de Laboro”
(27 januaro 1934), *Elektitaj Verkoj*
de *Mao Zedong*, vol. I.

Kio estas efektiva fera bastiono? Ĝi estas la amasoj, amasoj el milionoj kaj milionoj da homoj, kiuj kore kaj sincere subtenas la revolucion. Tio estas efektiva fera bastiono, nefrakasebla, absolute nefrakasebla per kia ajn forto. La kontraŭ-revolucio ne povas nin frakasi, sed ni frakasos la kontraŭ-revolucion. Unuigante milionojn kaj milionojn da popoloj

ĉirkaŭ la revolucia registaro kaj dĭsvastigante nian revolucion militon, ni ja povos ekstermi ĉion kontraŭrevolucion kaj transpreni la tutan Ĉinion.

“Zorgu la Vivon de la Amasoj, Priatentu Metodojn de Laboro” (27 januaro 1934), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La plej riĉa fonto de povo por fari militon kuŝas en la popolamasoj. Ke Japanio kuraĝas tirani nin, tio okazas ĉefe pro la neorganiziteco de la ĉinaj popolamasoj. Kiam tiu ĉi manko estos forigita, la japanaj agresantoj estos ĉirkaŭataj de nia jam stariginta kelkcentmiliono popolo, kvazaŭ sovaĝa bovo kureganta en ringon de flamoj, nia nura ekkrio teruros ĝin, kaj ĝi estos certe brulmortigita.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La imperiistoj tiel nin tiranas, ke ni devas trakti ilin serioze. Ni devas ne nur havi potencon regulan armeon, sed ankaŭ organizi diviziojn de la popola milico en granda skalo. Tio povas malfaciligi al la imperiistoj movi eĉ unu colon en nia lando en la okazo de ilia invado.

Parolo kun raportisto de la
Hinhua-a Novaĵ-agentejo (29 sep-
tembro 1958).

Konsiderante la revolucion militon laŭ vidpunkto de tuteco, la operacioj de la popularaj gerilanoj kaj tiuj de la ĉefaj fortoj de la Ruĝa Armeo kompletigas unu la alian kvazaŭ dekstra kaj maldekstra brakoj de homo, se ni havus nur la ĉefajn fortojn de la Ruĝa Armeo sen la popularaj gerilanoj, ni estus kvazaŭ generalo kun sola brako. Por diri konkrete, speciale en rilato al militaj operacioj, kiam ni parolas pri la popolo en la bazloko kiel faktoro, tio signi-

fas ke ni havas armitan popolon. En tio kuŝas la ĉefa kaŭzo, kial la malamiko timas proksimiĝi al nia bazloko.

“Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio” (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Sendube, venkon aŭ malvenkon en milito decidas ĉefe la militaj, politikaj, ekonomiaj kaj naturaj kondiĉoj de ambaŭ flankoj. Sed ne nur tiuj. Ĝin decidas ankaŭ la subjektiva kapablo de ambaŭ flankoj en direktado de la milito. Por gajni militon, milita strategiisto ne povas transpasi la limojn altruditajn de materiaj kondiĉoj, tamen li povas kaj devas klopodi por gajni la militon interne de tiuj limoj. La scenejo de agado por milita strategiisto estas konstruita sur objektivaj materiaj kondiĉoj, tamen sur tiu ĉi scenejo li povas direkti la

prezentadon de multaj dramoj plenaj de sono kaj koloro, potenco kaj imponeco.

“Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio” (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La celo de milito estas nenio alia ol “konservi sin kaj ekstermi la malamikojn” (ekstermi la malamikojn signifas malarmi ilin aŭ “senigi ilin je kapablo de rezisto”, sed ne signifas plene ekstermi ilin fizike). En la antikveco oni militis per lanco kaj ŝildo: la lanco por ataki, por ekstermi la malamikojn, dum la ŝildo por defendi, por konservi sin. Ĝis hodiaŭ la armiloj restas ankoraŭ ctendiĝo de la lanco kaj ŝildo. La bombaviadilo, la maŝinpafilo, la longdistanca kanono kaj venena gaso estas disvolviĝo de la lanco, dum la ŝirmejo kontraŭ aeratako, la ŝtala kasko, la betona fortikaĵo kaj la gasmasko estas disvolviĝo de la ŝildo. La tanko estas

nova armilo, kiu kombinas la funkciojn de lanco kaj ŝildo. Atako estas la ĉefa rimedo por ekstermi la malamikojn, sed defendo ankaŭ ne povas esti senigita. Atako estas rekte por ekstermi la malamikojn, kaj samtempe ankaŭ por konservi sin mem, ĉar se oni ne ekstermas la malamikojn, oni mem estos ekstermitaj. Defendo estas rekte por konservi sin mem, sed samtempe ĝi estas ankaŭ rimedo por helpi atakon aŭ prepari sin por transiri en atakon. Retiriĝo apartenas al la kategorio de defendo kaj estas daŭrigo de defendo, dum persekuto estas daŭrigo de atako. Ni devas montri, ke inter la celoj de milito la ekstermo de la malamikoj estas en la unua loko kaj sinkonservo en la dua, ĉar nur per ekstermo de la malamikoj en grandaj nombroj oni povas efike sin konservi. Tial atako, la ĉefa rimedo por ekstermi la malamikojn, estas primara, dum defendo, helpa rimedo por ekstermi la malamikojn kaj rimedo por konservi sin,

estas duavica. En efektiva militado, kvankam la ĉefan rolon ludas defendo en multa tempo dum atako en la resto de la tempo, tamen, se milito estas konsiderata en ĝia tuto, atako restas ankoraŭ primara.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ĉiuj gvidaj principoj de militaj operacioj baziĝas sur la fundamenta principo: fari ĉion eblan por konservi sian propran forton kaj ekstermi tiun de la malamiko. . . . Kiel do ni pravigu la kuraĝigon al heroa sinofero en milito? Ĉiu milito postulas koston, iafoje eĉ grandegan. Ĉu tio ne kontraŭdiras al “sinkonservo”? Fakte sin trovas nenia kontraŭdiro; por diri pli ĝuste, sinofero kaj sinkonservo estas interkontraŭdiraj kaj interkompletigaj unu al la alia. Ĉar tia sinofero estas necesa ne nur por ekstermi la malamikon sed ankaŭ por konservi sin —

parta kaj portempa “nekonservo” (sin-
ofero aŭ pago de kosto) estas necesa por
ĝenerala kaj eterna konservo. De tiu
baza principo devenas serio da principoj
gvidantaj tutajn militajn operaciojn, el
kiuj ĉiuj — de la principoj de pafo (ŝirmo
de la korpo por sinkonservo kaj plena
utiligo de fajropovo por ekstermo de la
malamiko) ĝis la principoj de strategio —
estas senescepte penetritaj per la spirito de
tiu baza principo. Ĉiuj teknikaj principoj
kaj ĉiuj principoj koncernantaj taktikon,
kampanjon kaj strategion prezentas kon-
diĉojn en aplikado de tiu baza principo.
La principo de sinkonservo kaj ekstermo
de la malamiko estas la bazo de ĉiuj militaj
principoj.

“Strategiaj Problemoj en la Kon-
traŭjapana Ĝerila Milito” (majo
1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ
Zedong*, vol. II.

Niaj militaj principoj estas:

(1) Bati unue la malamikajn fortojn disajn kaj izolajn, kaj poste la koncentritajn kaj potencajn.

(2) Preni unue malgrandajn urbojn, mezgrandajn urbojn kaj vastajn kamparojn, kaj poste grandajn urbojn.

(3) Celi ĉefe ekstermon de viva forto de la malamiko, sed ne konservon aŭ prenon de urboj kaj lokoj. La konservo aŭ preno de urboj kaj lokoj estas rezulto de la ekstermo de malamika viva forto, kaj ofte iu urbo aŭ loko povas esti definitive konservata aŭ prenita nur post plurfoja ripetado de transpreno.

(4) Koncentrigi en ĉiu batalo absolute superan forton (duoble, trioble, kvaroble kaj iufoje eĉ kvinoble aŭ sesoble kiom la malamika), sieĝi de ĉiuj flankoj la malamikon kaj strebi al ĝia kompleta ekstermo, lasante neniun parton el ĝi forkuri el la reto. En specialaj cirkonstancoj, apliki la metodon doni al la malamiko frakasan

baton, t.e. koncentrigi nian tutan forton por ataki la fronton kaj unu aŭ ambaŭ alojn de la malamiko, celante ekstermi unu parton de ĝi kaj frakasi alian, por ke niaj trupoj povu rapide translokiĝi por eksterme bati aliajn malamikajn fortojn. Strebi al evito de konsumata batalado en kiu la gajno ne kovras la perdon aŭ la gajno nur egalas al la perdo. Tiamaniere, en la tuto ni troviĝas en malsupera situacio (rilate al kvanto), sed en ĉiu parto, en ĉiu konkreta kampanjo, ni estas en absoluta supereco, kio garantias do al ni la venkon en la kampanjo. Kun la paso de la tempo, ni fariĝos superaj en la tuto, kaj fine ekstermos ĉiujn malamikojn.

(5) Ne entrepreni batalon senpreparan, nek batalon sen certeco pri ĝia venko; strebi al bona prepariĝo en ĉiu batalo, strebi al certeco pri venko en komparo de niaj kondiĉoj kun tiuj de la malamiko.

(6) Disvolvi nian batalstilon — kuraĝo en batalo, maltimo al sinofero, maltimo al

laciĝo kaj kontinua batalado (t.e. entrepreni senripoze sinsekvajn batalojn dum mallonga tempo).

(7) Strebi al ekstermo de la malamiko en movaj operacioj. Samtempe doni atenton al la taktikoj de pozicia atako kaj preni fortikigitajn punktojn kaj urbojn de la malamiko.

(8) Koncerne al atako de urboj, preni senŝanceliĝe ĉiujn fortikigitajn punktojn kaj urbojn de la malamiko malforte defendatajn. Preni en oportuna okazo ĉiujn fortikigitajn punktojn kaj urbojn de la malamiko defendatajn per mezgrada forto, se cirkonstancoj permesas. Kaj por preni la fortikigitajn punktojn kaj urbojn forte defendatajn de la malamiko atendi ĝis tiam, kiam la kondiĉoj estas maturaj.

(9) Replenigi niajn fortojn per ĉiuj armiloj kaj plejparto de la personaro kiujn ni kaptis de la malamiko. La ĉefa fonto de homaj kaj materiaj fortoj de nia armeo sin trovas en la fronto.

(10) Bone utiligi la intervalon inter du kampanjoj por ripozi, fari ideologian edukadon kaj trejnadon en niaj trupoj. La periodo de ripozo, ideologia edukado kaj trejnado ĝenerale ne devas esti tro longa, por laŭeble ne lasi al la malamiko tempon por spiri.

Ĉi tiuj estas la ĉefaj metodoj per kiuj la Popola Liberiga Armeo venkis Ĉiang Kajŝek. Ili rezultiĝis el la hardado de la Popola Liberiga Armeo dum ĝia longdaŭra militado kontraŭ la en- kaj eksterlandaj malamikoj kaj tute konvenas al nia nuna situacio. . . . Niaj strategio kaj taktiko sin bazas sur popola milito; neniu armeo kontraŭpopola povas ilin uzi.

“La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj” (25 decembro 1947),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. IV.

Supereco sen prepariteco ne estas vera supereco, kaj en tia okazo ne povas estiĝi iniciativo. Kun kompreno pri tiu ĉi punkto, armeo malsupera sed preparita ofte povas venki superan malamikon per surprizatako.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

IX. POPOLA ARMEO

Sen popola armeo la popolo havas nenion.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Tiu ĉi armeo estas potenca, ĉar ĉiuj ĝiaj membroj havas memkonscian disciplinon; ili kolektiĝis kaj batalas ne por la privataj interesoj de malmultaj homoj aŭ malvasta grupo, sed por la interesoj de la vastaj popolamasoj kaj la tuta nacio. Firme stari kun la ĉina popolo kaj tutkore, plenanime servi al la ĉina popolo estas la sola celo de tiu ĉi armeo.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La ĉina Ruĝa Armeo estas armita kolektivo por efektiviĝi la politikajn taskojn de la revolucio. Precipe nun, la Ruĝa Armeo certe ne devas limigi sin sole en militado; krom militi por neniiĝi la militan forton de la malamiko, ĝi devas preni sur sin ankaŭ la gravajn taskojn propagandi inter la amasoj, organizi la amasojn, armi ilin, helpi ilin establi revolucionan regpotencon kaj starigi partiajn organizojn. La Ruĝa Armeo militas ne nur por militi sed por propagandi inter la amasoj, organizi ilin, armi ilin kaj helpi ilin establi revolucionan regpotencon. Sen tiuj celoj, milito perdas sian signifon kaj la Ruĝa Armeo perdas la signifon de sia ekzisto.

“Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio” (decembro 1929), *Elektitaj Verkaj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La Popola Liberiga Armeo ĉiam estas batalanta trupo. Eĉ post la venko tra la tuta lando, dum la historia periodo en kiu

la klasoj ankoraŭ ne malaperos enlande kaj la imperiisma sistemo ankoraŭ ekzistos en la mondo, nia armeo restos batalanta trupo. Pri tiu ĉi punkto devas troviĝi neniu ajn miskompreno aŭ ŝanceliĝo.

“Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio” (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ni havas armeon por batalo kaj ankaŭ armeon por laboro. Por batalo ni havas la Oka-vojan Armeon kaj Novan Kvaran Armeon; ankaŭ ili devas esti uzataj duoble: en batalo kaj produktado. Havante tiujn du specojn de armeoj kaj la batalan armeon lertan en la du taskoj, kaj plue ankaŭ lertan en amasa laboro, ni povas do venki niajn malfacilojn kaj frakasi la japanan imperiismon.

“Organiziĝu!” (29 novembro 1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Nia nacia defendo estos firmigita kaj neniuj ajn imperiismo estos permesata denove invadi nian teritorion. Niaj popolaj armistaj fortoj devas esti konservataj kaj disvolvataj kun la brava kaj hardita Popola Liberiga Armeo kiel sia fundamento. Ni havas ne nur potencon terarmeon, sed ankaŭ potencon aerarmeon kaj potencon mararmeon.

Inaŭgura parolado en la Unua Plena Sesio de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco (21 septembro 1949).

Nia principo estas tio, ke la Partio komandas la pafilon, kaj la pafilo devas neniam esti permesata komandi la Partion.

“Problemoj de Milito kaj Strategio” (6 novembro 1938), *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, vol. II.

Ĉiuj oficiroj kaj soldatoj de nia armeo devas bone memori konstante, ke ni estas

granda Popola Liberiga Armeo kaj ni estas la trupoj gvidataj de la granda Komunista Partio de Ĉinio. Se ni nur konstante observas la direktivojn de la Partio, ni certe venkos.

“Manifesto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo” (oktobro 1947),
Elektitaj Verkoj de Mao Zedong,
vol. IV.

X. GVIDO DE PARTIA KOMITATO

La sistemo de partia komitato estas grava sistemo en la Partio por garantii kolektivitan gvidadon kaj preventi individuan monopolon en kondukado de aferoj. Lastatempe estas trovite, ke en kelkaj gvidantaj instancoj (kompreneble, ne ĉiuj) estas tre forta la kutimo de individua monopolo en kondukado de aferoj kaj individua decidado de gravaj problemoj. Solvoj de gravaj problemoj estas deciditaj ne de kunsidoj de partia komitato sed de individuo, kaj la membroj en la partia komitato fakte fariĝis nominalaj. Diferencoj de opinio inter komitatanoj ne povas esti solvitaj kaj estas lasitaj ne solvitaj por longa tempo. Membroj de partia komitato kon-

servas inter si nur formalan, sed ne realan unuecon. Tia situacio devas esti ŝanĝita. Ekde nun, perfekta sistemo de kunsidoj de partia komitato devas esti starigita en ĉiuj gvidantaj instancoj: de la regionaj burooj de la Centra Komitato ĝis la lokaj komitatoj de la Partio, de la ĉeffrontaj partiaj komitatoj ĝis la brigadaj partiaj komitatoj, kaj milit-regionaj partiaj komitatoj (subkomisionoj de la Revolucia Milita Komisiono de CK de KPCĈ aŭ gvidantaj grupoj) kaj partigrupoj de gvidantoj en registaraj instancoj, popolaj organizoj, novaĝ-agentejoj kaj ĵurnalejoj. Ĉiuj gravaj problemoj (kompreneble, ne la malgravaj, bagatelaj problemoj, aŭ tiuj problemoj, kiuj estas jam solvitaj post diskutado en kunsidoj kaj restas nur plenumotaj) devas esti submetataj al la komitato por diskutado kaj la ĉeestantaj komitatanoj devas plenplene esprimi siajn opiniojn kaj fari difinitajn decidojn, kiuj devas esti plenumataj poste de la koncernaj komitatanoj. . . . Kunsidoj

de partia komitato devas esti dividitaj en du kategoriojn, kunsidoj de konstanta komitato kaj plenaj kunsidoj, kaj la du ne devas esti kunmiksitaj. Krome, ni ankaŭ devas atenti, ke nek kolektiva gvidado nek persona respondeco devas esti tro emfazita ĝis neglekto de la alia. En la armeo la persono en komando havas la rajton fari urĝajn decidojn dum batalo kaj kiam cir- konstancoj tion postulas.

“Pri Plifortigo de la Sistemo de Partia Komitato” (20 septembro 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La sekretario de partia komitato devas bone funkcii kiel “subplotona estro”. Partia komitato konsistas el dek ĝis dudek membroj; ĝi similas al subplotono en armeo kaj la sekretario similas al la “subplotona estro”. Estas vere ne facile estri bone tiun ĉi subplotonon. Nun ĉiu regiona buroo aŭ filia buroo de la Centra Komi-

tato gvidas tre vastan areon kaj portas sur si tre multajn kaj pezajn taskojn. La gvida laboro signifas ne nur decidi ĝeneralajn kaj specifajn politikojn sed ankaŭ ellabori ĝustajn labormetodojn. Eĉ kun ĝustaj ĝeneralaj kaj specifaj politikoj ankaŭ povas aperi problemoj, se labormetodoj estas neglektitaj. Por plenumi sian gvidan taskon, partia komitato devas nepre apogi sin sur siaj "subplotonaj membroj" kaj igi ilin plene ludi sian rolon. Por esti bona "subplotona estro", la sekretario devas tre bone lerni kaj esplori. Sekretario aŭ vicsekretario certe ne povas bone direkti sian "subplotonon", se li ne atente faras propagandajn kaj organizajn laborojn inter siaj "subplotonaj membroj", ne bone tenas siajn rilatojn kun la komitatanoj, aŭ ne studas kiel okazigi kunsidojn plensukcese. Se tiuj "subplotonaj membroj" ne agas unuanime, estas neatendeble ke ili povos direkti milionojn da homoj en batalado kaj konstruado. Komprenoble, la rilato

inter la sekretario kaj la komitatanoj estas tio, ke la malplimulto devas obei la plimulton, tial ĝi estas diferenca de la rilato inter subplotona estro kaj liaj batalantoj. Ĉi tie ni parolas nur analogie.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Metu problemojn sur la tablon. Ne nur la “subplotona estro” sed ankaŭ la komitatanoj devas tiel fari. Ne parolu post alies dorso. Kiam leviĝis problemoj, kunvoku kunsidon, metu la problemojn sur la tablon por diskuti, faru kelkajn decidojn, kaj la problemoj estos solvitaj. Se problemoj ekzistas kaj ne estas metitaj sur la tablon, ili restos ne solvitaj dum longa tempo kaj eĉ estos prokrastataj kelkajn jarojn. La “subplotona estro” kaj la komitatanoj devas esti ankaŭ kompreniĝemaj unu al alia. Nenio estas pli grava ol reciproka kompreniĝo, reciproka subtenado

kaj amikeco inter la sekretario kaj komitato-
tanoj, inter la Centra Komitato kaj ĝiaj
regionaj burooj kaj inter la regionaj burooj
kaj la regionaj partiaj komitatoj.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

“Interŝanĝi informojn”. Tio signifas, ke membroj de partia komitato devas reciproke sciigi unu al alia konstatitajn aferojn kaj ŝanĝi inter si informojn. Tio estas tre grava por ekhavi komunan lingvon. Iuj ne agas tiel, sed kiel diris Laŭ Zi, “neniam vizitas unu alian dum la tuta vivo, kvankam la kriado de iliaj kokoj kaj la bojado de iliaj hundoj estas bone aŭdeblaj reciproke”. Rezulte mankas inter ili komuna lingvo.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Demandu viajn subulojn pri aferoj, kiujn vi ne komprenas aŭ ne konas, kaj ne facile esprimu vian aprobon aŭ malaprobbon. . . . Ni devas neniam pretendi ke ni konas kion ni fakte ne konas, kaj devas "ne honti fari demandojn al homoj de malsuperaj tavoloj" kaj bone aŭskulti la opiniojn de la kadroj de malsuperaj niveloj. Estu lernanto unue kaj poste instruanto; lernu unue de la kadroj de malsuperaj niveloj kaj poste faru ordonojn. . . . Inter la opinioj de la kadroj de malsuperaj niveloj, iuj estas ĝustaj kaj aliaj ne; aŭdinte ilin ni devas fari analizon. Ni devas nepre aŭskulti la ĝustajn opiniojn kaj agi laŭ ili. . . . Ankaŭ la malĝustajn opiniojn venantajn de malsupre ni devas aŭskulti; estas erare tute ne aŭskulti ilin. Tamen ni ne agu laŭ tiuj opinioj, sed faru kritikojn al ili.

"Labormetodoj de Partia Komitato" (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ellernu "pianludon". En pianludado oni devas movi ĉiujn dek fingrojn sed ne nur kelkajn sen movo de la aliaj. Sed, se ĉiuj dek fingroj ekpremas samtempe, tio ankaŭ ne donas melodion. Por doni bonan muzikaĵon, la dek fingroj devas moviĝi laŭritme kaj kunordigite. Partia komitato devas firme preni la centran taskon kaj samtempe, ĉirkaŭ la centra tasko, ĝi devas ankaŭ disvolvi la laborojn en diversaj flankoj. Nun ni direktas aferojn en multaj flankoj; ni devas prizorgi la laborojn en ĉiuj diversaj lokoj, armeaj unuoj kaj departementoj sed ne turni nian atenton nur al kelkaj problemoj, preteratentante la aliajn. Kie estas problemoj, tien ni devas ektuŝi per nia fingro, kaj tio estas metodo, kiun ni devas nepre ellerni. Iuj ludas la pianon bone dum aliaj ne, estas granda diferenco inter la melodioj, kiujn ili ludas. Membroj

de partia komitato devas bone ellerni “pianludon”.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

“Prenu firme”. Tio signifas, ke partia komitato ne nur devas nepre “preni” sed ankaŭ “preni firme” siajn ĉefajn laborojn. Oni sukcesas preni ion ajn, nur kiam ĝi estas firme prenita sen iometa malstreĉiĝo. Preni ion ne firme egalas al preni nenion entute. Nature, oni povas preni nenion kun malfermita mano. Eĉ kiam la mano estas fermita, ŝajne prenanta ion, sed ne firme, ĝi tamen povas preni nenion. Iuj el niaj kamaradoj ankaŭ prenas la ĉefajn laborojn, sed ne firme, sekve ili ankoraŭ ne povas sukcese plenumi siajn laborojn. Estas ne permeseble tute ne preni, kaj estas ankaŭ ne permeseble preni ne firme.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Havu "ciferojn" en la kapo. Tio signifas, ke ni nepre devas atenti la kvantan flankon de situacio aŭ problemo kaj fari bazan analizon pri kvanto. Ĉiu kvalito sin manifestas en certa kvanto, kaj sen kvanto forestas ankaŭ kvalito. Ĝis nun multaj el niaj kamaradoj ankoraŭ ne scias atenti la kvantan flankon de aferoj, la bazajn statistikojn kaj la ĉefajn procentojn, kaj la kvantaj limojn kiuj determinas la kvalitojn de aferoj; ili havas neniajn "ciferojn" en la kapo kaj rezulte ne povas ne fari erarojn.

"Labormetodoj de Partia Komitato" (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

"Anonco por certigi la publikon". Anonco de kunvenoj devas esti donita antaŭtempe, same kiel "anonco por certigi la publikon", por ke ĉiuj sciu kio estas diskutota kaj kiuj problemoj estas solvotaj, kaj ĉiuj povu antaŭtempe prepari sin. En iuj lokoj, kunsidoj de kadroj estas kunvoki-

taj sen antaŭa preparo de raportoj kaj projektoj de rezolucioj, kiuj estas improvizitaj nur kiam la ĉeestantoj estas jam alvenintaj; tio similas al la diraĵo “trupoj kaj ĉevaloj jam alvenis, sed greno kaj furaĝo ankoraŭ mankas”, kaj tio estas ne bona. Ne hastu por okazigi kunvenon, se la antaŭpreparoj ne estas pretaj.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

“Bonkvalitigi la armeon kaj simpligi la administradon”. Paroloj, paroladoj, artikoloj kaj rezolucioj ĉiuj devas esti koncizaj kaj esencdiraj. Ankaŭ ne tro longe daŭru kunvenoj.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Atentu pri unuiĝo kun tiuj kamaradoj, kiuj ne samopinias kun vi, por kune labori.

Tio estas atentenda tiel en la lokaj laboroj kiel en la armeaj laboroj. Same ankaŭ en la rilato kun personoj ekster la Partio. Ni ĉiuj kolektiĝis el plej diversaj lokoj de nia lando, ni devas bone unuiĝi en nia laboro ne nur kun tiuj kamaradoj, kiuj samopinias kun ni, sed ankaŭ kun tiuj, kiuj ne samopinias kun ni.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Severe gardu vin kontraŭ aroganteco. Por ĉiu en gvidpozicio, tio estas problemo de principo kaj ankaŭ grava kondiĉo por konservi unuiĝon. Eĉ tiuj, kiuj faris nenion seriozan eraron kaj akiris tre grandan sukceson en siaj laboroj, devas ankaŭ ne aroganti.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Klare streku du limliniojn. Unue, distingu: Ĉu estas revolucio aŭ kontraŭ-revolucio? Ĉu estas Jan-an aŭ Hi-an? Iuj ne scias ke ili devas klare streki tiun limlinion. Ekzemple, kiam ili batalas kontraŭ burokratismo, ili parolas pri Jan-an kvazaŭ tie "nenio estas bona" ne farante komparon kaj distingon inter la burokratismo en Jan-an kaj tiu en Hi-an. Tio estas defundamente erara. Due, interne de la revolucia vicaro, estas necese streki klaran limlinion inter pravo kaj eraro, inter atingoj kaj mankoj, kaj plie igi klara kiu el la du estas ĉefa kaj kiu malĉefa. Ekzemple, ĉu la atingoj sumiĝas 30 procentojn aŭ 70 procentojn de la tuto? Ne troigu nek maltroigu. Ni devas havi fundamentan takson pri ies laboro: ĉu liaj atingoj sumiĝas 30 procentojn dum liaj eraroj sumiĝas 70 procentojn, aŭ inverse. Se liaj atingoj sumiĝas 70 procentojn de la tuto, tiam lia laboro devas esti plejparte jesigita. Estas tute erare prezenti laboron, en kiu la atingoj estas ĉefaj, kiel

laboron, en kiu la eraroj estas ĉefaj. Traktante problemojn, ni nepre ne forgesu streki tiujn du limliniojn inter revolucio kaj kontraŭrevolucio kaj inter atingoj kaj mankoj. Tenante tiujn du limliniojn en la kapo, ni povas bone pritrakti aferojn, alie ni konfuzos la naturon de la problemoj. Kompreneble, por klare streki limliniojn estas necese fari detalan pristudon kaj analizon. Al ĉiu persono kaj ĉiu afero nia sinteno devas esti tiu de analizo kaj pristudo.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Organize garantiu demokration sub centralizita gvido. Ĝiaj linioj estas:

(1) Por establi gvidajn centrojn, la gvidantaj organoj de la Partio devas havi ĝustan gvidlinion kaj trovi rimedojn por solvi problemojn kiam ili aperas.

(2) La pli altaj organoj devas koni la situacion de la pli malaltaj organoj kaj la

vivkondiĉojn de la amasoj por havi objektivan bazon de ĝusta gvidado.

(3) Partiaj organoj de ĉiuj niveloj ne devas fari facilanimajn decidojn en solvado de problemoj. Kiam decido estas farita, ĝi devas esti firme plenumita.

(4) Ĉiuj pli malpli gravaj decidoj faritaj de la pli altaj organoj de la Partio devas esti rapide komunikitaj al la pli malaltaj organoj kaj la partianaj amasoj. . . .

(5) La pli malaltaj organoj de la Partio kaj la partianaj amasoj devas detale diskuti la instrukciojn de la pli altaj organoj por plene kompreni ilian signifon kaj decidi la metodojn de ilia efektivigo.

“Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio” (decembro 1929), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

XI. LA AMASA LINIO

La popolo, nur la popolo, estas la movforto kreanta la mondan historion.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La amaso estas vera heroo, dum ni mem estas ofte infanece ridindaj, kaj sen kompreno pri tio ni ne povas akiri eĉ rudimentajn sciojn.

“Antaŭparolo kaj Postskribo al *Kamparaj Enketoj*” (marto kaj aprilo 1941), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La popolamasoj posedas senliman kreaŭ povon. Ili povas organizi sin kaj marŝi

al ĉiuj lokoj kaj fakoj, kie ili povas disvolvi siajn fortojn kaj marŝi al la profundeco kaj vasteco de la produktado por krei al si pli kaj pli multe da bonstatigaj aferoj.

Enkonduka noto al "Superflua Laborforto Jam Trovis Elirejon" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kampano*, vol. II.

La nuna leviĝo de la kamparana movado estas grandega evento. En tre mallonga tempo, centmilionoj da kamparanoj leviĝos en la provincoj de centra, suda kaj norda Ĉinio, kvazaŭ uragano kaj pluvego kun impeto tiel rapidega kaj fortega, ke neniu forto povos ilin reteni. Kuregante al la vojo de liberiĝo, ili disŝiros ĉion, kio katenas ilin. Ili entombigos ĉiujn imperiistojn, militaristojn, koruptiĝintajn oficistojn, lokajn tiranojn kaj malbonajn sinjorojn. Ili ekzamenos ĉiun revolucionan partion kaj ĉiun revolucionan kamaradon kaj decidus kiun akcepti kaj kiun forĵeti. Ĉu stari ĉe ilia

fronto kaj konduki ilin? Aŭ stari post ili kaj kritiki ilin gestante? Aŭ stari kontraŭ ili kaj opozicii ilin? Ĉiu ĉino havas liberon elekti unu el tiuj tri vojoj, sed la situacio devigas vin fari elekton rapide.

“Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan” (marto 1927), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Nuntempe la alttajo de kooperiga socia transformado en la kamparo jam alvenis en iuj lokoj kaj baldaŭ alvenos en la tuta lando. Tio estas grandskala socialisma revolucia movado de pli ol kvincent milionoj da kamparaj loĝantoj, kaj ĝi havas ekstreme grandan mondan signifon. Ni devas doni al tiu movado aktivan, entuziasman kaj sisteman gvidadon, sed ne treni ĝin malantaŭen per diversaj rimedoj. Iuj eraroj estas neeviteblaj en la movado; tio estas komprenebla, kaj ili ne estas malfacile korekteblaj. Mankoj aŭ eraroj trovitaj

ĉe la kadroj kaj kamparanoj povas esti venkitaj aŭ korektitaj, kondiĉe ke ni donas al ili pozitivan helpon.

*Pri la Problemo de Agrikultura
Kooperigo (31 julio 1955).*

Ĉe la amasoj latentas treege granda socialisma entuziasmo. Tiuj homoj, kiuj dum revolucia periodo faras siajn paŝojn nur laŭ rutinoj, tute ne povas vidi tiun entuziasmon. Ili estas blinduloj, antaŭ ili aperas nur mallumo. Kelkfoje, ili absurdigas eĉ ĝis grado inversigi pravon kaj malpravon kaj miksi blankon kaj nigron. Ĉu tiajn homojn ni renkontis ankoraŭ malmulte? Tiuj irantaj nur laŭ rutinoj ĉiam troe subtaksas la entuziasmon de la popolo. Kiam aperas nova afero, ili kutime ne aprobas kaj antaŭ ĉio kontraŭstaras ĝin. Poste ili rekonas sian malpravon kaj faras iomete da memkritiko. Kiam aperas dua nova afero, ili ree per tiuj du sintenoj faras rondiron. Kaj poste kiam aperas

ĉiu nova afero, ili ĉiam traktas ĝin laŭ tiu formulo. Tiaj homoj ĉiam estas pasivaj kaj haltas en kriza momento, kaj ĉiam bezonas ke aliaj donu al ili fortan frapon je la dorso por fari unu paŝon antaŭen.

Enkonduka noto al "Post Du Jaroj Tiu Subdistrikto Jam Kooperiĝis" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo*, vol. II.

De pli ol dudek jaroj nia partio ĉiutage sin okupas pri amasa laboro kaj de la lastaj pli ol dek jaroj ni ĉiutage parolas pri la amasa linio. Ni ĉiam asertas, ke la revolucio devas apogi sin sur la popolamasoj kaj ĉies partopreno en la afero, kaj oponas sinapogon nur sur malmultaj personoj, kiuj disdonas ordonojn. Sed ĝis nun iuj kamaradoj ankoraŭ ne povas efektiviĝi la amasan linion en siaj laboroj; ili ankoraŭ sin apogas sole al senbrua kaj kvieta laborado de malmultaj personoj. Unu el la kaŭzoj estas tio, ke ion farante, ili neniam volas

klarigi ĝin al la homoj, kiujn ili gvidas, kaj ne scias disvolvi ilian iniciativon kaj kreaĵon energion. Subjektive ili ankaŭ deziras ke ĉiuj movu siajn manojn en la laboro, sed ili ne sciigas al aliaj, kian aferon ĉi tiuj faros kaj kiamaniere ĝin faru. En tia kazo, kiel la aliaj povas sin movi kaj kiel la afero povas esti perfekte farita? Por solvi tiun problemon la baza metodo estas, kompreneble, fari ideologian edukadon pri la amasa linio, kaj samtempe ni devas ankaŭ instrui al tiuj kamaradoj multajn konkretajn labormetodojn.

“Parolo al la Redakcia Personaro de *Sanbi-Sujjuan-a Ĵurnalo*” (2 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. IV.

Nia sperto de dudek kvar jaroj diras al ni, ke ĉiu korekta tasko, politiko aŭ laborstilo konformas al la postulo de la tiutempaj kaj tiulokaj amasoj kaj interligiĝas kun la amasoj; ĉiu erara tasko, politiko aŭ labor-

stilo ne konformas al la postulo de la tiutempaj kaj tiulokaj amasoj kaj apartiĝas de la amasoj. Tiaj difektoj kiaj dogmismo, empirismo, ordonismo, vostismo, sektismo, burokratismo kaj aroganta sinteno en laboro estas absolute malutilaj kaj ne tolerblaj, kaj se iu ajn havas tiajn difektojn, li nepre devas ilin korekti, ĝuste pro tio, ke ili apartigas lin de la amasoj.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Se oni volas ligi sin kun la amasoj, oni devas agi konforme al la bezonoj kaj deziroj de la amasoj. Ĉiu laboro por la amasoj devas eliri el iliaj bezonoj kaj ne el ajna bonintenca deziro de individuo. Ofte okazas ke kvankam objekte la amasoj bezonas ian reformon, tamen subjektive ili ankoraŭ ne havas tian konscion, ankoraŭ ne decidis kaj ankoraŭ ne volas fari la reformon. En tiaj okazoj, ni devas atendi pacience.

Kaj ni povos efektiviĝi tian reformon nur en la tempo, kiam la plimulto de la amasoj, post nia laborado, ekhavis la konscion kaj decidon, kaj mem volas efektiviĝi ĝin. Alie, ni izolos nin de la amasoj. Sen la memkonscio kaj propra volo de la amasoj, ĉiu laboro, kiu bezonas la partoprenon de la amasoj, restos nur formalajo kaj malsukcesos. . . . Estas du principoj ĉi tie: la unua estas la efektivaj bezonoj de la amasoj, sed ne tiuj fabrikitaj el nia fantazio; kaj la alia estas la memvolo de la amasoj, kiuj devas mem fari la decidon, sed ne ni anstataŭ ili.

“La Unuecfronto en Kultura Laboro” (30 oktobro 1944), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Nia kongreso devas alvoki la tutan Partion esti singardema kaj atenti ke neniuj kamaradoj ĉe ajna labora ĉenero disiĝu de la amasoj. Ĝi devas eduki ĉiun kamaradon ami la popolamasojn kaj zorgeme aŭ-

skulti la voĉon de la amasoj; kuniĝi kun la amasoj tie kien ajn li iras, mergi sin inter ili anstataŭ meti sin super ili; kaj surbaze de ilia konscia nivelo inspiri kaj levi ilian politikan konscion, helpi ilin paŝopostpaŝe organiziĝi laŭ la principo de volonteco kaj disvolvi ĉiujn necesajn batalojn permeseblajn de la internaj kaj eksteraj cirkonstancoj de la difinitaj tempo kaj loko.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Se ni provas fari ofensivon, kiam la amasoj estas ankoraŭ ne vekigintaj, tio estas aventurismo. Se ni insistas gvidi la amasojn fari kion ili ne volas, ni certe malsukcesos. Se ni ne antaŭenmarŝas, kiam la amasoj tion postulas, tio estas dekstrema oportunismo.

“Parolo al la Redakcia Personaro de *Sanbi-Sujjuan-a Ĵurnalo*” (2 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ordonismo estas erara en ĉia ajn laboro, ĉar superante la nivelon de politika konscio de la amasoj kaj malobservante la principon de volonteco de la amasoj, ĝi spegulas la malsanon de malpacienco. Niaj kamaradoj ne devas opinii, ke ĉio kion ili mem komprenas estas komprenata ankaŭ de la vastaj amasoj. Ĉu la amasoj jam komprenas, kaj ĉu ili volas ekagi, tion oni povas scii nur per esploro inter la amasoj. Se ni tiel agas, ni povas eviti ordonisman. Ankaŭ vostismo estas erara en ĉiu ajn laboro, ĉar falinte sub la nivelon de politika konscio de la amasoj kaj malobservante la principon gvidi la amasojn marŝi paŝon antaŭen, ĝi spegulas la malsanon de malrapidemo. Niaj kamaradoj ne devas opinii, ke ĉio kion ili mem ankoraŭ ne komprenas estas ne komprenata ankaŭ de la amasoj. Ofte okazas, ke la vastaj amasoj antaŭkuras nin kaj urĝe bezonas marŝi paŝon antaŭen, dum niaj kamaradoj ne kapablas agi kiel gvidantoj de la vastaj amasoj, sed male,

treniĝas kiel vostoĵ de iuj postrestantaj elementoj, spegulante iliajn opiniojn, kaj eĉ misprenante ilin kiel tiujn de la vastaj amasoj.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Koncentri la ideojn de la amasoj, poste iri al la amasoj kaj persiste efektiviĝi ilin, por formi korektajn ideojn de gvidado — tio estas la fundamenta metodo de gvidado.

“Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado” (1 junio 1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

En ĉiuj praktikaj laboroj de nia partio, la korekta gvidado devas esti “el la amasoj kaj en la amasojn”. Tio signifas: preni la ideojn de la amasoj (disajn kaj nesistemigitajn ideojn), koncentri ilin (per studo turni ilin en koncentritajn kaj sistemigitajn

ideojn), poste iri al la amasoj kaj propagandi kaj klarigi tiujn ideojn, ĝis la amasoj prenas ilin kiel la siajn, por ke la amasoj persistu je tiuj ideoj kaj efektivigu ilin en agado, kaj krome ekzameni la korektecon de tiuj ideoj en la agado de la amasoj. Tiam denove koncentru la ideojn de la amasoj kaj denove iru al la amasoj por persiste efektivigi ilin. Agu tiamaniere, ree kaj ree, tute senfine, kaj la ideoj ĉiufoje fariĝas pli korektaj, pli vivaj kaj pli riĉaj. Tia estas marksisma teorio de konado.

“Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado” (1 junio 1943),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. III.

Ni devas iri inter la amasojn, lerni de ili, sintezi iliajn spertojn en pli bonajn, laŭsistemajn principojn kaj metodojn, poste sciigi tiujn al la amasoj (propagandi) kaj alvoki ilin praktiki tiujn principojn kaj

metodojn por solvi siajn problemojn kaj akiri liberiĝon kaj feliĉon.

“Organiziĝu!” (29 novembro 1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

En niaj gvidantaj organoj en kelkaj lokoj sin trovas personoj, kiuj opinias sufiĉa tion ke sole la gvidantoj konu la politikojn de la Partio, kaj ke ne necesas ke ankaŭ la amasoj konu ilin. Tio estas unu el la bazaj kaŭzoj, kial iuj el niaj laboroj ne povas esti bone faritaj.

“Parolo al la Redakcia Personaro de *Sanhi-Sujjuan-a Ĵurnalo*” (2 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

En ĉiu ajn amasa movado, estas necese fari bazajn enketon kaj analizon pri la nombroj de aktivaj subtenantoj, oponentoj

kaj neŭtraluloj, kaj oni ne devas decidi problemojn senbaze kaj subjektive.

“Labormetodoj de Partia Komitato” (13 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La amasoj en ĉiu ajn loko ĝenerale konsistas el tri partoj, la relative aktivaj, la mezaj kaj la relative postrestintaj. Tial la gvidantoj devas esti lertaj unuigi malgrandan nombron da aktivaj elementoj ĉirkaŭ si por formi gvidantan skeleton kaj apogi sin sur ĝi por altigi la konscion de la mezaj elementoj kaj gajni la postrestintajn elementojn.

“Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado” (1 junio 1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Scii bone transformi la partian politikon en agadon de la amasoj, scii bone igi ne nur la gvidantajn kadrojn sed ankaŭ la vastajn amasojn kompreni kaj manipuli

ĉiun movadon kaj ĉiun batalon kiujn ni lanĉis — tio estas arto de marksism-leninisma gvidado. Tio estas ankaŭ la dividlinio por determini ĉu ni faras erarojn aŭ ne en nia laboro.

“Parolo al la Redakcia Personaro de *Sanbi-Sujjuan-a Ĵurnalo*” (2 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Kiom ajn aktiva estas la gvidskeleto, tiu aktiveco fariĝos senfrukta penado de malmultaj personoj, se ĝi ne estas kombinita kun la aktiveco de la vastaj amasoj. Aliflanke, se la vastaj amasoj solaj estas aktivaj sen forta gvidskeleto por konvene organizi ilian aktivecon, tiu aktiveco ne povas esti longdaŭra, nek iri en ĝusta direkto kaj leviĝi al alta nivelo.

“Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado” (1 junio 1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La produktado de la amasoj, la interesoj de la amasoj, la spertoj kaj humoro de la amasoj — al ĉiuj tiuj la gvidantaj kadroj devas doni konstantan atenton.

Surskribo por produkta ekspozicio de organizoj rekte sub la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĝia Revolucia Milita Komisiono, *Liberiga Ĵurnalo* de Janan, 24 novembro 1943.

Ni devas profunde atenti pri la ĉiutaga vivo de la amasoj, de la problemoj de tero kaj laboro ĝis tiuj de brulaĵo, rizo, oleo kaj salo. . . . Ĉiuj ĉi tiuj problemoj koncernantaj la vivon de la amasoj devas trovi sian lokon en nia tagordo. Ni devas pridiskuti ilin, fari decidojn, efektiviĝi tiujn decidojn kaj kontroli la plenumadon. Ni devas igi la vastajn amasojn kompreni, ke ni reprezentas iliajn interesojn kaj nia vivo estas intime ligita kun la ilia. Kaj ni devas igi ilin kompreni el tio la plialtajn

taskojn de ni elmetitajn, la taskojn de la revolucia milito, por ke ili subtenu la revolucion, disetendu la revolucion al la tuta lando, akceptu niajn politikajn alvokojn kaj luktu ĝis la fino por la venko de la revolucio.

“Zorgu la Vivon de la Amasoj,
Priatentu Metodojn de Laboro”
(27 januaro 1934), *Elektitaj-Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. I.

XII. POLITIKA LABORO

Tiam (t.e. dum la periodo de la Unua Enlanda Revolucia Milito, 1924-1927 — *Red.*) estis starigitaj en la armeo partiaj reprezentantoj kaj politikaj departementoj, tiu sistemo estis senprecedenca en la ĉina historio kaj dank' al ĝi la fizionomio de la armeo estis tute ŝanĝita. La Ruĝa Armeo de post 1927 kaj nun la Oka-voja Armeo heredis tiun sistemon kaj disvolvis ĝin.

“Interparolo kun Brita Ĵurnalisto James Bertram” (25 oktobro 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Surbaze de popola milito, surbaze de la principoj de solidareco inter la armeo kaj la popolo, de solidareco inter la komandan-

toj kaj batalantoj kaj de malkomponado de la malamikaj trupoj, la Popola Liberiga Armeo starigis sian fortan revolucion politikan laboron, kiu estas grava faktoro de nia venko super la malamiko.

“La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj” (25 decembro 1947), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Tiu ĉi armeo starigis sistemon de politika laboro bezonatan de la popola milito, kies tasko estas batali por la unuiĝo de nia armeo, unuiĝo kun amika armeo kaj unuiĝo kun la popolo, por dispecigo de la malamika armeo kaj por garantio de venko en batalo.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia laboro. Precipe estas tiel en perio-

do, kiam okazas radikala ŝanĝiĝo en la sociekonomia sistemo.

Enkonduka noto al "Serioza Leciono" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo*, vol. I.

"La partia filio estas organizita sur la bazo de roto"; tio estas unu el la gravaj kaŭzoj, kial la Ruĝa Armeo povis daŭrigi sian penigan batalon sen disfalo.

"La Batalo en Ginggang-montaro" (25 novembro 1928), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Estas tri bazaj principoj en la politika laboro de la Oka-voja Armeo, nome: Unue, la principo de unueco inter oficiroj kaj soldatoj, kiu signifas plenan eliminon de feŭdismo en la armeo, abolon de la sistemo de bato kaj insulto, starigon de konscia disciplino kaj interdividon de ĝojo kaj sufero — kiel rezulto de tio la tuta armeo

estas en plena unuiĝo. Due, la principo de unueco inter la armeo kaj la popolo, kiu signifas teni disciplinon, kiu malpermesas ĉian plej etan malrespekton kontraŭ la interesoj de la popolo, fari propagandon inter la popolamasoj, organizi kaj armi ilin, redukti iliajn ekonomiajn ŝarĝojn kaj frakasi la naciperfidulojn, kiuj faras malutilaĵon kontraŭ la armeo kaj la popolo — kiel rezulto de tio la armeo intime unuiĝis kun la popolo kaj estas ĉie bonvenigata de ĝi. Tria, la principo de malkomponado de la malamikaj trupoj kaj malsevera traktado de militkaptitoj. Nia venko dependas ne nur de niaj militaj operacioj sed ankaŭ de la malkomponado de la malamikaj trupoj.

“Interparolo kun Brita Ĵurnalisto James Bertram” (25 oktobro 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Nia armeo devas observi la ĝustajn principojn kaj absolute ne fari erarojn de mili-

tarismo en la rilatoj inter la armeo kaj popolo, inter la armeo kaj registaro, inter la armeo kaj Partio, inter oficiroj kaj soldatoj, inter militaj kaj politikaj laboroj, kaj inter kadroj. Oficiroj devas zorgi soldatojn kaj ne devas esti indiferentaj pri ili aŭ alpreni korpan punon; la armeo devas zorgi la popolon kaj ne damaĝi ĝiajn interesojn; la armeo devas respekti la registaron kaj Partion kaj ne pretendi pri sendependeco.

“Organiziĝu!” (29 novembro 1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Devas esti sendiference aplikata la politiko de liberigo al ĉiuj militkaptitoj el la japanaj, pupaj kaj kontraŭkomunistaj trupoj, escepte de tiuj kiuj estas malamegataj de la amasoj, nepre ekzekutendaj kaj cetere la mortkondamno estas sankciita de la supera aŭtoritatoj. Inter ili, kiuj estis devige rekrutigitaj

kaj havas pli malpli inklinon al revolucio, devas esti grandnombre gajnataj por servi al nia armeo, kaj la aliaj devas esti senescepte liberigitaj. Se ili ree venas, ili estu ree liberigitaj post rekapto. Ne insultu la militkaptitojn, nek traserĉu iliajn personajn havaĵojn, ne postulu sindenuncon, sed senescepte traktu ilin ĉiujn en sinteno sincera kaj afabla. Al ĉiuj, tute egale, kiel ajn reakciaj ili estas, apliku tiun politikon. Tio estas treege efika rimedo por izoli la reakcian tendaron.

“Pri Politiko” (25 decembro 1940),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. II.

Armiloj estas grava faktoro en milito, sed ne la decida faktoro; tio, kio decidas, estas homoj sed ne objektoj. La konkuro de fortoj estas ne nur konkuro de militaj kaj ekonomiaj fortoj, sed ankaŭ tiu de la forto kaj animo de homoj. Militaj kaj

ekonomiaj fortoj estas necese manipulataj de homoj.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Atombombo estas papera tigro uzata de la usonaj reakciuloj por timigi aliajn, timinda en aspekto, sed fakte ne. Kompreneble, atombombo estas armilo por grandskala amasbuĉado, sed tio, kio decidas la venkon aŭ malvenkon de milito, estas la popolo, sed ne unu aŭ du novtipaj armiloj.

“Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong” (aŭgusto 1946), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Armeo havas sian fundamenton sur soldatoj; se ĝi ne estas plenigita per progresema politika spirito, kaj se tia spirito ne estas nutrata per progresema politika

laboro, estas neeble atingi veran unuigon inter oficiroj kaj soldatoj, nek ardigi maksimume ilian fervoron al la Rezistmilito, nek havigi plej bonan bazon al ĉiuj teknikoj kaj taktikoj por ke ili elvolu plene sian efikon.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La pure milita vidpunkto estas multe disvolvita en parto de kamaradoj en la Ruĝa Armeo. Ĝi manifestiĝas jene:

(1) Tiuj kamaradoj rigardas militajn aferojn kaj politikon kiel kontraŭstarajn unu al la alia kaj rifuzas rekonii ke militaj aferoj estas nur unu el la rimedoj por plenumi politikajn taskojn. Kelkaj eĉ diras: “Se vi estas bona milite, nature vi estas bona politike; se vi estas nebona milite, vi ne povas esti bona ankaŭ politike.” — Tiuj do iras ankoraŭ pli malproksimen kaj

donas al militaj aferoj gvidan pozicion super politiko.

.....

“Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio” (decembro 1929), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Preni en manon ideologian edukadon estas la centra ĉenero en unuigo de la tuta Partio por fari grandan politikan batalon. Se tiu ĉi tasko ne estas solvita, ĉiuj politikaj taskoj de la Partio ne povas esti plenumitaj.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Inter la intelektuloj kaj junaj studentoj malfortiĝis lastatempe la ideologi-politika laboro kaj aperis iuj malsanecaj tendencoj. Al iuj personoj ŝajnas ke ĉu politiko, ĉu la estonteco de la patrio, ĉu la idealoj

de la homaro, nenio estas prizorginda. Ŝajnas ke marksismo, kiu furoris iutempe, estas nun ne tiel en modo. Kontraŭ tiu situacio ni devas plifortigi la ideologi-politikan laboron. Kaj la intelektuloj kaj la junaj studentoj devas streĉi siajn fortojn por lerni. Krom lerni specialigitajn studobjektojn, ili devas lerni marksismon, lerni kurantajn aferojn kaj politikon, por progresi ideologie kaj ankaŭ politike. Ne havi ĝustan politikan vidpunkton egalas ne havi animon. . . . Ĉiuj instancoj kaj organizoj devas preni sur sin la respondecon rilate al la ideologi-politika laboro. Ĝin devas prizorgi la Komunista Partio, la Junulara Ligo, la koncernataj registaraj departementoj kaj precipe la estroj kaj instruistoj de lernejoj.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Post politika edukado la soldatoj de la Ruĝa Armeo ekhavis klasan konscion kaj sciojn pri distribuo de la tero, establo de regpotenco, armado de la laboristoj kaj kamparanoj ktp., kaj eksciis, ke ili batalas por si mem kaj por la laborista kaj kamparana klasoj. Tial ili povas elporti la severan batalon sen plendo. Ĉiu roto, bataliono aŭ regimento ekhavis sian soldatan komitaton, kiu reprezentas la interesojn de la soldatoj kaj sin okupas pri politikaj kaj amasaj laboroj.

“La Batalo en Ginggaŝ-montaro”
(25 novembro 1928), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Dank’ al la korekta disvolvo de la movado de plendado (pri maljustaĵoj faritaj al la laboranta popolo de la malnova socio kaj reakciuloj) kaj de la tri kontroloj (pri klasa

origino, plenumado de laboro kaj batalvolo) ege plialtiĝis la politika konscio de komandantoj kaj batalantoj tra la tuta armeo en la batalo por la emancipo de la ekspluatataj laborantaj amasoj, por la agrara reformo tra la tuta lando kaj por la ekstermo de la bandita kliko de Ĉiang Kajŝek — la komuna malamiko de la popolo. Tio ankaŭ multe fortigis la solidan unuiĝon de ĉiuj komandantoj kaj batalantoj sub la gvido de la Komunista Partio. Sur tiu bazo, la armeo atingis plialtan purecon en siaj vicoj, plifortigis disciplinon, disetendis amasan movadon de trejnado kaj disvolvis sian politikan, ekonomian kaj militan demokration en komplete gvidata kaj laŭorda maniero. Tiamaniere, la armeo unuiĝis kiel unu homo kaj ĉiuj ĝiaj anoj kontribuas siajn ideojn kaj fortojn, ne timas vivoferon, kapablas venki materiajn mal-

facilojn kaj brave ekstermi la malamikon kun amasa heroismo kaj kuraĝo. Tia armeo estos nevenkebla en la mondo.

“Pri la Granda Venko en la Nordokcidento kaj pri la Novtipa Ideologia Eduka Movado en la Liberiga Armeo” (7 marto 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. IV.

En la lastaj kelkaj monatoj preskaŭ ĉiuj trupoj de la Popola Liberiga Armeo utiligis la paŭzojn inter bataloj por fari grandskalajn ideologian edukadon kaj trejnadon. Tiaj ideologia edukado kaj trejnado estas efektivigitaj tute sub gvido, laŭ ordo kaj en demokratia maniero. Dank’ al tio, ekscitiĝis la revolucia fervoro de la vastaj amasoj de komandantoj kaj batalantoj, al ili klare kompreniĝis la celo de la milito, eliminiĝis certaj nekorektaj ideologiaj tendencoj kaj malbonaj fenomenoj en la armeo, la kadroj kaj batalantoj

ricevis edukon, kaj multege leviĝis la baltforto. Ekde nun, ni devas kontinue okupiĝi en nia armeo pri tia novtipa ideologia eduka movado kun demokratia kaj amasa karaktero.

“Parolado en Konferenco de Kadroj en la Liberigita Regiono de Ŝanĥi kaj Sujĵuan” (1 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. IV.

La eduka orientilo de la Kontraŭjapana [Milita kaj Politika] Kolegio estas: firma kaj ĝusta politika direkto, penema kaj modesta laborstilo, elastaj kaj flekseblaj strategio kaj taktikoj. Tiuj ĉi tri punktoj estas nemalhaveblaj por prepari kontraŭjapanan, revolucion militiston. Surbaze de ili, edukas kaj lernas la funkciuloj, instruistoj kaj studentoj en la Kontraŭjapana Kolegio.

*Esti Oponata de la Malamikoj
Estas Afero Bona sed Ne Malbona*
(26 majo 1939).

Nia nacio ĉiam havas tradician stilon de penega batalo, kiun ni devas disvolvi. . . . Plue, la Komunista Partio ĉiam pledas por firma kaj ĝusta politika direkto. . . . Tiu ĉi firma kaj ĝusta politika direkto estas nedisigebla de laborstilo de penega batalo. Sen firma kaj ĝusta politika direkto, estas neeble instigi laborstilon de penega batalo; sen laborstilo de penega batalo, estas neeble efektiviigi firman kaj ĝustan politikan direkton.

“Parolado ĉe la Celebra Kolektiĝo por la Internacia Labora Tago ‘J.a Unua de Majo’, Okazigita en Jan-an” (1 majo 1939).

Estu unuigitaj, streĉaj, seriozaj kaj viglaj.

Devizo por la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Kolegio.

Kio vere gravas en la mondo estas la vorto "seriozeco", kaj la Komunista Partio plej taksas seriozecon.

Parolo en renkontiĝo kun ĉinaj studentoj kaj trejnatoj en Moskvo (17 novembro 1957).

XIII. RILATOJ INTER OFICIROJ KAJ SOLDATOJ

Nia armeo ĉiam havas du orientilojn: unue, ni devas esti senkompataj al niaj malamikoj, ni devas ilin subigi kaj ekstermi; due, ni devas esti afablaj al niaj propraj homoj, al la popolo, al niaj kamaradoj kaj al niaj superuloj kaj subuloj, kaj unuiĝi kun ili.

Parolado ĉe la akcepto donita de la Centra Komitato de la Partio al la model-lernaj delegitoj el la Ariergardaj Taĉmentoj (18 septembro 1944).

Ni venis el plej diversaj anguloj de nia lando kaj kolektiĝis kunen por komuna revolucia celo. . . . Niaj kadroj devas zorgi pri ĉiu batalanto kaj ĉiuj en la revoluciaj

vicoj devas zorgi, ame protekti kaj helpi unu alian.

“Servu al la Popolo” (8 septembro 1944), *Elekivitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Ni devas lanĉi en ĉiu armea unuo movadon por subteni la kadrojn kaj amzorgi la soldatojn, alvokante la kadrojn amzorgi la soldatojn kaj samtempe alvokante la soldatojn subteni la kadrojn. Ili devas publike paroli unuj pri la alies mankoj kaj eraroj kaj rapide korekti ilin. En tia maniero, ili povas tre bone efektiviĝi internan unuiĝon.

“La Taskoj por 1945” (15 decembro 1944).

Multaj pensas ke, kio kaŭzas nekontentigajn rilatojn inter oficiroj kaj soldatoj kaj inter la armeo kaj la popolo estas eraraj metodoj, sed mi ĉiam diras al ili, ke tio estas problemo de baza sinteno (aŭ baza principo),

problemo de sinteno havi respekton al la soldatoj kaj la popolo. El tiu ĉi sinteno sekvas diversaj politikoj, metodoj kaj formoj. Se ni forlasas tiun ĉi sintenon, la politikoj, metodoj kaj formoj certe fariĝos eraraj kaj la rilatoj inter oficiroj kaj soldatoj kaj inter la armeo kaj la popolo certe ne povos esti kontentigaj. La tri ĉefaj principoj por la politika laboro en nia armeo estas: unue, unueco inter oficiroj kaj soldatoj; due, unueco inter la armeo kaj la popolo; kaj trie, la malkomponado de la malamika armeo. Por apliki tiujn principojn efektive, ni devas eliri el la baza sinteno de respekto al la soldatoj kaj la popolo kaj al la homa digno de militkaptitoj, kiuj jam demetis siajn armilojn. Kiu prenasion kiel problemon de teknika afero, sed ne kiel tiun de baza sinteno, ja eraras kaj devas korekti sian opinion.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Komunistoj devas uzi demokratiajn metodojn de persvado kaj edukado kiam ili laboras interne de la laboranta popolo kaj nenial devas preni ordonisman teniĝon kaj devigajn metodojn. La Komunista Partio de Ĉinio fidele sekvas tiun ĉi marksism-leninisman principon.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Niaj kamaradoj nepre devas kompreni, ke la laboro de ideologia transformado bezonas longan tempon, paciencon kaj delikatecon, kaj ke ni ne povas per dono de kelkaj lecionoj aŭ okazigo de kelkaj kunvenoj ŝanĝi la ideologion kiun oni formis dum dekoj da jaroj en sia vivo. Por ke oni konvinkiĝu, ni devas tion atingi nur per persvado, sed ne per subpremo. El subpremo rezultas neniam konvinkiĝo. Ne eblas konvinki aliajn per forto. Ni povas tiel trakti malamikojn, sed neniel

devas uzi tiun ĉi metodon por trakti kamaradojn kaj amikojn.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Ni devas fari klaran distingon inter la malamikoj kaj ni mem, kaj ne devas trakti niajn kamaradojn starante sur malamika pozicio kaj kun sinteno per kiu ni traktas la malamikojn. Ni devas paroli plenaj de entuziasmo, sintenante por defendi la aferon de la popolo kaj plialtigi ĝian politikan konscion, sed ne kun moko kaj atakoj.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

XIV. RILATOJ INTER LA ARMEO KAJ LA POPOLO

La armeo devas kuniĝi kun la popolo, por ke la lasta rigardu ĝin kiel sian propran armeon. Tiu armeo estos do nevenkebla en la mondo. . . .

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Estas necese ke ĉiu kamarado komprenu ke, se nur ni apogas nin sur la popolo, firme kredas neelĉerpebla la kreivan povon de la popolamasoj kaj sekve fidas al kaj kuniĝas kun la popolo, ni do povas venki ĉian ajn malfacilon, kaj ĉiu ajn malamiko

ne povas nin subigi, sed nur povas esti subigita de ni.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Kien ajn niaj kamaradoj iras, ili devas starigi bonajn rilatojn kun la amasoj, zorgi ilin kaj helpi ilin solvi malfacilojn. Ni devas unuiĝi kun la amasoj; ju pli multe da amasoj kun kiuj ni unuiĝas, des pli bone.

“Pri la Ĉongking-a Intertraktado” (17 oktobro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

En la libetigitaj regionoj la armeo devas efektivigi laboron subteni la registaron kaj amzorgi la popolon, dum la demokratia registaro de sia flanko devas gvidi la popolon efektivigi laboron subteni la armeon kaj bonzorgi la familiojn de kontraŭjapanaj

militistoj, por ke la rilatoj inter la armeo kaj la popolo plue pliboniĝu.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

En la armeo, la problemo devas esti solvita per ideologia edukado de ĉiu komandanto kaj batalanto, ke ili profunde komprenu la gravecon de la tasko subteni la registaron kaj amzorgi la popolon. Se nur la armeo siaflanke tion faras bone, la loka partia organizo, la loka registaro kaj la popolo siavice certe plibonigos siajn rilatojn kun la armeo.

“Orientilo de Laboro en la Liberigitaj Regionoj por 1946” (15 decembro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

En la movadoj por subteni la registaron kaj amzorgi la popolon kaj por subteni la armeon kaj bonzorgi la familiojn de kontraŭjapanaj militistoj, la armeo unuflanke kaj la Partio kaj registaro aliflanke devas ĝisfunde ekzameni respektive siajn mankojn kaj erarojn faritajn en 1943 kaj decideme ilin korekti en 1944. De nun, tiaj movadoj devas esti lanĉitaj ĉie en la unua monato de ĉiu luna jaro, dum kiuj la komunaj promesoj por subteni la registaron kaj amzorgi la popolon kaj por subteni la armeon kaj bonzorgi la familiojn de kontraŭjapanaj militistoj devas esti ripetade legataj, kaj memkritikoj devas esti ripetade farataj publike antaŭ la amaso pri la tiranaj agoj, kiujn la trupoj en diversaj bazlokoj faris kontraŭ la partiaj organizoj, registaraj institucioj kaj la popolanoj, kaj pri la manko de zorgemo al la armeo mon-

trita de la partiaj organizoj, registaraj institucioj kaj la popolanoj (ĉiu kritiku sin mem kaj ne alian) por ke tiuj mankoj kaj eraroj estu ĝisfunde korektitaj.

“Disvolu la Movadojn por Redukti Renton, Kreskigi Produkton kaj Subteni la Registaron kaj Amzorgi la Popolon en la Bazlokoj” (1 oktobro 1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

XV. TRI VASTAJ DEMOKRATIOJ

En la armeo devas esti praktikata certa-grada demokratio, ĉefe per la forigo de feŭdisma praktikado de insulto kaj bato kaj per la interdivido de ĝojo kaj sufero inter oficiroj kaj soldatoj. Tiamaniere la unueco inter oficiroj kaj soldatoj povas esti atingita, la batalforto de la armeo ege pliiĝos kaj la ebleco por subteni la longdaŭran, kruelan militon estos certigita.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Krom la rolo ludata de la Partio, la kaŭzo, dank’ al kiu la Ruĝa Armeo povis teni sin vigla spite al tiel malbonaj materiaj kon-

diĉoj kaj tiel ofta batalado, estas la praktiko de demokratio interne de la armeo. La oficiroj ne batas soldatojn; oficiroj kaj soldatoj ricevas egalan traktadon; soldatoj havas rajton libere kunveni kaj paroli; bagatelaj formalajtoj estas forigitaj; kaj la financo estas publika al ĉiuj por inspekto. . . . En Ĉinio ne nur la popolo bezonas demokration, sed ankaŭ la armeo ĝin bezonas. Demokratia sistemo en la armeo estas grava armilo por detruo la feŭdan dungitan armeon.

“La Batalo en Ginggaŝ-montaro”
(25 novembro 1928), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La principo de politika laboro interne de nia armeo estas senrezerve mobilizi la soldatajn amasojn, la komandantojn kaj ĉiujn laborantojn por atingi tri gravajn celojn pere de demokratia movado sub centralizita gvido, nome, altgradan politikan unuiĝon, plibonigon de vivkondiĉoj

kaj plialtigon de militaj tekniko kaj taktiko. La movado de tri kontroloj kaj tri plibonigoj, nun entuziasme efektivigata interne de nia armeo, estas destinita por atingi la unuajn el tiuj celoj per la metodoj de politika kaj ekonomia demokratio.

Rilate al la ekonomia demokratio, la reprezentantoj elektitaj de la soldatoj devas esti rajtigitaj helpi (sed ne superi) la rotajn ĉefulojn en administrado de provizo kaj manĝo de la roto.

Rilate al la milita demokratio, estas necese efektivigi, dum la periodo de trejnado, reciprokan instruadon inter la oficiroj kaj soldatoj kaj inter la soldatoj mem; kaj dum la periodo de batalo la rotoj devas okazigi ĉe la fronto grandajn kaj malgrandajn kunsidojn de diversaj specoj. Sub la direktado de la rotaj ĉefuloj, soldataj amasoj devas esti mobilizitaj por diskuti kiel konkeri malamikajn poziciojn kaj kiel plenumi la bataltaskojn. En batalado daŭranta plurajn tagojn, tiaj kunsidoj

devas esti okazigitaj plurfoje. Tia milita demokratio estis praktikita kun grandega sukceso ambaŭ en la batalo de Panlong en norda Ŝenhi kaj en la batalo de Ŝigiaĝuang en Ŝanhi-Ĉahar-Hebej-a Limregiono. Kaj pruviĝis ke la praktiko kondukas nur al bona rezultato sen ajna damaĝo.

“La Demokratia Movado Interne de la Armeo” (30 januaro 1948),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. IV.

En la nuna granda lukto, la Komunista Partio de Ĉinio postulas la gvidantajn organojn de la tuta Partio, siajn membrojn kaj kadrojn altgrade disvolvi sian aktivecon; nur per tio ĝi povas akiri la venkon. La aktiveco devas manifestiĝi konkrete en la krea kapablo de ĝiaj gvidantaj organoj, kadroj kaj membroj, en iliaj preteco por alpreni respondecon, vigleco montrita en sia laboro, kuraĝo kaj kapablo bone elmeti demandojn, prezenti opiniojn kaj fari kri-

tikojn kontraŭ difektoj kaj en ludo de ilia rolo en kontrolado super la gvidantaj organoj kaj kadroj el la vidpunkto de kamaradeca prizorgo. Aliel, la tiel nomata aktiveco estos senenhava afero. Kaj la disvolvo de tiu aktiveco dependas de la demokratiigo de la partia vivo. Sen sufiĉa demokratia vivo en la Partio, ne estas atingebla la disvolvo de tiu aktiveco. Nur en la atmosfero de demokratia vivo, povas kreiĝi grandaj nombroj da kapablaj personoj.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito”
(oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ĉiu devas esti permesata paroli, kiu ajn li estas, se nur li ne estas malamika elemento kaj ne faras malican atakon; kaj estas negrave, se li diras ion eraran. Diversnivelaĵ gvidantoj havas la devon aŭskulti aliajn.

Du principoj devas esti observataj: (1) diri ĉion kion oni scias kaj diri ĝin senrezerve; (2) ne kulpigi la parolanton, sed preni liajn vortojn kiel averton. Sen la principo “ne kulpigi la parolanton”, aŭ se ĝi estas observata ne vere sed false, ne rezultos “diri ĉion kion oni scias kaj diri ĝin senrezerve”.

“La Taskoj por 1945” (15 decembro 1944).

Estas necese entrepreni edukadon pri demokratia vivo interne de la Partio, por ke la membroj komprenu, kio estas demokratia vivo, kio estas la interrilato inter demokratio kaj centralizismo, kaj kiel oni praktiku demokratian centralizismon. Nur tiamaniere oni povas efektive disetendi unuflanke demokratian vivon interne de la Partio, kaj aliflanke eviti ultra-demokra-

tion kaj senbridecon, kiu detruas disciplinon.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Tiel en la armeo, kiel en la lokaj organizoj, enpartia demokratio devas celi al firmigo de disciplino kaj pliigo de batalforto, sed ne al la malo.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Teorie eliminu la radikojn de ultra-demokratio. Unue, estas necese montri ke la danĝero de ultra-demokratio kuŝas en tio, ke ĝi difektas aŭ eĉ komplete detruas la organizon de la Partio, malfortigas aŭ eĉ komplete ruinigas la batalforton de la Partio, igas la Partion nekapabla porti sur

si la batalajn respondecojn, kaj per tio kaŭzas la malvenkon de la revolucio. Due, estas necese montri ke la fonto de ultra-demokratio troviĝas en la etburga malinklino al disciplino. Kiam tiu emo estas alportita en la Partion, ĝi disvolviĝis en ultra-demokratiajn ideojn politike kaj organize. Tiuj ideoj absolute ne povas kunekzisti kun la batalaj taskoj de la proletaro.

“Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio” (decembro 1929), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

XVI. EDUKADO KAJ LA TREJNADO DE TRUPOJ

Nia orientilo de eduko devas ebligi la edukatojn disvolviĝi ĉiuflanke, morale, intelekte kaj korpe, kaj fariĝi laboruloj kun socialisma konscio kaj kulturo.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Rilate al edukado de kadroj en laboro aŭ en lernejoj por kadroj, devas esti starigita tiu orientilo, ke oni devas koncentri sian studon sur la praktikajn problemojn de la ĉina revolucio kaj uzi la fundamentajn principojn de marksism-leninismo kiel gvidon, kaj la metodo de studo de marksism-

leninismo en statika kaj izolita maniero devas esti forĵetita.

“Reformu Nian Studon” (majo 1941), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Por milita lernejo, la plej grava problemo estas la elekto de direktoro kaj instruistoj kaj la adopto de eduka orientilo.

“Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio” (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Lernejo kun cent anoj certe ne povas esti bone funkciigata, se ĝi ne havas gvidskelton el kelke aŭ dekelke da personoj, kiu estas formita konforme al aktualaj kondiĉoj (sed ne kunmetita artefarite) kaj konsistas el la plej aktivaj, honestaj kaj

sagacaj el la instruistoj, funkciuloj kaj lernantoj.

“Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado” (1 junio 1943),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. III.

Ĉiuj oficiroj kaj soldatoj de nia armeo devas levi sian militarton, kuraĝe antaŭenmarŝi al certa venko en la milito kaj ekstermi ĉiujn malamikojn firme, ĝisfunde, tute kaj komplete.

“Manifesto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo” (oktobro 1947),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. IV.

Egala graveco devas esti almetita al la milita kaj politika flankoj de la unujara solidiga kaj trejna programo, kiu estas nun komencita, kaj la du flankoj devas esti kombinitaj. En la komenco, akcento devas esti metita sur la politika flanko, sur pli-

bonigo de rilatoj inter oficiroj kaj soldatoj, pliigo de interna unuiĝo kaj incito de alta entuziasmo inter la amasoj de kadroj kaj batalantoj. Nur tiamaniere la militaj solidigado kaj trejnado procedos facile kaj atingos pli bonan rezulton.

“La Taskoj por 1945” (15 decembro 1944).

Koncerne al la metodo de trejnado [de trupoj], estas necese disvolvi amasan movadon de trejnado, en kiu oficiroj instruas soldatojn, soldatoj instruas oficirojn kaj soldatoj instruas sin unu alian.

“Orientilo de Laboro en la Liberiĝitaj Regionoj por 1946” (15 decembro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Nia slogano en trejnado de trupoj estas: “Oficiroj instruu soldatojn, soldatoj instruu oficirojn, kaj soldatoj instruu sin unu alian”. La batalantoj havas multe da

praktika batalsperto. La oficiroj devas lerni de la batalantoj, kaj kiam ili proprigis al si la spertojn de aliaj, ili fariĝos pli kapablaj.

“Parolo al la Redakcia Personaro de *Sanbi-Sujjuan-a Ĵurnalo*” (2 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Koncerne al la trejnaj kursoj, la ĉefaj objektoj ankoraŭ devas esti altigo de la teknika nivelo en pafado, bajonetado, grenad-ĵetado kaj similaj, kun altigo de la taktika nivelo kiel suplemento, kaj speciale emfazinda estas la ekzercado de noktaj operacioj.

“Orientilo de Laboro en la Liberiĝitaj Regionoj por 1946” (15 decembro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

XVII. SERVI AL LA POPOLO

Ni devas esti modestaj kaj singardemaj, sed ne fieraj kaj malpaciencaj, kaj servi al la ĉina popolo tutkore kaj tutanime . . .

“Du Eblaj Sortoj de Ĉinio” (23 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Tutkore kaj tutanime servi al la popolo, neniam disiĝi de la amasoj; konsideri ĉion pro la interesoj de la popolo kaj ne pro tiuj de individuo aŭ malgranda grupo; identigi la respondecon al la popolo kun tiu al la gvidantaj institucioj de la Partio — tio estas nia elirpunkto.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Ŝtataj organoj devas praktiki demokratian centralizismon kaj sin apogi sur la popolamasoj kaj la laborantoj de ŝtataj organoj devas servi al la popolo.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

La spirito de kamarado Bethune, lia kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem, elmontriĝis en lia ekstreme respondeccema sento al la laboro kaj lia ekstreme varma koro al kamaradoj kaj la popolo. Ĉiu kompartiano devas lerni de li.

.....

Ni ĉiuj devas lerni lian spiriton de absoluta senegoismo. Kun tiu spirito oni povos fari sin homo ege utila al la popolo. Homo povas havi grandan aŭ malgrandan kapablon, sed sole kun tiu spirito, li jam estas homo nobla, pura,

bonvirta, libera de trivialaj interesoj kaj utila al la popolo.

“Memore al Norman Bethune”
(21 decembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Nia Komunista Partio kaj la de ĝi gvidataj Oka-voja kaj Nova Kvara Armeoj estas revoluciaj trupoj, kiuj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo.

“Servu al la Popolo” (8 septembro 1944), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Ĉiuj niaj kadroj, en kiaj ajn rangoj, estas servantoj de la popolo, kaj ĉio, kion ni faras, estas por servi la popolon. Kiel do ni povas esti malvolontaj forĵeti iun ajn de niaj malbonaj trajtoj?

“La Taskoj por 1945” (15 decembro 1944).

Nia devo estas respondi al la popolo. Ĉiu vorto, ĉiu ago, ĉiu politiko devas konformi al la interesoj de la popolo, kaj se estas farita iu eraro, ĝi devas esti nepre korektita — jen kion signifas respondi al la popolo.

“La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito” (13 aŭgusto 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Kie estas lukto, tie estas vivofero, kaj mortoj de homoj okazas konstante. Sed, pensante pri la interesoj de la popolo kaj pri la suferoj de la plejparto de la popolo, ni trovas, ke ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo. Tamen, ni devas kiel eble plej multe redukti nenece-sajn vivoferojn.

“Servu al la Popolo” (8 septembro 1944), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Ĉiuj homoj mortas, sed ne ĉiu morto havas saman signifon. La antikva ĉina literaturisto Sima Kian diris: “Ĉiu mortas, sed la morto de iu estas pli peza ol la monto Tajŝan, dum la morto de alia pli malpeza ol lanugero.” La morto por la interesoj de la popolo estas pli peza ol la monto Tajŝan; la morto de tiu, kiu laboras por faŝismo kaj oferas sian vivon por ekspluatantoj kaj subpremantoj de la popolo, estas pli malpeza ol lanugero.

“Servu al la Popolo” (8 septembro 1944), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

XVIII. PATRIOTISMO KAJ INTERNACIISMO

Ĉu komunisto kiel internaciisto povas esti samtempe patrioto? Ni opinias, ke li ne nur povas, sed eĉ devas esti tia. La konkreta enhavo de patriotismo estas decidita laŭ la historiaj kondiĉoj. Estas "patriotismo" de la japanaj agresantoj kaj de Hitler, kaj estas ankaŭ patriotismo nia. Komunistoj devas firme oponi la t.n. "patriotismon" de la japanaj agresantoj kaj de Hitler. La japanaj kaj germanaj komunistoj estas malvenkistoj en rilato al la militoj de siaj landoj. Per ĉiuj rimedoj akceli la malvenkon de la japanaj agresantoj kaj de Hitler en iliaj militoj ja estas por la interesoj de la japana kaj germana popoloj; ju pli ĝisfunda estas la malvenko,

des pli bona. ... Ĉar la militoj kondukataj de la japanaj agresantoj kaj de Hitler malutilas ne nur al la popoloj de la mondo, sed ankaŭ al la popoloj de iliaj propraj landoj. Alia estas la kazo por Ĉinio, ĉar Ĉinio estas lando kiu suferas agreson. Sekve, ĉinaj komunistoj devas kombini patriotismon kun internaciismo. Ni estas internaciistoj, kaj ankaŭ patriotoj; nia slogano estas: lukti por defendi la patrion kontraŭ la agresantoj. Por ni malvenkismo estas krimo, kaj strebado al venko de la Kontraŭ-japana Rezistmilito estas nia neforpuŝebla devo. Ĉar nur per lukto por defendi la patrion ni povos venki la agresantojn kaj liberigi la nacion. Nur kiam nia nacio estos liberigita, estos ebla la liberiĝo de la proletaro kaj la cetera laboranta popolo. La venko de Ĉinio kaj la renverso de la imperiistoj invadantaj Ĉinion mem estos helpo al fremdlandaj popoloj. Tial, patriot-

ismo ja estas praktiko de internaciismo en naciliberigaj militoj.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Estante fremdulo, li rigardis kiel sian propran la liberigan aferon de la ĉina popolo, sen ajna egoisma motivo. Kia spirito tio estas? Tio estas la spirito de internaciismo, la spirito de komunismo, ĉiu membro de la Komunista Partio de Ĉinio devas lerni de li tiun spiriton. . . . Ni devas unuiĝi kun la proletaro de ĉiuj kapitalismaj landoj, kun tiu de Japanio, Britio, Usono, Germanio, Italio kaj ĉiuj aliaj kapitalismaj landoj, kaj nur tiel ni povas faligi imperiismon, liberigi nian nacion kaj nian popolon kaj liberigi la naciojn kaj popolojn de la tuta mondo. Tio estas nia internaci-

ismo, la internaciismo per kiu ni oponas kontraŭ malvasta naciismo kaj malvasta patriotismo.

“Memore al Norman Bethune”
(21 decembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

En la lukto por akiri ĝisfundan liberiĝon la subpremataj popoloj sin apogas, antaŭ ĉio, sur la propra batalo, kaj nur due, sur internacia helpo. La popoloj, kiuj jam triumfis en sia propra revolucio, devas helpi tiujn, kiuj ankoraŭ batalas por sia liberiĝo. Tio estas nia internaciisma devo.

Parolo kun afrikaj amikoj dum aŭdienco (8 aŭgusto 1963).

La socialismaj landoj estas ŝtatoj de tute nova tipo, kie la ekspluatantaj klasoj estas renversitaj kaj la laborantaj popolanoj estas

en potenco. La principo de unueco de internaciismo kun patriotismo estas efektiva en la rilatoj inter tiuj landoj. Komunaj interesoj kaj komuna idealo intime nin kunligas.

Parolado ĉe la Kunveno de la Superega Soveto de Sovetunio por Celebrado de la 40-an Datrevenon de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (6 novembro 1957).

Unuiĝu la popoloj de ĉiuj landoj en la socialisma tendaro, unuiĝu la popoloj de ĉiuj aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj, unuiĝu la popoloj de ĉiuj kontinentoj tra la tuta mondo, unuiĝu ĉiuj pacamaj landoj kaj unuiĝu ĉiuj landoj suferantaj de la agreso, kontrolo, interveno kaj supertirano de Usono por formi la plej vastan unuecfronton por oponi la agresajn kaj

militajn politikojn de la usona imperiismo kaj defendi la mondpacon.

“Parolo por Subteni la Panaman Popolon en Ĝia Justa Patriota Batalo kontraŭ la Usona Imperiismo” (12 januaro 1964), *Unuiĝu la Popoloj de la Tuta Mondo por Frakasi la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn.*

Aferoj disvolviĝas senĉese. Estas nur kvardek kvin jaroj de post la Revolucio de 1911 ĝis nun, sed la fizionomio de Ĉinio komplete ŝanĝiĝis. Post aliaj kvardek kvin jaroj, t.e. en la jaro 2001, aŭ la komenco de la 21-a jarcento, la fizionomio de Ĉinio des pli ege ŝanĝiĝos. Ĉinio fariĝos potenca socialisma industria lando. Ĉinio devas esti tia. Ĉar ĝi estas lando kun areo de 9,600,000 kvadrat-kilometroj kaj loĝantaro de 600 milionoj da homoj, kaj ĝi devas fari pli grandan kontribuon al la homaro. Ĝia kontribuo en pasinta longa periodo estis

tro malgranda. Pro tio ni sentas bedaŭron.

Sed ni devas esti modestaj — ne nur nun, sed ankaŭ post kvardek kvin jaroj. Ni devas esti ĉiam modestaj. En niaj internaciaj rilatoj, ni ĉina popolo devas nin liberigi de grand-potenca ŝovinismo firme, plene, tute kaj komplete.

“Memore al D-ro Sun Jatsen”
(novembro 1956).

Ni neniam devas preni arogantan sintenon de grand-potenca ŝovinismo kaj neniam devas fieri pro la venko de nia revolucio kaj iuj atingoj en nia konstruado. Ĉiu lando, ĉu granda ĉu malgranda, havas siajn fortajn kaj malfortajn punktojn.

Inaŭgura Parolado ĉe la Oka Tut-landa Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio (15 septembro 1956).

XIX. REVOLUCIA HEROISMO

Tiu ĉi armeo posedas spiriton nevenkeble marŝi antaŭen, kaj ĝi decidas faligi ĉiujn malamikojn kaj neniam esti subigita de malamikoj. En kiel ajn malfacilaj kaj penigaj okazoj, se nur restas ankoraŭ unu sola homo, li batalos plu.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Disvolvi nian batalstilon — kuraĝo en batalo, maltimo al sinofero, maltimo al laciĝo kaj kontinua batalado (t.e. entre-

preni senripoze sinsekvajn batalojn dum mallonga tempo).

“La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj”
(25 decembro 1947), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Miloj post miloj da martiroj antaŭ ni heroe oferis sian vivon por la interesoj de la popolo. Ni alte tenu ilian standardon kaj marŝu antaŭen laŭ la vojo surverŝita de ilia sango!

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilaĵojn por akiri venkon.

“Montotranslokigo Farc de Mal-saĝa Avo” (11 junio 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

... En la kriza momento en la progresado de la Norden-ekspedicio, tiu nacia unuecfronto de Kuomintango, la Komunista Partio kaj diversaj rondoj de la popolo, kiu reprezentis la liberigan aferon de la ĉina popolo, kaj ĉiuj ĝiaj revoluciaj politikoj estis detruitaj de la perfidaj kaj kontraŭpopolaj politikoj de "parti-purigo" kaj masakro, adoptitaj de la kuomintangaj aŭtoritatuloj. ... Ekde tiam, interna milito anstataŭis unuiĝon, aŭtokratio anstataŭis demokration kaj malluma Ĉinio anstataŭis luman Ĉinion. Sed, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo estis nek timigitaj, nek konkeritaj, nek ekstermitaj. Ili relevis sin de la tero, forviŝis la sangmakulojn de sur siaj korpoj, enterigis la kadavrojn de siaj kamaradoj kaj denove daŭrigis la batalon. Alte tenante la grandan revolucionan standardon, ili kondukis armitan reziston, starigis popolajn registarojn en vasta teritorio de Ĉinio, efektivigis reformon de la agrosistemo, konstruis

popolan armeon — la ĉinan Ruĝan Armeon kaj konservis kaj disvolvis la revolucion forton de la ĉina popolo.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Vi havas multajn bonajn kvalitojn kaj tre grandajn meritojn, sed vi ĉiam memoru ke vi ne devas fieri. Vi estas respektataj de aliaj, kaj prave, sed tio ankaŭ facile kondukas al fiero. Se vi fariĝos fieraj, ĉesos esti modestaj, ne plu klopodos, ne respektos aliajn, nek la kadrojn, nek la amasojn, tiam vi jam ne povos plu esti herooj kaj modeloj. Estis tiaj homoj en la pasinteco, mi esperas ke vi ne sekvos ilian ekzemplon.

“Ni Devas Ellerni Ekonomian Laboron” (10 januaro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

En la batalo por ekstermi malamikojn kaj en tiu por restarigi kaj disvolvi produkton industriian kaj agrikulturan, vi venkis multe da malfaciloj kaj suferoj, montris ekstreme grandan kuraĝon, saĝon kaj iniciativon. Vi estas model-personoj de la tuta ĉina nacio, estas spino por puŝi la popolan aferon en ĉiuj sferoj triumfe antaŭenmarŝi, estas fidindaj subteniloj de la popola registaro kaj pontoj ligantaj la popolan registaron kun la vastaj amasoj.

Saluta parolo ĉe la Tutlanda Kunveno de la Reprezentantoj de la Batal-herooj kaj Labor-modcloj en la nomo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio (25 septembro 1950).

Ni, la ĉina nacio, havas la spiriton sange batali kontraŭ la malamiko ĝis la fino, la firman decidemon por reakiri niajn perdiĝajn teritoriojn kaj nacian honoron sur la bazo

de nia propra penado, kaj la kapablon
memstari inter la nacioj de la mondo.

“Pri Taktiko kontraŭ la Japana
Imperiismo” (27 decembro 1935),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

XX. KONSTRUI NIAN LANDON DILIGENTE KAJ ŜPAREME

Ni klopodu ke ĉiuj niaj kadroj kaj ĉiuj niaj popolanoj ĉiam memoru ke nia lando estas socialisma granda lando sed ankaŭ ekonomie postĝinta malriĉa lando, kaj ke tio estas tre granda kontraŭdiro. Por ke Ĉinio riĉiĝu kaj fortiĝu, ni bezonas kelkdek jarojn da peniga strebado, en kiu inkluzivigos la plenumo de la politiko praktiki rigoran ŝparadon kaj oponadi malŝparemon, por konstrui nian landon en diligentema kaj ŝparema maniero.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Diligenteco kaj ŝparemo devas esti praktikataj en mastrumado de fabrikoj, de magazenoj, de ĉiuj ŝtatposedataj, kooperaj kaj aliaj entreprenoj. La principo de diligenteco kaj ŝparemo devas esti observata en ĉio. Tio estas principo de ekonomio, kiu estas unu el la fundamentaj principoj de la socialisma ekonomiko. Ĉinio estas granda lando, tamen nun ankoraŭ tre malriĉa. Por riĉigi Ĉinion estas bezonataj kelkdek jaroj. Post kelkdek jaroj ni ankoraŭ devos praktiki la principon de diligenteco kaj ŝparemo, sed ni devas aparte rekomendi diligentecon kaj ŝparemon kaj aparte atenti ekonomion en la nunaj kelkdek jaroj, en la periodo de nunaj kelkaj kvinjaraj planoj.

Enkonduka noto al "Diligente kaj Ŝpareme Mastrumi Kooperativon" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo* vol. I.

En ĉiu ajn loko, oni devas ekstreme ŝpari labor-forton kaj materiajn fontojn, kaj absolute ne misuzi kaj malŝpari ilin nur pro momenta bezono. En ĉiu ajn loko, oni devas de la unua jaro de laboro jam prikalkuli la multajn venontajn jarojn, la longdaŭran persistadon de la milito, la kontraŭ-ofensivon kaj la konstruan laboron post la elpelo de la malamiko. Unuflanke oni devas nepre ne misuzi kaj malŝpari, kaj aliflanke oni devas energie disvolvi la produktadon. Antaŭe, en iuj lokoj mankis la vidpunkto de longa periodo, oni turnis sian atenton nek al ŝparo de la labor-forto kaj materiaj fontoj, nek al la disvolvo de produkto, kaj tial suferis grandajn perdojn. Ricevinte tiun lecionon, oni devas nun akriigi sian atenton.

“Ni Devas Ellerni Ekonomian Laboron” (10 januaro 1945), *Elek-
titaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol.
III.

Por rapide revigliĝi kaj disvolvi agrikulturan produkton kaj industrian produkton en urbetoj, dum la batalado por abolo de la feŭda sistemo, ni devas fari ĉion eblan por konservi maksimume ĉiujn uzeblajn rimedojn por produkto kaj vivo, alpreni firmajn paŝojn kontraŭ ilia difekto kaj malŝparo fare de kiu ajn persono, oponi ekscesojn en manĝado kaj drinkado kaj atenti pri ŝparemo.

“Parolado en Konferenco de Kadroj en la Liberigita Regiono de Ŝanĥi kaj Sujĵuan” (1 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Financaj elspezoj devas esti faritaj laŭ la principo de ŝparo. Kaj ni devas komprenigi al ĉiuj registaraj laborantoj ke koruptiĝo kaj malŝparo estas ege grandaj krimoj. En la batalo kontraŭ koruptiĝo kaj malŝparo ni jam atingis iujn rezultojn, sed ni devas ankoraŭ plu klopodadi. La

principo de nia sistemo de kontado estas ŝpari ĉiun moneron por la milito kaj revolucia afero kaj por nia ekonomia konstruado.

“Nia Ekonomia Politiko” (23 januaro 1934), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Inter multaj el nia personaro kreskas lastatempe danĝera tendenco — malemo al divido de la ĝojo kaj sufero kun la amasoj kaj emo al zorgo pri persona famo kaj gajno. Tio estas tre malbona. Unu el la metodoj por venki tiun ĉi danĝeran tendencon estas simpligi niajn organizojn kaj transigi kadrojn al pli subaj unuoj en nia kampanjo por pliiĝi produktadon kaj praktiki ŝparadon, por ke sufiĉe granda nombro da kadroj revenu al produkta laboro.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

La memprovizo de la armeo per produktado ne nur plibonigis la vivon, reduktis la ŝarĝon de la popolo kaj tiel ebligis la ekspansiigon de la armeo, sed tuj alportis ankaŭ multajn kromajn produktaĵojn. Tiuj kromaj produktaĵoj estas:

(1) Plibonigo de la rilatoj inter la oficiroj kaj soldatoj. En kuna produkta laborado, la oficiroj kaj soldatoj intimiĝis unuj kun la aliaj kvazaŭ fratoj.

(2) Plifortigo de la ideo pri laboro. ... Depost la komenciĝo de memprovizo per produktado en la armeo, la ideo pri laboro estas plifortigita, kaj la mallaboremaj kutimaĵoj de sentaŭguloj estas transformitaj.

(3) Plifortigo de disciplino. La labordisciplino aplikata en produktado ne nur ne malfortigas la disciplinon en batalo kaj en militista vivo, sed male ĝin plifortigas.

(4) Plibonigo de la rilatoj inter la armeo kaj la popolo. Kiam la trupoj

havas mem mastrumon, malmultiĝas aŭ tute forestas okazoj de malrespekto kontraŭ la havaĵoj de popolanoj. La interhelpoj per laborintersanĝo dum produktado inter la armeo kaj la popolo plue plifortigas la amikajn rilatojn inter ili.

(5) Malmultiĝas plendoj kontraŭ la registaro en la trupoj, tiel ke pliboniĝas ankaŭ la rilatoj inter la armeo kaj la registaro.

(6) Akcelo al la granda produkta movado de la popolo. Kiam la armeo produktas, la produktado de la registaraj kaj aliaj institucioj montriĝas pli necesa kaj pli fervore farata; nature ankaŭ la universala pliprodukta movado de la tuta popolo montriĝas pli necesa kaj pli fervore farata.

“Pri Memprovizo de la Armeo per Produktado kaj pri la Graveco de la Du Grandaj Movadoj de Stilĝustigado kaj Produktado” (27 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Iuj diras: Kiam la trupoj okupiĝas pri produktado, ili ne povas militi kaj sin trejni; kiam la registaraj kaj aliaj institucioj okupiĝas pri produktado, ili ne povas fari sian laboron. Tiaj diroj estas ne pravaj. En la lastaj jaroj niaj trupoj en la Lim-regiono sin okupis pri grandskala produktado kaj provizis sin per sufiĉaj vestaĵoj kaj manĝaĵoj; en la sama tempo ili ankaŭ plenumis trejnadon kaj okupiĝis pri sinklerigo en politiko kaj kulturo; ili atingis pli grandajn sukcesojn en tiuj aktivadoj ol en la pasinteco, kaj la unuiĝo interne de la armeo kaj inter la armeo kaj la popolo ankaŭ plifortiĝis ol antaŭe. En la fronto la trupoj kondukis grandskalan produktan movadon dum la pasinta jaro, tamen en la milito ili ankaŭ tre multe atingis kaj cetere komencis vastan movadon de trejno. Dank' al produktado, la vivo de la laborantoj de la registaraj kaj aliaj institucioj pliboniĝis, kaj ili laboras pli sindone kaj

pli efike; tiel estas en la Limregiono kiel en la fronto.

“Ni Devas Ellerni Ekonomian Laboron” (10 januaro 1945), *Elek-
titaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol.
III.

XXI. SIN APOGI SUR PROPRAJ FORTOJ KAJ PENEGE LUKTI

Sur kian bazon ni metu nian politikon? Metu ĝin sur la bazon de niaj propraj fortoj, nome: "sinapogo sur propraj fortoj". Ni ne estas izolitaj, ĉiuj kontraŭimperiismaj landoj kaj popoloj de la tuta mondo estas niaj amikoj. Sed ni emfazas sinapogon sur propraj fortoj, ni povas venki ĉiujn en- kaj ekster-landajn reakciulojn apogante nin sur la fortoj de ni mem organizitaj.

"La Aktuala Situacio kaj Nia Politiko post la Venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito" (13 aŭgusto 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ni pledas por sinapogo sur propraj fortoj. Ni esperas ricevi eksterajn helpojn, sed ni ne devas dependi de ili. Ni apogas nin sur niaj propraj klopodoj kaj sur la kreivo de nia tuta armeo kaj nia tuta popolo.

“Ni Devas Ellerni Ekonomian Laboron” (10 januaro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Gajni la tutlandan venkon estas nur la unua paŝo en longa marŝo de dekmilioj. ...La ĉina revolucio estas grandioza, sed la vojo post la revolucio estos pli longa, la laboro pli grandioza kaj pli peniga. Tion ni devas bone klarigi en la Partio nun, por ke la kamaradoj daŭre restu modestaj, singardemaj, liberaj de aroganteco kaj senpacienco en sia laborstilo, ke la

kamaradoj daŭre konservu sian stilon de modesta vivado kaj penema luktado.

“Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio” (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Devas esti plene eliminataj el inter niaj kadroj ĉiuj ideoj pri gajno de facilaj venkoj dank’ al hazardeco kaj bonŝanco, sen malfacila penado kaj lukto, sen sangado kaj ŝvitado.

“Fondi Stabilan Bazlokon en la Nordoriento” (28 decembro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ni devas konstante fari propagandon al la popolo pri la faktoj de monda progreso kaj la brila estonto antaŭ ni, ke la popolo starigu sian memfidon en venko. Sam-

tempe, ni devas diri al la popolo kaj diri al niaj kamaradoj, ke la vojo estas zigzaga. Estas ankoraŭ multaj baroj kaj malfaciloj sur la vojo de revolucio. La Sepa Kongreso de nia partio supozis multajn malfacilojn, ĉar ni preferas supozi ke estos pli multe da malfaciloj ol malpli. Iuj kamaradoj ne volas pensi multe pri malfaciloj. Sed malfaciloj estas faktoj, ni devas rekoni tiom da malfaciloj kiom estas kaj ne devas alpreni "ismon de nerekono". Ni devas rekoni malfacilojn, analizi ilin kaj kontraŭbatali ilin. Estas nenia rekta vojo en la mondo; ni devas prepari nin por iri vojon zigzagan kaj ne aspiru facilan sukceson. Estas neimageble, ke unu belan matenon ĉiuj reakciuloj falos surgenu propravole. Unuvorte, la perspektivo estas brila, la vojo estas zigzaga. Estas ankoraŭ multaj malfaciloj antaŭ ni, kiujn ni ne devas preterlasi. Unuiĝante kun la tuta popolo

en komuna klopodo, ni certe povas superi ĉiujn malfacilojn kaj gajni venkon.

“Pri la Ĉongking-a Intertraktado” (17 oktobro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Kiu vidas nur la flankon luman, sed ne la flankon malfacilan, tiu ne povas bone batali por efektiviĝi la taskojn de la Partio.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La havaĵoj de la socio estas kreitaj de la laboristoj, kamparanoj kaj laborantaj intelektuloj mem. Se ili ekposedas sian sorton, sekvas la marksism-leninisman linion kaj ne evitas problemojn, sed aktive

solvas ilin, ĉiu ajn malfacilo en la mondo estas solvebla.

Enkonduka noto al "La Partia Sekretario Persone Entreprenas kaj la Tuta Partio Konstruas la Kooperativon" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo*, vol. I.

La kamaradoj de la tuta Partio devas plene enkalkuli kaj sin prepari por laŭplane venki ĉiujn malfacilojn kun nefleksebla persisteco. La reakciaj fortoj kaj ni ambaŭ havas malfacilojn. Sed la malfaciloj de la reakciaj fortoj estas nevenkeblaj, ĉar ili estas fortoj, kiuj alproksimiĝas al morto kaj ne havas estontecon. Niaj malfaciloj estas venkeblaj, ĉar ni estas nove emerĝantaj fortoj kun brilanta estonteco.

"Renkonte al la Nova Alttajdo de la Ĉina Revolucio" (1 februaro 1947), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

En tempo de malfacileco, ni devas vidi
niajn atingaĵojn, devas vidi la lumon kaj
devas levi nian kuraĝon.

“Servu al la Popolo” (8 septembro
1944), *Elektitaj Verkoj de Maŭ
Zedong*, vol. III.

Ĉiu ajn novaĵo trapasas malfacilan kaj
zigzagan vojon en sia kreskado. Estas
simpla fantazio supozi ke oni povas facile
sukcesi en socialisma afero sub konstanta
favora vento sen malfacilo, zigzago kaj
grandega penado.

*Pri la Ĝusta Traktado de Kon-
traŭdiroj Interne de la Popolo* (27
februaro 1957).

En iuj tempoj dum la revolucia lukto
la malfavoraj cirkonstancoj superas la fa-
vorajn kaj sekve konsistigas la ĉefan flankon
de la kontraŭdiro, dum la favoraj cirkon-
stancoj konsistigas la neĉefan flankon.
Sed, dank’ al la penado de la revoluciuloj,

povas esti venkitaj paŝo post paŝo la malfaciloj kaj kreigas nova favora situacio, tiam la malfavora situacio cedas lokon al la favora.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

Kio estas laboro? Laboro estas batalo. En tiuj lokoj estas malfaciloj kaj problemoj, kiuj bezonas esti solvataj de ni. Ni iras tien labori kaj batali por solvi la malfacilojn. Bona kamarado estas tiu, kiu pli deziras iri tien, kie la malfaciloj estas pli grandaj.

“Pri la Ĉongking-a Intertraktado”
(17 oktobro 1945), *Elektitaj Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. IV.

Estas antikva ĉina fablo nomata “Monto-translokigo Fare de Malsaĝa Avo”. Ĝi rakontas pri maljunulo, kiu loĝis en norda Ĉinio antaŭ tre tre longa tempo kaj estis konata kiel Malsaĝa Avo de la Norda

Monto. Sude antaŭ lia domo staris du grandaj montoj Tajhang kaj Vangvu, kiuj baris al li la vojon. Li decidis kaj gvidis siajn filojn forigi tiujn ĉi montojn per ŝpatoj. Alia maljunulo konata kiel Grandaĝulo Saĝa vidis ilin kaj ridis, dirante: "Kiom malsaĝaj vi estas! Estas tute neeble por vi kelkaj homoj fose forigi tiujn ĉi du grandajn montojn." Malsaĝa Avo respondis: "Kiam mi mortos, miaj filoj daŭrigos la laboron; kiam ili mortos, estos miaj nepoj, kaj poste iliaj filoj kaj nepoj, kaj tiel plu senfine. Kvankam la du montoj estas tre altaj, tamen ili ne povos kreski kaj, kun defosado de ĉiu peco, ili fariĝos pli malaltaj. Kial do ni ne povos ilin ebenigi?" Refutinte la eraran opinion de Grandaĝulo Saĝa, li daŭrigis la fosadon ĉiun tagon sen iometa ŝanceliĝo. Tio kortuŝis Dion kaj li sendis teren du anĝelojn, kiuj surdorse forportis la montojn. Nuntempe, troviĝas ankaŭ du grandaj montoj peze kuŝantaj sur la dorso de la

ĉina popolo. Unu estas imperiismo kaj la alia feŭdismo. La Komunista Partio de Ĉinio jam antaŭ longe decidis forigi ilin. Ni devas nepre persisti kaj labori senĉese, kaj ankaŭ ni kortuŝos Dion. Nia Dio estas neniu alia ol la popolamasoj de la tuta Ĉinio. Se ili leviĝos kaj fosos kune kun ni, kial ni ne povos ebenigi la du montojn?

“Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo” (11 junio 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

XXII. PENSMETODO KAJ LABORMETODO

La historio de la homaro estas historio de kontinua disvolviĝado de la regno de neceso al la regno de libero. Tiu ĉi procezo neniam finiĝos. En socio, en kiu ekzistas klasoj, la klasbatalo neniam finiĝos. En senklasa socio la batalo inter la novo kaj malnovo kaj inter pravo kaj malpravo neniam finiĝos. En la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama nivelo. Tial, la homaro ĉiam devas konstante resumi sperton kaj fari novajn eltrovojn, novajn inventojn, novajn kreojn kaj novajn progresojn. Vidpunktoj de stagno, pesimis-

mo, inerteco kaj memkontento estas tute eraraj. Ili eraras pro tio, ke ili ne estas konformaj al la historiaj faktoj de socia disvolviĝo de la homaro dum ĉirkaŭ miliono da jaroj, nek al la historiaj faktoj de la naturo ĝis nun konataj de ni (ekz-e naturo spegulita en la historio de ĉielaj korpoj, la terglobo, vivaĵoj kaj aliaj naturaj sciencoj).

Citata laŭ "Raporto de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj pri la Laboro de la Registaro ĉe la Unua Sesio de la Tria Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj" (21-22 decembro 1964).

Natura scienco estas unu el la armiloj de homoj en ilia batalo por libereco. Por gajni liberecon en socio, oni devas uzi socian sciencan koncepton por kompreni kaj reformi socion kaj konduki socian revolucion. Por gajni liberecon en la natura mondo, oni devas uzi naturan sciencan koncepton por kom-

preni, konkeri kaj reformi naturon kaj tiamaniere gajni liberecon el la naturo.

Parolado ĉe la inaŭgura mi-tingo de la Naturscienca Esplora Societo de la Limregiono (5 februaro 1940).

Dialektika materiismo de marksisma filozofio havas du plej elstarajn karakterizaĵojn: unu estas ĝia klasa karaktero, ĝia malkaŝa deklaro ke dialektika materiismo servas al la proletaro; la alia estas ĝia praktika karaktero, emfazo pri la dependeco de teorio al praktiko, ke la fundamento de teorio estas praktiko kaj teorio siavice servas al praktiko.

“Pri Praktiko” (julio 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La ege grava problemo laŭ marksisma filozofio ne estas kompreni la leĝojn de la objektiva mondo kaj sekve povi ĝin klarigi,

sed aktive reformi la mondon per la kono de la objektivaj leĝoj.

“Pri Praktiko” (julio 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

De kie venas la korektaj ideoj de la homo? Ĉu ili falas de la ĉielo? Ne. Ĉu ili estas propraj al la cerbo? Ne. La korektaj ideoj de la homo nur povas veni de socia praktiko, de la produkta batalo, klasbatalo kaj scienca eksperimentado — la tri tipoj de praktiko en la socio.

De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo? (majo 1963).

La socia ekzisto de la homo decidas liajn ideojn. Kiam la korektaj ideoj reprezentantaj progresintan klason estas posedataj de la popoloamasoj, ili fariĝas materia forto por reformi la socion kaj la mondon.

De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo? (majo 1963).

Sin dediĉinte al diversaj luktoj en la socia praktiko, oni akiras riĉajn spertojn, tiel sukcesajn kiel malsukcesajn. Pere de la kvin organoj de la homo — okuloj, oreloj, nazo, lango kaj korpo, sennombraj fenomenoj de la objektiva ekstera mondo respeguliĝas en lia cerbo, kaj komence estas kono percepta. Kiam akumuliĝas multe da materialoj de tia percepta kono, okazas salto al kono racia, nome ideoj. Tio estas unu procezo de konado. Tio estas la unua etapo de la tuta procezo de konado: la transpaso de objektiva materio al subjektiva spirito, de ekzisto al ideoj. En tiu ĉi etapo, ankoraŭ ne pruviĝas ĉu la spirito aŭ ideoj (inkluzive de teorioj, politikoj, planoj kaj rimedoj) ĝuste spegulas la leĝojn de la objektiva ekstera mondo, kaj ankoraŭ ne estas eble determini ĉu ili estas korektaj. Poste sekvas la dua etapo de la procezo de konado: la transpaso de spirito al materio, de ideoj al ekzisto. Tio estas meti en la socian praktikon la konon akiritan en la

unua etapo, por vidi, ĉu la teorioj, politikoj, planoj, rimedoj, k.a. povas sukcesi kiel oni atendis. Ĝenerale, kiuj sukcesas, estas korektaj, kiuj malsukcesas, estas eraraj. Tio estas vera precipe en la homa lukto kontraŭ la naturo. En socia lukto, la fortoj reprezentantaj progresintan klason kelkfoje suferas malvenkojn, ne pro tio ke iliaj ideoj estas nekorektaj, sed pro tio ke, en la ekvilibro de la fortoj interluktantaj, la progresintaj fortoj dumtempe estas malpli grandaj ol la reakciaj; tial ili dumtempe malvenkas, sed certe triumfos iun tagon en la estonteco. La homa kono, provite de la praktiko, faras alian salton. Tiu ĉi salto havas pli grandan signifon ol la antaŭa. Ĉar nur ĉifoja salto povas pruvi, ĉu estas korekta aŭ erara la unua salto de konado, nome la ideoj, teorioj, politikoj, planoj, rimedoj, k.a. akiritaj en la procezo de spegu-

lado de la objektiva ekstera mondo. Ekster tio, ne ekzistas alia rimedo por pruvi la veron.

De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo? (majo 1963).

Por ricevi korektan konon, ofte necesas ripeti plurfoje la procezon de materio al spirito kaj de spirito al materio, t.e. de praktiko al kono kaj de kono al praktiko. Jen la marksisma teorio de konado, la dialektika materiisma teorio de konado.

De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo? (majo 1963).

Kiu ajn volas ion koni, ne povas fari alimaniere ol kontakti kun tio, t.e. vivi (praktiki) en ties medio. ... Se vi volas akiri scion, vi devas partopreni la praktikon ŝanĝi la realon. Se vi volas scii la guston de piro, vi devas ŝanĝi la piron — proprabuŝe manĝi ĝin. ... Se vi volas scii

teoriojn kaj metodojn de revolucio, vi devas partopreni revolucion. Ĉia vera scio originas el rekta sperto.

“Pri Praktiko” (julio 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Konado komenciĝas de praktiko kaj tra praktiko atingas teorian konon, kaj poste ĝi devas reiri al praktiko. La aktiva funkcio de konado manifestiĝas ne nur en la aktiva salto de percepta kono al racia kono, sed ankaŭ, kaj pli grave, en la salto de racia kono al revolucia praktiko.

“Pri Praktiko” (julio 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Ĉiuj scias, ke en farado de iu ajn afero, se oni ne konas ĝiajn cirkonstancojn, ĝian naturon kaj ĝiajn rilatojn kun aliaj aferoj, oni ja ne konas la leĝojn ĝin regantajn,

ne scias kiel agi, kaj ne sukcesos ĝin bone fari.

“Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio” (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Se oni volas sukcesi en sia laboro, t.e. atingi la antaŭkonceptitajn rezultojn, oni nepre devas konformigi siajn pensojn al la leĝoj de la objektiva ekstera mondo; alie oni malsukcesos en praktiko. Spertinte malsukceson, oni ĉerpas el ĝi lecionon kaj korektas siajn pensojn por ilin konformigi al la leĝoj de la ekstera mondo, kaj tiel povas turni malsukceson en sukceson; ĝuste en tio ĉi kuŝas la signifo de la proverboj: “Malsukceso estas la patrino de sukceso”, kaj “Falo en fosaĵon, gajno en saĝo”.

“Pri Praktiko” (julio 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Ni estas marksistoj, kaj marksismo instruas, ke en traktado de problemoj ni devas eliri ne el abstraktaj difinoj, sed el faktoj objektivaj ekzistantaj, kaj el la analizado de tiuj faktoj, trovi niajn orientilon, politikon kaj metodon.

“Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an” (majo 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Difini niajn labororientilojn laŭ efektivaj kondiĉoj estas la plej baza labormetodo, kiun ĉiuj komunistoj devas firme teni en sia memoro. Kiam ni esploras la kaŭzojn de la eraroj de ni faritaj, ni trovas, ke ili ĉiuj okazis pro tio ke ni neglektis la efektivajn kondiĉojn en la donita tempo kaj

donita loko kaj subjektive difinis niajn laborpolitikojn.

“Patolado en Konferenco de Kadroj en la Liberigita Regiono de Ŝanĥi kaj Sujĵuan” (1 aprilo 1948), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. IV.

Nur ideismo kaj metafiziko estas la plej facilaj en la mondo, ĉar laŭ tio oni povas paroli tiom multe da sensencaĵo kiom ili volas, ne bazigante ĝin sur objektiva realo kaj ne provante ĝin per objektiva realo. Materiismo kaj dialektiko, tamen, bezonas penadon. Ili nepre devas esti bazitaj sur kaj provitaj de objektiva realo. Se oni ne faras penojn, oni povas gliti en ideismon kaj metafizikon.

Enkonduka noto al *Materialoj pri la Kontraŭrevolucia Kliko de Hu Feng* (majo 1955).

Kiam ni rigardas iun aferon, ni devas ekzameni ĝian esencon kaj trakti ĝian aspekton nur kiel enkondukanton ĉe la sojlo, kaj transpaŝinte la sojlon ni devas tuj ekpreni ĝian esencon; nur tio estas fidinda kaj scienca metodo de analizo.

“Sola Fajrero Povas Bruligi Tutan Stepon” (5 januaro 1930), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La fundamenta kaŭzo de la disvolviĝo de objekto kuŝas ne ekstere, sed interne de ĝi, en ĝiaj internaj kontraŭdiroj. Tiaj kontraŭdiroj ekzistas interne de ĉiuj objektoj kaj kaŭzas iliajn movadon kaj disvolviĝon. Tiaj kontraŭdiroj interne de ĉiu objekto estas fundamenta kaŭzo de ĝia disvolviĝo, dum la interligiĝo kaj interinfluo inter ĝi kaj aliaj objektoj estas kaŭzo duavica.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Ĝi [materiisma dialektiko] konsideras eksterajn kaŭzojn kiel la kondiĉon de ŝanĝo kaj internajn kaŭzojn kiel la bazon de ŝanĝo, kaj ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj. Ovo fariĝas kokido en konvena temperaturo, sed nenia temperaturo povas ŝanĝi ŝtonon en kokidon, ĉar ĉi tiuj du ne havas la saman bazon.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

Marksisma filozofio opinias ke la leĝo de unueco de kontraŭoj estas fundamenta leĝo de la universo. Tiu ĉi leĝo ekzistas ĉie, aŭ en la natura mondo, aŭ en la homa socio, aŭ en homa penso. Kontraŭaj flankoj en kontraŭdiro samtempe unuiĝas kaj batalas inter si, kaj tiel antaŭenpuŝas la aferojn moviĝi kaj ŝanĝiĝi. Kontraŭdiroj ekzistas ĉie, sed ili diferencas en naturo laŭ la diferenco en la naturo de diversaj aferoj. Por ĉiu ajn konkreta afero, la

unueco de kontraŭoj estas kondiĉa, dumtempa, transira kaj sekve relativa, dum la batalo inter la kontraŭoj estas absoluta.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Analiza metodo estas dialektika metodo. Analizo signifas analizi la kontraŭdirojn de objektoj. Ne bone konante la vivon kaj ne vere komprenante la kontraŭdirojn pritraktatajn, estas neeble fari trafan analizon.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Konkrete analizi konkretajn kondiĉojn, Lenin diris, estas "la plej esenca objekto en marksismo, la vivanta animo de marksismo". Mankas al multaj el niaj kamaradoj analiza kapablo, kaj ili ne volas ripetade, profunde analizi kaj studi kompleksajn

aferojn, sed ŝatas fari simplan konkludon, absolute jesan aŭ absolute nean. . . De nun ni devas rebonigi tiun staton.

“Nia Studo kaj la Kuranta Situacio” (12 aprilo 1944), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La metodo de tiuj kamaradoj por rigardi problemojn estas neĝusta. Ili ne rigardas la esencajn aŭ ĉefajn flankojn de problemoj, sed emfazas la neesencajn aŭ malpli gravajn. Devas esti montrata tio, ke tiuj neesencaj aŭ malpli gravaj problemoj ne devas esti neglektataj kaj devas esti solvataj unu post alia. Sed ili ne devas esti rigardataj kiel la esencaj aŭ ĉefaj, alie ni perdos nian orientiĝon.

Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo (31 julio 1955).

En la mondo, aferoj estas komplikaj kaj deciditaj de multaj faktoroj. Ni devas

rigardi problemojn de diversaj flankoj kaj ne nur de unu.

“Pri la Ĉongking-a Intertraktado” (17 oktobro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Nur tiuj, kiuj konsideras problemojn subjektive, unuflanke kaj supraĵe, ordonas aŭ instrucas memfideme kien ajn alveninte, ne konsiderante la cirkonstancojn, ne pri-rigardante la tuton de la afero (la historion kaj la tutan nunan staton de la afero) kaj ne tuŝante la esencon de la afero (la naturon de la afero kaj la internajn rilatojn inter tiu ĉi kaj aliaj aferoj). El tiaj homoj neniu ne stumble falos.

“Pri Praktiko” (julio 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

En studo de problemo, oni devas eviti subjektivecon, unuflankecon kaj supraĵecon. Subjektiveco signifas ne scii rigardi problemon objektive, t.e., ne scii rigardi pro-

blemon el la materiisma vidpunkto. Pri tio mi jam parolis en mia artikolo *Pri Praktiko*. Unuflankeco signifas ne scii rigardi problemon ĉiuflanke. ... aŭ vidi nur la parton sed ne la tuton, vidi nur la arbojn sed ne la arbaron. Tiamaniere estas neeble trovi la metodojn por solvi kontraŭdirojn, estas neeble plenumi la taskojn de la revolucio, estas neeble bone fari komisiitajn laborojn, kaj estas neeble disvolvi korekte la ideologian lukton en la Partio. Kiam Sun Zi diris traktante pri la milita scienco: "Konu la malamikon kaj konu vin mem, kaj vi povas fari cent batalojn sen malsukceso", li aludis pri ambaŭ flankoj en batalo. Vej Ĝeng de Tang-dinastio diris: "Aŭdi de ambaŭ flankoj faras la okulojn klaraj, kredi je unu flanko faras la vidon nebula." Ankaŭ li komprenis, ke unuflankeco estas malprava. Sed niaj kamaradoj ofte rigardas problemojn unuflanke, kaj tiel ili ofte kolizias kun obstakloj. ...Lenin diris:

Por vere koni objekton ni devas kapti kaj studi ĉiujn ĝiajn flankojn, ĉiujn interligojn kaj "peradojn". Ni neniam atingos tion plene, sed la postulo pri ĉiuflankeco gardas nin kontraŭ eraroj kaj rigidiĝo.

Ni devas noti liajn vortojn en la memoro. Supraĵeco signifas ke oni ne rigardas al la karakterizaj trajtoj de kontraŭdiro en ĝia tuto, kaj al tiuj de ĉiu el ĝiaj flankoj, neas la neceson penetri profunde en la objekton kaj studi detale la karakterizaĵojn de la kontraŭdiro, kaj nur post ekrigardo de malproksime kaj senatente ekvidinte kelkajn ĝeneralajn trajtojn de la kontraŭdiro, jam volas komenci ĝin solvi (respondi demandon, solvi disputon, plenumi laboron aŭ direkti militan operacion). Tia agmaniero kondukas ĉiam al nenio krom malordo. ... Unuflankeco kaj supraĵeco estas ankaŭ subjektiveco. Ĉar ĉiuj objekte ekzistantaj objektoj estas propre interligitaj kaj regataj de siaj internaj leĝoj, do estas

subjektivisma la agmaniero de tiuj, kiuj, anstataŭ ĝuste tion speguli, nur rigardas la objektojn unuflanke aŭ supraĵe, sen kono de iliaj interligiteco kaj internaj leĝoj.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

Unuflankeco estas absoluteco en la ideologio, estas metafizika observado de problemoj. En la taksado de nia laboro, estas unuflankeco ĉion aprobi aŭ ĉion malaprobi. ...Ĉion aprobi signifas vidi nur la bonan, sed ne la malbonan; bonvenigi nur laŭdon, sed ne kritikon. Diri, ke en nia laboro kvazaŭ ĉio iras bone, tio ne kongruas kun la fakto. Ne ĉio iras bone, ekzistas ankoraŭ difektoj kaj eraroj. Sed ankaŭ ne ĉio iras malbone, ankaŭ tio ne kongruas kun la fakto. Necesas fari analizojn. Ĉion malaprobi signifas konsideri senanalize, ke ĉio estas malbone farita, ke troviĝas kvazaŭ nenio bona,

aŭ ĉio fuŝa, en tia granda afero kia estas la socialisma konstruado, en tiu ĉi granda lukto kiun faras loĝantaro nombranta centojn da milionoj da homoj. Kvankam multaj posedantoj de tia vidpunkto diferencas de tiuj kiuj gardas en si malamikecon kontraŭ la socialisma sistemo, tamen tia vidpunkto estas tre erara kaj tre malutila kaj kondukas nur al la perdo de konfido. Estas erare rigardi nian laboron el vidpunkto ĉu ĉion aprobanta ĉu ĉion malaprobanta.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

En ekzameno de problemoj, marksisto devas vidi ne nur ĝiajn partojn, sed ankaŭ ĝian tuton. Rano en putro diras: "La ĉielo estas same granda kiel la aperturo de la putro". Tio estas malvera, ĉar la ĉielo ne estas nur tiel granda kiel la aperturo de la putro. Se ĝi dirus: "Tu parto de la ĉielo estas tiel granda kiel la aperturo

de la puto", tio estus vera, ĉar ĝi konformas al la fakto.

"Pri Taktiko kontraŭ la Japana Imperiismo" (27 decembro 1935), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Ni devas ellerni rigardi problemojn ĉiuflanke, ne nur la pozitivan flankon, sed ankaŭ la negativan flankon de aferoj. Sub specifaj kondiĉoj, malbona afero povas konduki al bonaj rezultoj, dum bona afero ankaŭ povas konduki al malbonaj rezultoj.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Dum ni rekonas, ke en la ĝenerala disvolviĝo de historio, la materia decidas la spiritan kaj la socia ekzisto decidas la socian konscion; ni ankaŭ rekonas kaj devas rekoni la reagon de la spirita, la reagon de la socia konscio al la socia ekzisto kaj la reagon

de la superstrukturo al la ekonomia bazo. Tio ne estas kontraŭ materiismo, sed evito de mekanika materiismo kaj persisto en dialektika materiismo.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

Tiuj, kiuj direktas militon, ne povas akiri venkon ekster la limoj, permesitaj de la objektivaj kondiĉoj; tamen interne de tiuj ĉi limoj ili povas kaj devas aktive strebi al venko. La scenejo de agado por la komandantoj de milito devas esti konstruita sur la objektivaj eblecoj; tamen sur tiu scenejo ili povas direkti la prezentadon de multaj teatraĵoj plenaj de sono kaj koloro, potenco kaj imponco.

“Pri Longdaŭra Milito” (majo 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La homa penso devas adaptiĝi al la jam ŝanĝiĝintaj kondiĉoj. Kompreneble, neniu devas senbaze fantazii kaj plani siajn agojn super la kondiĉoj permesataj de la objektiva situacio kaj ne devas streĉi sin por fari nefareblajn aferojn. Sed la nuna problemo estas ankoraŭ tio, ke la dekstra konservativa ideologio faras malutilojn en multaj flankoj, tiel ke laboro en multaj flankoj ne povas adaptiĝi al la disvolviĝo de la objektiva situacio. La nuna problemo estas, ke aferojn fareblajn post penado multaj homoj opinias ne fareblaj.

Antaŭparolo de *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo* (27 decembro 1955).

Ni devas uzi niajn cerbojn por bone pripensi ĉiujn aferojn. Estas popoldiro: "Ĉe kunŝoviĝo de la brovoj, venas al la kapo bona ideo." Alivorte, multa pensado naskas saĝon. Por forigi la blindecon, kiu ekzistas en serioza grado en nia partio,

ni devas kuraĝigi niajn kamaradojn pri-
pensi, lerni la metodon por analizi aferojn
kaj kulturi la kutimon de analizo.

“Nia Studo kaj la Kuranta Situa-
cio” (12 aprilo 1944), *Elektitaj*
Verkoj de Maŭ Zedong, vol. III.

Se en iu ajn procezo ekzistas nombro
da kontraŭdiroj, certe el ili unu estas la
ĉefa kiu ludas gvidan kaj decidigan rolon,
dum la aliaj okupas neĉefajn kaj subordi-
gitajn poziciojn. Sekve, ĉe studo de kiu
ajn procezo, se tiu estas komplika, enha-
vanta du aŭ pli multajn kontraŭdirojn, ni
devas fari nian plejeblon por trovi la ĉefan
kontraŭdiron. Kiam tiu ĉi estas kaptita,
ĉiuj problemoj povas esti facile solvitaj.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

El la du kontraŭdiraj flankoj unu devas
esti la ĉefa kaj la alia neĉefa. La ĉefa flanko

estas tiu kiu ludas kondukan rolon en la kontraŭdiro. La karaktero de objekto estas determinata precipe de la ĉefa flanko de la kontraŭdiro, kiu okupas la regantan pozicion.

Sed tia situacio ne estas stabila; la ĉefa kaj la neĉefa flankoj de kontraŭdiro transformiĝas unu en la alian kaj sekve de tio la karaktero de objekto ankaŭ ŝanĝiĝas laŭe.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. I.

Ni devas ne nur elmeti taskojn, sed ankaŭ solvi la problemon de la metodoj uzotaj por plenumi la taskojn. Se nia tasko estas transiri riveron, ni ne povos transiri ĝin sen ponto aŭ boato. Antaŭ la solvo de la problemo de ponto aŭ boato, estas vane paroli pri transiro de la rivero. Antaŭ la

solve de la problemo de metodo, parolo pri la tasko estas nur sensenca babilo.

“Zorgu la Vivon de la Amasoj, Priatentu Metodojn de Laboro” (27 januaro 1934), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

En ĉiu ajn tasko, sen ĝenerala kaj vasta alvoko, la vastaj amasoj ne povas esti mobilizitaj por agado. Sed se la gvidantoj sin limigas nur al ĝenerala alvoko, ne konkrete kaj rekte efektivigas la alvokitan laboron profunde en kelkaj organizoj por fari breĉon je unu punkto kaj akiri sperton, kaj poste uzas tiun sperton por gvidi aliajn unuojn, ili ne havos rimedon por provi la korektecon aŭ riĉigi la enhavon de sia ĝenerala alvoko, kaj estiĝos la danĝero, ke nenio rezultos el la alvoko.

“Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado” (1 junio 1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Ĉiu ajn gvidanto, kiu ne ricevis konkretan sperton de partikularaj individuoj kaj aferoj en partikularaj subaj unuoj, certe ne kapablas fari ĝeneralan direktadon super ĉiuj unuoj. Tiu metodo devas esti disvastigata ĉie, por ke la gvidantaj kadroj en ĉiuj niveloj ellernu apliki ĝin.

“Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado” (1 junio 1943),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. III.

En ĉiu ajn loko, ne povas esti samtempe multaj centraj taskoj. En iu ajn difinita tempo povas esti nur unu centra tasko kun aldono de aliaj taskoj en dua aŭ tria vico laŭ graveco. Tial, la ĝenerala respondeculo en iu loko devas konsideri la historion kaj cirkonstancaron de la batalo de la loko kaj vicigi la diversajn taskojn en taŭga ordo; li ne devas plenumi ĉiun instrukcion tuj ĉe ĝia alveno de la supera organizo tute sen propra planado, kaj

tiel krei multon da “centraj taskoj” kaj staton de konfuzo kaj malordo. Supera organizo ankaŭ ne devas samtempe asigni multajn taskojn al malsupera organizo sen indiko pri ilia relativa graveco kaj urĝeco kaj pri tio, kiu estas la centra, ĉar tio kaŭzos konfuzon en la paŝoj prenitaj de la malsupera organizo en sia laboro kaj neniu difinita rezulto estos atingita. Laŭ la historiaj kondiĉoj kaj ekzistantaj cirkonstancoj de ĉiu loko, la gvidantoj konsideras la tutan situacion en sia planado, korekte decidas la pezcentron kaj ordon de la laboroj por ĉiu periodo kaj firme efektivigas tiun decidon por ke difinita rezulto estu nepre akirita — tio estas parto de la arto de gvidado.

“Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado” (1 junio 1943),
Elektilaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. III.

Estas necese konstante kontroli la progreson de la laboro, interŝanĝi sperton kaj korekti erarojn, sed ne atendi kelkajn monatojn, duonjaron aŭ eĉ jaron antaŭ ol okazigi resumajn kunsidojn por fari ĝeneralan kalkulon kaj ĝeneralan korekton de eraroj. Tio kaŭzas tro grandan perdon, dum tuja korekto reduktas perdon.

“Pri la Politiko Koncerne al Industrio kaj Komerco” (27 februaro 1948), *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, vol. IV.

Ne atendu, ĝis problemoj jam amasiĝas kaj estiĝas multaj tumultoj antaŭ ol peni ilin solvi. Gvidantoj nepre devas iri antaŭ la movado kaj ne malrapidi post ĝi.

Enkonduka noto al “Sezona Labor-kontrakto” (1955), *Socialisma Alttajo en la Ĉina Kamparo*, vol. III.

Tio kion ni bezonas, estas entuziasma sed trankvila spiritstato kaj intensa sed bonordema laboro.

“Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio” (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

XXIII. ENKETO KAJ STUDIO

Ĉiuj, kiuj okupas sin pri praktikaj laboroj, devas fari enketon en malsuperaj niveloj. Tia enketado estas precipe necesa por tiuj, kiuj konas nur teorion, sed ne efektivajn kondiĉojn; alie ili ne povos kunligi teorion kun praktiko. Kvankam mia aserto "sen enketo ne estas rajto de parolo" estis mokita kiel "mallarĝa empirismo", tamen mi ne bedaŭras tion diri ĝis nun; mi ne nur ne bedaŭras, sed ankoraŭ insistas, ke estas neeble havi rajton paroli sen enketo. Estas multaj homoj, kiuj "ĵus forlasis sian veturilon", tuj brue parolas kaj esprimas opiniojn, kritikante tion, riproĉante ĉi tion. Sed, fakte el dek tiaj homoj dek malsukcesos senescepte. Ĉar tiaj opinioj aŭ kritikoj,

kiuj ne estas bazitaj sur detala enketado, estas nur sensciaj kaj vantaj paroloj. Nia partio suferis nekalkuleblajn perdojn en la manoj de tiaj "revizoroj", kiuj svarmas ĉie, tie kaj ĉi tie. Stalin prave diris, ke "teorio fariĝas sencela, se ĝi ne estas kunligita kun revolucia praktiko." Kaj kompreneble li pravas denove aldonante, ke "praktiko fariĝas blinda, se ĝi ne lumigas al si la vojon per revolucia teorio." Neniu povas esti nomata "mallarĝa empiristo", escepte de la praktikulo, kiu estas blinda kaj sen perspektivo kaj malproksimvido.

"Antaŭparolo kaj Postskribo al *Kamparaj Enketoj*" (marto kaj aprilo 1941), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. III.

Alpreni tian sintenon estas serĉi veron el faktoj. "Faktoj" estas ĉiuj aferoj objektive ekzistantaj, "vero" signifas iliajn internajn rilatojn, t.e., la leĝojn kiuj regas ilin, kaj "serĉi" signifas studi. Ni devas ekiri el

la efektivaj kondiĉoj en kaj ekster la lando, provinco, gubernio aŭ distrikto, kaj tiri el ili, kiel orientilon de nia agado, leĝojn, kiuj estas propraj al ili, sed ne imagitaj, t.e., trovi la internajn rilatojn de la eventoj, kiuj okazas ĉirkaŭ ni. Por tiel fari, ni ne devas nin apogi sur subjektiva imago, momenta entuziasmo aŭ senvivaj libroj, sed sur faktoj objekte ekzistantaj; ni devas detale posedi la materialon kaj tiri el ĝi korektan konkludon sub la gvido de la ĝeneralaj principoj de marksism-leninismo.

“Reformu Nian Studon” (majo 1941), *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, vol. III.

Agi kiel “homo kaptanta paserojn kun ŝtopitaj okuloj” aŭ “blindulo palpe serĉanta fiŝojn”, esti maldelikata kaj senatenta, paroli bombaste kaj kontentiĝi je guto da scio, tia ekstreme malbona laborstilo, stilo tute kontraŭa al la fundamenta spirito de marksism-leninismo, ankoraŭ ekzistas inter mul-

taj kamaradoj en nia partio. Marks, Engels, Lenin kaj Stalin instruis nin, ke ni konsciencie esploru la kondiĉojn kaj ekiru el objektiva realeco, sed ne el subjektivaj deziroj. Tamen multaj el niaj kamaradoj agas rekte kontraŭ tiu ĉi vero.

“Reformu Nian Studon” (majo 1941), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. III.

Ĉu vi ne povas solvi iun problemon? Faru do enketon pri ĝia nuna stato kaj ĝia historio! Kiam pere de enketo vi plene konis la aferon, vi jam trovos rimedon por solvi ĝin. Ĉiuj konkludoj naskiĝas post enketado, kaj ne antaŭ ĝi. Nur stultulo rompas al si la kapon sola, aŭ kune kun grupo da personoj, por “elpensi rimedon” aŭ “elkovi ideon” sen fari ian enketon. Oni devas scii ke tiamaniere li certe ne povos elpensi bonan rimedon nek trovi trafan ideon.

Kontraŭ Libroadorado (majo 1930).

Enketado similas al longaj monatoj de gravedeco, kaj solvo de problemo al la tago de akuŝo. Enketi ja estas solvi problemon.

Kontraŭ Libroadorado (majo 1930).

Oni aplikas la teorion kaj metodon de marksism-leninismo en la sistema kaj detala enketado kaj studado pri la ĉirkaŭaĵoj. Li ne laboras sole kun entuziasmo, sed, kiel Stalin diris, kombinas revolucionan temperamenton kun praktika spirito.

“Reformu Nian Studon” (majo 1941), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La sola metodo por koni la kondiĉojn estas fari sociajn enketojn, enketi la kondiĉojn de ĉiu socia klaso en reala vivo. Por kiuj respondecas pri gvida laboro, la plej fundamenta metodo por koni la kondiĉojn estas laŭplane fari kelkajn detalajn

enketojn koncentre pri kelkaj urboj aŭ vilaĝoj laŭ la fundamenta vidpunkto de marksismo, t.e., la metodo de klasa analizo.

“Antaŭparolo kaj Postskribo al *Kamparaj Enketoj*” (marto kaj aprilo 1941), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Por enketa kunveno, ne necesas ĉiufoje ĉeesto de multaj homoj; sufiĉas 3-5 aŭ 7-8 personoj. Por tio oni devas disponi sufiĉan tempon kaj havi skizon de enketo; oni devas ankaŭ demandi kaj noti persone kaj diskuti kun la ĉeestantoj. Tial, oni certe ne povas fari enketon aŭ bone plenumi ĝin, se al li mankas granda fervoro, decido direkta siajn okulojn malsupren, soifo al scio kaj la spirito delasi sian aĉan malhumilan teniĝon kaj fariĝi volonta lernanto.

“Antaŭparolo kaj Postskribo al *Kamparaj Enketoj*” (marto kaj aprilo 1941), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Ĝustaj aranĝoj de komandanto devenas de liaj ĝustaj decidoj, liaj ĝustaj decidoj devenas de liaj ĝustaj juĝoj, kaj liaj ĝustaj juĝoj devenas de detala kaj necesa rekognosko kaj de sistema medito pri la diversaj materialoj kolektitaj dum rekognosko. La komandanto aplikas ĉiujn eblajn kaj necesajn rekognoskajn rimedojn, meditas pri la akiritaj informoj pri la malamika situacio, forigante la senvalorajn kaj prenante la esencajn, forigante la falsajn kaj konservante la verajn, procedante de ĉi tiu al tiu kaj de la supraĵo al la interno; kaj tiam li alprenas la kondiĉojn de sia propra flanko en la kalkulo kaj faras komparon kaj studas la rilatojn inter ambaŭ flankoj, kaj tiel formas siajn juĝojn, faras decidon kaj ellaboras siajn planojn. Jen estas la kompleta procezo de konado de situacio, kiun milita strategiisto trapasas antaŭ ol li ellaboras

ĉiun strategian, kampanjan aŭ batalan planon.

“Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio” (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

XXIV. KOREKTO DE ERARAJ IDEOJ

Eĉ se ni gajnis gigantan sukceson en nia laboro, ankaŭ ne estas ia ajn kialo por fieri kaj aroganti. Modesteco igas nin progresi kaj fiereco igas nin postresteti. Tiun veron ni devas ĉiam memori.

*Inaŭgura Parolado ĉe la Oka Tutlanda
Kongreso de la Komunista Partio de
Ĉinio (15 septembro 1956).*

Pro la venko, eble kreskos en la Partio la humoroj de aroganteco, de memtitolita meritulo, de stagnado kaj senvoleco por progreso kaj de avido al plezurĝuado kaj malinklino al plua malfacila vivo. Pro la venko, la popolo estos danka al ni kaj ankaŭ la burĝoj venos nin' flati. Ke la

militfortoj de la malamikoj ne povas konkeri nin, tio estas jam pruvita. Tamen, la flatado de la burĝoj eble konkeros la malfortvolulojn en niaj vicoj. Eble troviĝas tiaj komunistoj, kiuj estas neniam konkeritaj de la malamikoj kun pafiloj kaj meritas la titolon de heroo antaŭ tiuj malamikoj, sed ne povas rezisti kontraŭ la atako per sukertegitaj obusoj, kaj antaŭ tiuj ili estos venkitaj. Ni devas antaŭgardi kontraŭ tia situacio.

“Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio” (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Multaj aferoj povas fariĝi nia balasto aŭ ŝargô, se ni nur falis en blindecon pri ili kaj perdis memkonscion. Ni prenu kelkajn ekzemplojn. Farinte erarojn, oni povas pensi ke ĉiuokaze li jam eraris, kaj

fariĝi de tiam tute malkuraĝigita; ne farinte erarojn, oni povas senti ke li estas senerara, kaj fariĝi de tiam fiero. Manko de atingoj en laboro povas naski pesimismon kaj deprimatecon; atingoj en laboro male povas kaŭzi fierecon kaj arogantecon. Kamarado kun mallonga historio de batalo povas tial eviti respondecon, dum veterano povas fariĝi obstina pro sia longa historio de batalo. Laboristoj kaj kamparanoj povas fiere rigardi de supre intelektulojn, pro sia glora klasa origino; dum intelektuloj, pro siaj kelkaj scioj, povas fiere rigardi de supre laboristojn kaj kamparanojn. Ĉiu ajn faka lerteco povas fariĝi kapitalo por konduki sin al aroganteco kaj malestimi aliajn. Eĉ aĝo povas fariĝi ilo de fiero. La junuloj, pro sia saĝo kaj kapablo, povas malestimi la maljunulojn; kaj la maljunuloj, pro sia riĉa sperto, povas malestimi la junulojn.

Ĉiuj tiaj aferoj povas fariĝi ŝarĝo aŭ balasto, se mankas al ni memkonscio.

“Nia Studo kaj la Kuranta Situacio” (12 aprilo 1944), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Iuj kamaradoj laborantaj en la armeo fariĝis arogantaj kaj agas tirane kontraŭ la soldatoj, popolo, registaro kaj Partio; ili riproĉas nur la kamaradojn farantajn lokajn laborojn sed ne sin mem, vidas nur siajn atingojn sed ne siajn mankojn, ŝatas nur flatajn vortojn sed ne kritikajn. ...la armeo devas klopodi por forigi tiujn difektojn.

“Organiziĝu!” (29 novembro 1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Peniga laboro estas kiel ŝarĝo metita antaŭ ni defiante nin por ĝin surŝultrigi. Iuj ŝarĝoj estas malpezaj kaj iuj pezaj. Iuj homoj preferas la malpezajn ol la pezajn, ili elektas la malpezajn kaj ŝovas la pezajn

al aliaj. Tio ne estas bona sinteno. Iuj kamaradoj agas malsame; ili lasas ĝuon kaj komforton al aliaj kaj portas mem la pezajn ŝarĝojn; ili estas la unuaj por porti malfacilojn, la lastaj por ĝui komfortojn. Tiaj kamaradoj estas bonaj kamaradoj. Ni ĉiuj devas lerni tian komunistan spiriton.

“Pri la Ĉongking-a Intertraktado”
(17 oktobro 1945), *Elektitaj Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. IV.

Estas ne malmultaj homoj, kiuj ne konscias sian devon al la laboro, preferante la malpezan kaj evitante la malfacilan, ŝarĝante aliajn per pezaj taskoj kaj elektante por si la facilajn. Antaŭ ĉiu afero, ili unue kalkulas por si mem kaj poste por la aliaj. Farinte tion, ili eksentas ke ili havas grandan meriton, kaj ŝatas sinlaŭdi, timante ke aliaj ne scias. Kaj al kamaradoj kaj la popolo, anstataŭ esti plenkore varmaj, ili estas malvarmakoraj, indiferentaj kaj sensentaj. Tiaj homoj en efektiveco ne estas komunistoj

aŭ almenaŭ ne estas kalkuleblaj kiel puraj komunistoj.

“Memore al Norman Bethune”
(21 decembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Tiuj, kiuj insistas pri tia speco de “sendependeco”, estas ofte nedisigeble ligitaj kun la doktrino de “mi la unua”, kaj ili ĝenerale sintenas erare en la problemo de la rilato inter la individuo kaj la Partio. Kvankam parole ili ankaŭ konfesas respekton al la Partio, tamen en praktiko ili metas sin sur la unuan lokon kaj la Partion sur la duan. Al kio strebas tiuj homoj? Ili strebas al famo kaj pozicio kaj volas sin montri antaŭ la publiko. Kiam ili mastrumas branĉon de laboro, ili insistas pri “sendependeco”. Ĉion ĉi celante, ili altiras iujn, forpuŝas aliajn kaj sinturnas al fanfaronado, flatado kaj subtirado inter la kamaradoj, tiel enportante la vulgaran stilon de la burĝaj politikaj partioj en la

Komunistan Partion. Estas ilia malhonesteco, kio kaŭzas al ili perdon. Mi pensas, ke ni devas agi honeste; sen honesta sinteno, estas absolute neeble sukcese plenumi iajn laborojn en la mondo.

“Ĝustigo de la Partia Laborstilo”
(1 februaro 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Komunistoj devas kompreni la principon de subordigo de la bezonoj de la parto al tiuj de la tuto. Se iu propono ŝajnas akceptebla laŭ la situacio en parto, sed neakceptebla laŭ la situacio en la tuto, tiam la parto devas submetiĝi al la tuto. Inverse, se iu propono ŝajnas neakceptebla laŭ la situacio en parto, sed akceptebla laŭ la situacio en la tuto, en tia okazo la parto devas ankaŭ

submetiĝi al la tuto. Jen estas la vidpunkto de konsidero pri la situacio en la tuto.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Plezurserĉado. Ankaŭ en la Ruĝa Armeo ne estas malmultaj, kies individuismo esprimiĝas en plezurserĉado. Ili ĉiam esperas ke ilia trupo marŝos en grandajn urbojn. Ili volas iri tien ne por labori sed por ĝui. Ili malplej deziras labori en la ruĝaj areoj kie vivo estas malfacila.

“Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio” (decembro 1929), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Ni devas oponi la tendencon de egoisma departementismo zorgi nur pri la interesoj de sia propra departemento, ignorante tiujn de la aliaj. Ĉiu, kiu estas indiferenta pri la malfaciloj de aliaj, rifuzas transigi

siajn subajn kadrojn al aliaj departementoj okaze de peto, aŭ sendas nur la malpli bonajn, "uzante la najbaran kampon kiel ellasejon de sia superakvo" kaj farante neniom da konsidero por aliaj departementoj, aliaj lokoj aŭ aliaj homoj, estas egoisma departementisto, kiu tute perdis la komunisman spiriton. Manko de konsidero pri la tuto kaj plena indiferento al aliaj departementoj, aliaj lokoj aŭ aliaj homoj estas karakterizaĵoj de egoisma departementisto. Ni devas intensigi nian edukadon al tiaj personoj por ke ili komprenu, ke tio ja estas sektisma tendenco, kio fariĝos tre danĝera, se lasita plu disvolviĝi.

"Ĝustigo de la Partia Laborstilo"
(1 februaro 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. III.

Liberalismo havas diversajn manifestiĝojn.

Lasi aferojn preterŝoviĝi pro paco kaj amikeco, klare sciante ke iu eraras, kaj ne

fari principan disputon, ĉar li estas konatulo, samlokano, kunlernanto, intima amiko, karulo, malnova kolego aŭ malnova subulo. Aŭ tuŝeti la aferojn supraĵe, anstataŭ solvi ilin ĝisfunde, por konservi pacan atmosferon. Rezulte, tio estos malutila al la organizo kaj ankaŭ al la individuo. Tio ĉi estas la unua tipo de liberalismo.

Fari senrespondecan kritikon private anstataŭ proponi aktive al la organizo. Nenion diri vidalvide, sed klaĉi postdorse; nenion diri en kunveno, sed klaĉi poste. Tute neglekti la principon de kolektiva vivo sed nur libere agi laŭvole. Tio ĉi estas la dua tipo.

Apudmeti aferojn se tiuj onin ne koncernas; preferi diri malmulte, klare sciante, ke io eraras; sagace sin protekti kaj nur deziri eviti kulpon. Tio ĉi estas la tria tipo.

Ne obei ordonon sed meti sian propran opinion sur la unuan lokon. Nur postuli specialan zorgon de la organizo sed rifuzi

ĝian disciplinon. Tio ĉi estas la kvara tipo.

Ne batali kaj argumenti kontraŭ neĝustaj opinioj por unuiĝo, progreso kaj plibonigo de laboro, sed fari personan atakon, kvereli, verŝi personan malamon kaj intenci venĝon. Tio ĉi estas la kvina tipo.

Aŭdinte neĝustajn opiniojn ne refuti ilin kaŝe eĉ aŭdinte parolojn de kontraŭrevolu-ciuloj ne raporti ilin, sed anstataŭe trakti ilin trankvile, kvazaŭ nenio okazus. Tio ĉi estas la sesa tipo.

Estante inter la amasoj ne fari propagandon kaj agitadon, ne fari paroladon, ne fari enketon kaj demandon, ne zorgi pri ilia doloro kaj sufero, estante tute indiferenta pri ili, forgesi ke oni mem estas komunisto, intermiksante komuniston kaj ĝeneralan popolanon. Tio ĉi estas la sepa tipo.

Vidante iun damaĝi la interesojn de la popolamaso ne senti indignon, ne fari admonon, ne haltigi lin, ne klarigi al li kaj lasi lin daŭre tion fari. Tio ĉi estas la oka tipo.

Labori neserioze, ne havi difinitan planon, nek difinitan direkton, esti indiferenta al la laboro kaj lasi la aferon drivi — “Kiel longe oni restas monaĥo, tiel longe oni sonorigas la sonorilon.” Tio ĉi estas la naŭa tipo.

Konsideri sin meritoplena al revolucio, paradi je sia veteraneco, ne taŭgi por grandaj aferoj, sed malestimi la malgrandajn, esti malzorga en laboro kaj malstreĉita en lernado. Tio ĉi estas la deka tipo.

Jam bone scii sian eraron sed ne voli ĝin korekti, precnante liberalisman sintenon al si mem. Tio ĉi estas la dekunua tipo.

“Kontraŭ Liberalismo” (7 septembro 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Liberalismo estas ekstreme malutila en revolucia kolektiva organizo. Ĝi estas korodilo, kiu damaĝas solidarecon, malkohherigas la rilatojn, kaŭzas apation en laboro kaj kreas malakordon en opinio.

Ĝi rabas de la revolucia vicaro kompaktan organizon kaj striktan disciplinon, malhelpas la politikojn ĝisfunde efektiviĝi, kaj apartigas la partian organizon disde la amasoj kiujn gvidas la Partio. Tio ĉi estas serioza malbona tendenco.

“Kontraŭ Liberalismo” (7 septembro 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Liberalisto rigardas la principojn de marksismo kiel abstraktan dogmon. Ili aprobas marksismon, sed ne intencas ĝin praktiki, aŭ ne intencas komplete ĝin praktiki, ne intencas anstataŭi sian liberalismon per marksismo. Tiuj ĉi homoj ja havas marksismon kaj ankaŭ liberalismon: ili parolas marksismon sed praktikas liberalismon; ili aplikas al aliaj marksismon sed al si mem liberalismon. Ili konservas ambaŭ specojn de varoj, el kiuj ĉiu havas sian

propran utilon. Tio ĉi estas la pensmetodo de iuj homoj.

“Kontraŭ Liberalismo” (7 septembro 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La popola ŝtato protektas la popolon. Nur kiam ekzistas la popola ŝtato, la popolo povas sin eduki kaj reformi per demokratia metodo en tutlanda kaj tutpopola skalo, sin liberigi de la influo de enlandaj kaj eksterlandaj reakciuloj (tiu ĉi influo nun estas ankoraŭ tre granda, daŭros longtempe, kaj ne povas esti rapide forigita), reformi siajn malbonajn kutimojn kaj ideojn akiritajn en la malnova socio, ne permesi sin suriri eraran vojon montritan de la reakciuloj kaj daŭre marŝi antaŭen, antaŭen al socialisma socio kaj komunisma socio.

“Pri Popol-demokratia Diktaturo” (30 junio 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ne estas malfacile por iu fari iom da bono. Malfacile estas fari bonon la tutan vivon kaj neniam malbonon, agi konstante en la interesoj de la vastaj amasoj, la junuloj kaj la revolucio, kaj sin okupi je peniga batalo por jardekoj kiel en unu tago. Tio estas la plej plej malfacila afero el ĉio!

“Saluta Parolo por la 60-a Datreveno de la Naskiĝtago de Kamarado Vu Juĝang” (15 januaro 1940).

XXV. UNUIĜO

La unuiĝo de la lando, la solidareco de la popolo kaj la solidareco de niaj diversaj nacioj — jen estas la fundamentaj garantioj por la nepra triumfo de nia afero.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Nur pere de la unuiĝo de la Komunista Partio oni povas atingi la unuiĝon de la tuta klaso kaj la tuta nacio, kaj nur pere de la unuiĝo de la tuta klaso kaj la tuta nacio, oni povas venki la malamikon kaj plenumi la taskon de nacia kaj demokratia revolucio.

“Lukti por Gajni la Amasojn en Milionoj por la Kontraŭjapana Nacia Unuecfrento” (7 majo 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. I.

Ni devas solide unuigi ĉiujn fortojn de nia partio sub la organizaj kaj disciplinaj principoj de demokratia centralizismo. Ni devas unuigi kun ĉiu ajn kamarado, se nur li pretas obei al la programo, statuto kaj rezolucioj de la Partio.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, vol. III.

En 1942 ni konkretigis tiun ĉi demokratian metodon por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo en la formulon “unuigo — kritiko — unuigo”. Por pli detale diri, ĝi signifas: starti de la deziro por unuigo, solvi kontraŭdirojn per kritiko aŭ batalo kaj tiamaniere atingi novan unuigon sur nova bazo. Nia sperto montras, ke ĝi estas ĝusta metodo por solvi kontraŭdirojn interne de la popolo.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Tiu ĉi armeo havas tre bonan unuiĝon interne kaj ekstere. Interne, estas unuiĝo inter oficiroj kaj soldatoj, inter superuloj kaj subuloj kaj inter militaj, politikaj kaj postfrontaj laboroj; ekstere, estas unuiĝo inter la armeo kaj la popolo, inter la armeo kaj registaraj organizaĵoj kaj inter nia armeo kaj la amikaj armeoj. Estas devige venki ĉion kio malhelpas al unuiĝo.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

XXVI. DISCIPLINO

Interne de la popolo, demokratio estas korelativa al centralizismo, dum libereco al disciplino. Ili estas du kontraŭdirantaj flankoj de unueca ento, kiuj estas kaj kontraŭdiraj kaj unuecaj, kaj ni ne devas unuflankece emfazi unu flankon kaj nei la alian. Interne de la popolo, ne povas esti sen libereco, nek sen disciplino; ne povas esti sen demokratio, nek sen centralizismo. La unueco de demokratio kaj centralizismo kaj tiu de libereco kaj disciplino estas nia demokratia centralizismo. Sub tiu ĉi sistemo, la popolo ĝuas vastajn demokration kaj liberecon, sed samtempe ili devas sin limigi per socialisma disciplino.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Estas necese denove priatentigi la disciplinon de la Partio:

(1) submetiĝo de individuo al la organizo;

(2) submetiĝo de malplimulto al la plimulto;

(3) submetiĝo de malalta nivelo al la plialta; kaj

(4) submetiĝo de la tuta membraro al la Centra Komitato.

Kiu malobservas tiujn disciplinajn regulojn, ja rompas la unuecon de la Partio.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Unu el la postuloj de partia disciplino estas la submetiĝo de la malplimulto al la plimulto. Se la opinio de la malplimulto estas rifuzita, ĝi devas subteni la decidon aprobitan de la plimulto. Okaze de neceso, ĝi povas proponi rekonsideron en la sekva kunveno, alie, nenia esprimo de

opono kontraŭ la decido estas permesebla en agado.

“Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio” (decembro 1929), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La Tri Ĉefaj Reguloj de Disciplino estas la jenaj:

- (1) Obeu ordonojn en ĉiuj viaj agoj.
- (2) Ne prenu de la amasoj eĉ kudrilon aŭ fadenon.
- (3) Elliveru ĉion militkaptitan.

La Ok Punktoj de Atentigo estas la jenaj:

- (1) Parolu afable.
- (2) Aĉetu kaj vendu juste.
- (3) Redonu ĉion prunteprenitan.
- (4) Pagu por ĉio de vi difektita.
- (5) Ne batu aŭ insultu.
- (6) Ne damaĝu plantaĵojn.
- (7) Ne flirtu kun virinoj.

(8) Ne malbontraktu militkaptitojn.

“Je la Refoja Publikigo de la Tri Ĉefaj Reguloj de Disciplino kaj la Ok Punktoj de Atentigo — Instrukcio de la Ĉefkomandejo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo” (10 oktobro 1947), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Ili [ĉiuj oficiroj kaj soldatoj de nia armeo] devas levi sian disciplinemon kaj firme plenumi ordonojn, efektivigi nian politikon, observi la Tri Ĉefajn Regulojn de Disciplino kaj la Ok Punktojn de Atentigo — kun unueco inter armeo kaj popolo, unueco inter armeo kaj registaro, unueco inter oficiroj kaj soldatoj kaj unueco en la tuta armeo — kaj nenia ajn rompo de disciplino estas permesata.

“Manifesto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo” (oktobro 1947), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

XXVII. KRITIKO KAJ MEMKRITIKO

La Komunista Partio ne timas kritikojn, ĉar ni estas marksistoj, la vero estas ĉe ni, kaj la bazaj amasoj laboristaj kaj kamparanaj estas ĉe ni.

*Parolado en la Tutlanda Konferenco
de la Komunista Partio de Ĉinio pri
Propaganda Laboro (12 marto 1957).*

Ĝisfundaj materiistoj nenion timas. Ni esperas, ke ĉiuj, kiuj luktas kune kun ni, kuraĝe prenu sur sin la respondecon, superu la malfacilojn, ne timu malsukcesojn, ne timu komentojn kaj mokojn, kaj ne timu fari kritikojn kaj proponojn al ni komunistoj. Diras proverbo: "Se mortpunon per mil tranĉoj oni spitas, imperiestron tiri de sur ĉevalo oni ne hezitas." Ni devas

havi tian sentiman spiriton en la lukto por socialismo kaj komunismo.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Ni havas la marksism-leninisman armilon de kritiko kaj memkritiko. Ni povas forigi la malbonan stilon kaj konservi la bonan.

“Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio” (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Konsciencia praktikado de memkritiko estas ankaŭ unu el la okulfrapaj signoj, kiuj distingas nian partion disde la aliaj politikaj partioj. Ni iam diris, ke ĉambro devas esti konstante purigata, alie polvo akumuligos en ĝi; la vizaĝo devas esti konstante lavata, alie ĝi estos polvokovrita. Ankaŭ la mensoj de niaj kamaradoj kaj la laboroj de nia

partio povas esti polvumitaj kaj ankaŭ devas esti lavataj kaj purigataj. “Akvo fluanta neniam putras, kaj pordĉarniro neniam estas de vermoj mordita”, ĉar en konstanta moviĝado ili rezistas kontraŭ la korodo de mikroboj kaj aliaj vivaĵoj. Por ni, konstante kontroladi la laborojn kaj disvolvi demokratian stilon en la procezo de kontrolado, timi nek kritikon nek memkritikon, kaj apliki la utilajn maksimumojn de la ĉina popolo, kiel: “diru ĉion kion vi scias kaj diru ĝin sen rezervo”, “ne kulpigu la parolanton, sed prenu liajn vortojn kiel averton”, “se vi havas erarojn, korektu ilin; se ne, gardu vin kontraŭ ili”, estas la sola efika rimedo por rezisti kontraŭ la korodo de diversaj specoj de politika polvo kaj politikaj mikroboj al la mensoj de niaj kamaradoj kaj la organismo de nia partio.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Kontraŭstaro kaj batalo inter malsamaj ideoj konstante okazas en la Partio, tio estas reflektado interne de la Partio de la kontraŭdiroj inter la klasoj kaj inter la nova kaj malnova aferoj en la socio. Se en la Partio ne estus kontraŭdiroj kaj ideologiaj bataloj por solvi tiujn kontraŭdirojn, la vivo de la Partio ankaŭ finiĝus.

“Pri Kontraŭdiro” (aŭgusto 1937),
Elektitaj Verkoj de Mao Zedong,
vol. I.

Ni estas por aktiva ideologia lukto, ĉar ĝi estas la armilo por atingi unuiĝon interne de la Partio kaj la revoluciaj organizoj por ke ĝi estu utila al nia batalo. Ĉiu komunisto kaj revoluciulo devas preni tiun ĉi armilon.

Sed liberalismo nuligas ideologian lukton kaj staras por senprincipa paco, kaj rezulte kaŭzas dekadencan, filistran stilon kaj kondukas al politika degenero de iuj unuoj

kaj individuoj de la Partio kaj la revoluciaj organizoj.

“Kontraŭ Liberalismo” (7 septembro 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Oponante kontraŭ subjektivismo, sektismo kaj partia formalisma verkmaniero, ni devas nepre atenti du celojn: unue, “lerni el pasintaj eraroj por eviti la estontajn”, kaj due, “kuraci la malsanon por savi la homon”. La erarojn de la pasinteco oni nepre devas malkaŝi sen indulgo al ies ajn sentemo; kaj estas necese analizi kaj kritiki la pasintajn malbonaĵojn kun scienca sinteno, por ke oni faru la laboron en la estonteco pli zorgeme kaj pli bone. Tio estas la signifo de “lerni el pasintaj eraroj por eviti la estontajn”. Tamen, nia celo en malkaŝado de eraroj kaj kritikado de mankoj, same kiel tiu de kuracisto kuracanta malsanon, estas nur savi la homon kaj ne kuraci lin al morto. Kiam al homo su-

feranta apendiceton la ĥirurgo forigas la apendicon, li do estas savita. Ĉiun, kiu faris erarojn, se li nur ne kaŝas sian malsanon por eviti kuracadon, ne obstinas en siaj eraroj ĝis li fariĝos nekuracebla, kaj honeste kaj sincere deziras esti kuracita kaj korekti siajn erarojn, ni do devas bonvenigi kaj kuraci lian malsanon por ke li fariĝu bona kamarado. Ni ne povas sukcesi en tio per senbrida skurĝado por momenta kontentiĝo. En traktado de ideologia aŭ politika malsano, oni nepre ne devas esti kruda kaj senpripensa, sed devas alpreni la sintenon "kuraci la malsanon por savi la homon", kio estas la sola korekta kaj efika metodo.

"Ĝustigo de la Partia Laborstilo"
(1 februaro 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Alia punkto, kiu devas esti menciata koncerne al kritiko interne de la Partio, estas ke iuj kamaradoj ignoras en kritikado

la pli gravajn problemojn sed limigas sian atenton nur al malpli gravaj aferoj. Ili ne komprenas ke la ĉefa tasko de kritiko estas montri politikajn kaj organizajn erarojn. Koncerne al personaj mankoj, se ili ne rilatas kun politikaj kaj organizaj eraroj, ne estas necese tro kritiki, alie la koncernaj kamaradoj konfuziĝos nesciante kion fari. Cetere, se tia kritiko disvolviĝas, estiĝos la granda danĝero, ke en la Partio atento koncentriĝos ekskluzive sur malgravajn difektojn, kaj ĉiuj fariĝos timemaj kaj trosingardemaj pri malgravaj aferoj kaj forgesos la politikajn taskojn de la Partio.

“Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio” (decembro 1929), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. I.

En kritiko interne de la Partio, oni devas gardi sin kontraŭ subjektiveco, arbitreco kaj la trivialigo de kritiko; asertoj devas

baziĝi sur faktoj kaj kritiko devas emfazi la politikan flankon.

“Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio” (decembro 1929), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Kritiko interne de la Partio estas armilo por fortigi ĝian organizon kaj pliigi ĝian batalforton. En la partia organizo de la Ruĝa Armeo, tamen, kritiko ne ĉiam estas de tia karaktero, kaj kelkfoje ĝi turniĝas en personan atakon. Rezulte, ĝi damaĝas ne nur individuojn, sed ankaŭ la partian organizon. Tio estas manifesto de etburĝa individuismo. La metodo de korektado estas komprenigi al partianoj ke la celo de kritiko estas pliigi la batalforton de la Partio por atingi venkon en la klasbatalo kaj ke kritiko ne devas esti uzata kiel rimedo por ataki personon.

“Pri Korekto de Eraraj Ideoj en la Partio” (decembro 1929), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Ĉar ni servas al la popolo, sekve se ni havas mankojn, ni ne timas, ke aliaj ilin montras kaj kritikis. Ĉiu ajn povas montri al ni niajn mankojn, kaj ni estas pretaj korekti ilin, se li nur kritikis prave. Kaj ni tuj akceptas proponon de iu ajn, se nur la propono estas utila al la popolo.

“Servu al la Popolo” (8 septembro 1944), *Elektitaj Verkoj de Mao Zedong*, vol. III.

Ni ĉinaj komunistoj, kiuj prenas la plej grandajn interesojn de la plej vastaj amasoj de la ĉina popolo kiel nian elirpunkton, estas konvinkitaj pri la plena justeco de nia afero, domaĝas nenian personan oferon kaj estas ĉiam pretaj oferi la vivon por nia afero. Ĉu ni povas esti ne volontaj forĵeti iajn ajn ideojn, vidpunktojn, opiniojn aŭ metodojn, kiuj ne konformas al la bezonoj de la popolo? Ĉu ni povas bonvenigi iajn ajn politikan polvon kaj politikajn mikrobojn makuli nian puran vizaĝon kaj

korodi nian sanan organismon? Sennom-
braj revoluciaj martiroj oferis sian vivon
por la interesoj de la popolo, tiel ke ĉiu el
ni vivantoj estas plena de doloro en
la koro kiam ni ekmemoras ilin — ĉu povas
esti ia ajn persona intereso, kiun ni ne
povas oferi, aŭ ia ajn eraro, kiun ni ne
povas forĵeti?

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo
1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ
Zedong*, vol. III.

Ni ne devas fariĝi memkontentaj ekvi-
dinte ian sukceson. Ni devas deteni nin
de memkontentemo kaj konstante kritiki
niajn mankojn, tiel same kiel ni ĉiutage
lavas niajn vizaĝojn aŭ balaas la plankon
por purigi ilin kaj forigi la polvon.

“Organiziĝu!” (29 novembro
1943), *Elektitaj Verkoj de Maŭ
Zedong*, vol. III.

Rilate al kritiko, faru ĝin en ĝusta tempo; ne eniru en la kutimon kritiki nur post la evento.

*Pri la Problemo de Agrikultura
Kooĉerigo* (31 julio 1955).

La eraroj kaj la repuŝoj nin instruis, tiel ke ni fariĝis pli saĝaj kaj faris niajn aferojn pli bone. Estas malfacile por iu ajn partio aŭ persono eviti erarojn, sed ni devas erari kiel eble plej malmulte. Kiam eraro estas farita, ni devas ĝin korekti, ju pli rapide kaj ĝisfunde, des pli bone.

“Pri Popol-demokratia Diktaturo”
(30 junio 1949), *Elektitaj Verkoj de
Maŭ Zedong*, vol. IV.

XXVIII. KOMUNISTOJ

Komunisto devas esti senkaŝa en la animo, fidela, aktiva, rigardi la interesojn de la revolucio kiel sian unuan vivon kaj subigi siajn personajn interesojn al tiuj de la revolucio; ĉiam ajn kaj ĉie ajn firmteni ĝustajn principojn kaj konduki senlaca luktadon kontraŭ ĉiuj neĝustaj ideoj kaj kondutoj por firmigi la kolektivian vivon de la Partio kaj fortigi la kunligon inter la Partio kaj la amasoj; zorgi la Partion kaj amasojn pli multe ol la individuon, zorgi aliajn pli multe ol sin mem. Nur tiel li povas esti konsiderata kiel komunisto.

“Kontraŭ Liberalismo” (7 septembro 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Estas necese komprenigi al ĉiu kamarado ke la plej alta normo de ĉiuj paroloj kaj agoj de komunistoj estas tio, ke ili devas esti konformaj al la plej grandaj interesoj de la plej vastaj popolamasoj kaj ĝui la subtenon de la plej vastaj popolamasoj.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Komunistoj devas neniam kaj nenie meti la personajn interesojn sur la unuan lokon, sed subordigi ilin sub la interesoj de la nacio kaj de la popolamasoj. Tial, egoismo, malstreĉiĝo en laboro, koruptiĝo, sinmontremo k.s. estas plej malestimindaj; dum kompleta senegoismo, laboro kun plena energio kaj aktiveco, tutkora sindeviĝo al publika devo, kaj spirito de silenta penado en malfaciloj estas respektindaj.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Komunistoj devas esti ĉiam pretaj persisti ĉe la vero, ĉar ĉiu ajn vero konformas al la interesoj de la popolo; komunistoj devas esti ĉiam pretaj korekti siajn erarojn, ĉar ĉiu ajn eraro ne konformas al la interesoj de la popolo.

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Pri ĉiu ajn afero komunistoj devas demandi per kial, turni kaj returni ĝin detale per sia propra cerbo kaj pripensi, ĉu ĝi estas konforma al realo kaj vere prava; ili absolute ne devas sekvi ion blinde, nek stimuli sklavismon.

“Ĝustigo de la Partia Laborstilo” (1 februaro 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Ni devas stimuli la zorgadon pri la interesoj de la tuto. Ĉiu membro de la Partio, ĉiu laboro en limigita parto, ĉiu diro

aŭ ago devas preni la interesojn de la tuta Partio kiel elirpunkton; estas absolute ne-permeseble atenci tiun ĉi principon.

“Ĝustigo de la Partia Laborstilo”
(1 februaro 1942), *Elektitaj Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. III.

Komunistoj devas esti modelo de serĉado de vero el faktoj kaj modelo de malproksimvido. Ĉar nur tiuj, kiuj serĉas veron el faktoj, povas plenumi la difinitajn taskojn; nur tiuj, kiuj vidas malproksimen, povas ne perdi direkton de antaŭeniĝo.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito”
(oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. II.

Komunistoj devas esti plej malproksimvidaj, plej sinoferemaj, plej firmaj, kaj cetere plej bone scipovantaj senantaŭjuĝe kompre-

numi cirkonstancojn, sin apogi sur la plimulto de la amasoj kaj gajni ilian subtenon.

“La Taskoj de la Komunista Partio de Ĉinio en la Periodo de Rezisto kontraŭ Japanio” (3 majo 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Komunistoj devas ankaŭ doni modelon en lernado; ili estas instruistoj de la popolamasoj ĉiutage, kaj samtempe iliaj lernantoj.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

En la popolamasaj movadoj komunistoj devas esti amikoj de la popolamasoj kaj ne iliaj superuloj, devas esti nelacigeblaj instruistoj kaj ne burokrataj politikistaĉoj.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Komunistoj devas neniam disiĝi de la plimulto de la amasoj, neglektante la plimulton kaj gvidante la avangardan malplimulton aventurisme antaŭenmarŝi en izoliteco; ili nepre devas atenti pri la organizado de intima kunligo inter la progresintaj elementoj kaj la vastaj amasoj. Tio ja estas vidpunkto de zorgo pri la plimulto.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ni komunistoj estas similaj al semoj kaj la popolo estas simila al la grundo. Kien ni iras, tie ni devas kombiniĝi kun la popolanoj, enradikiĝi kaj flori inter ili.

“Pri la Ĉongking-a Intertraktado” (17 oktobro 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

En ĉiu ajn problemo, ni komunistoj nepre devas kombiniĝi kun la amasoj. Se niaj komunistoj sidas en ĉambroj dum la tuta vivo, ne irante en la mondon kaj ne spertante ventojn kaj pluvojn, kiajn bonojn tiaj komunistoj povas porti al la ĉina popolo? Nenian bonon, kaj ni ne bezonas tiajn homojn kiel partianojn. Niaj komunistoj devas iri en la mondon kaj sperti ventojn kaj pluvojn; tio, kion ili eniras, estas la vasta mondo de amasa batalo, kaj tio, kion ili spertas, estas ŝtormoj kaj pluvegoj de amasa batalo.

“Organiziĝu!” (29 novembro 1943), *Elektitaj Verkaj de Mao Zedong*, vol. III.

La avangarda kaj modela rolo de komunistoj estas eksterordinare grava. En la Oka-voja Armeo kaj Nova Kvara Armeo komunistoj devas doni modelon en brava batalado, plenumo de ordonoj, observo de

disciplino, konduko de politika laboro kaj flegado de internaj unueco kaj solidareco.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Komunisto absolute ne devas obstine pensi sin prava aŭ esti impertinenta al aliaj, konsiderante sin bona en ĉio dum la aliajn bonaj en nenio; li absolute ne devas ŝlosi sin en sia malgranda ĉambro, fanfaronadi kaj superrestrumi aliajn.

“Parolado en la Kunveno de Popolaj Reprezentantoj de la Lim-regiono de Ŝenhi, Gansu kaj Ninghia” (21 novembro 1941), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Komunisto devas atente aŭskulti la opiniojn de personoj ekster la Partio kaj lasi ilin paroli. Se ili parolas ion pravan,

ni devas bonvenigi ĝin kaj lerni de iliaj fortaj flankoj. Se ili parolas ion malpravan, ni ankaŭ devas lasi ilin fini la parolon kaj poste fari pacience klarigojn al ili.

“Parolado en la Kunveno de Popolaj Re prezentantoj de la Limregiono de Ŝenhi, Gansu kaj Ninghia” (21 novembro 1941), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Al personoj kiuj faris erarojn en sia laboro, escepte de tiuj, kiuj estas nesaveblaj, komunistoj ne devas preni sintenon de ekskluzivado, sed tiun de persvado, por ke tiuj radikale ŝanĝigu kaj startu denove.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La sinteno de komunistoj al politike postigintaj homoj ne estas ilin malrespekti

aŭ malestimi, sed intimiĝi kaj unuiĝi kun ili, konvinki ilin kaj kuraĝigi ilin iri antaŭen.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito”
(oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

XXIX. KADROJ

Por garantii ke niaj partio kaj ŝtato ne ŝanĝos sian koloron, ni devas ne nur havi korektan linion kaj korektajn politikojn, sed ankaŭ eduki kaj krei milionojn da daŭrigantoj de la afero de proleta revolucio.

La problemo eduki daŭrigantojn de la afero de proleta revolucio estas, en esenco, problemo: ĉu troviĝos posteuloj kiuj povos kontinui la marksism-leninisman revolucionan aferon, komencitan de la maljuna generacio de proletaj revoluciuloj, ĉu estontece la gvido de niaj partio kaj ŝtato restos en la manoj de proletaj revoluciuloj, ĉu niaj idoj povos daŭre marŝi antaŭen laŭ la korekta, marksism-leninisma vojo, aŭ, alivorte, ĉu ni sukcesos

préventi reaperon de Ĥruŝčov-reviziismo en Ĉinio. Unuvorte, ĝi estas problemo trege grava, de vivo kaj morto por nia partio kaj nia ŝtato. Ĝi estas problemo de fundamenta graveco por la afero de proleta revolucio por cent, por mil, cê por dekmil jaroj. Bazante sin sur la ŝanĝoj en Sovetunio, la imperiistaj profetoj metas sian esperon de "paca evoluo" sur la trian aŭ kvaran generacion de la ĉina Partio. Ni devas komplete frakasi tiujn ĉi imperiistajn profetaĵojn. Ni devas turni nian atenton, de niaj plej altaj organizaĵoj ĝis la bazaj, ĉie kaj konstante, al la edukado kaj kreado de daŭrigantoj de la revolucia afero.

Kiajn kvalitojn devas havi daŭrigantoj de la afero de proleta revolucio?

Ili devas esti veraj marksist-leninistoj, sed ne reviziistoj sub la mantelo de marksism-leninismo kiel Ĥruŝčov.

Ili devas esti revoluciuloj kiuj tutkore servas al la plejmulto de la loĝantaro de

Ĉinio kaj la tuta mondo, sed ne devas esti tia, kia estas Ĥruŝčov, kiu servas al la interesoj de areto da membroj de la privilegia burĝa tavolo en sia propra lando kaj al tiuj de imperiistoj kaj reakciuloj en internacia areno.

Ili devas esti proletaj politikistoj kapablaj unuiĝi kaj kunlabori kun la plejmulto. Ili devas ne nur unuiĝi kun tiuj kiuj samopinias kun ili, sed ankaŭ bone scii unuiĝi kun tiuj kiuj malsame opinias, kaj eĉ kun tiuj kiuj antaŭe oponis ilin kaj estas pruvitaj eraraj en praktiko. Sed ili devas esti aparte singardemaj kontraŭ karieristoj kaj konspiristoj, kia estas Ĥruŝčov, kaj preventi ke tiaj malbonaj elementoj uzurpu la gvidon de la Partio kaj la ŝtato de iu ajn nivelo.

Ili devas esti modelaj aplikantoj de la demokratia centralizismo de la Partio, devas ellerni la metodon de gvido bazitan sur la principo "el la amasoj kaj en la amasojn", kaj devas kulturi demokratian

stilon scii aŭskulti bone la amasojn. Ili ne devas esti senraciaj kaj despotaj kiel Ĥruŝčov kaj rompi la demokratian centralizismon de la Partio, fari surprizajn atakojn kontraŭ kamaradoj aŭ agi arbitre kaj diktatore.

Ili devas esti modestaj kaj singardemaj, ne arogantaj nek malpaciencaj. Ili devas esti plenaj de la spirito de memkritiko kaj havi la kuraĝon korekti la erarojn kaj difektojn en sia laboro. Ili neniel devas agi kiel Ĥruŝčov, kiu kovras siajn erarojn kaj beligas siajn mankojn, atribuante al si ĉiujn meritojn kaj imputas ĉiujn erarojn al aliaj.

Daŭrigantoj de la afero de proleta revolucio naskiĝas en amasaj luktoj kaj kreskas hardante sin en grandaj revoluciaj ŝtormoj. Oni devas provi kaj juĝi kadrojn kaj elekti kaj eduki daŭrigantojn en longtempa amasa batalado.

Citita laŭ Pri la Pseŭdokomunismo de Ĥruŝčov kaj Ĝia Historia Leciono por la Mondo.

Niaj partiaj organizoj devas etendiĝi tra la tuta lando, kaj ni devas konscie elbaki dekmilojn da kadroj, kaj havi centojn da unuarangaj ĉefoj de amasoj. Tiuj kadroj kaj ĉefoj devas esti spertaj en marksism-leninismo, havi politikan malproksimvidecon kaj kompetentecon en laboro, esti riĉaj je la spirito de sinofero, kapablaj solvi problemojn memstare, firmaj troviĝante en la malfaciloj, kaj fidele kaj sindone labori por servi al la nacio, la klaso kaj la Partio. Pere de tiuj kadroj kaj ĉefoj, la Partio kunligiĝas kun la membroj kaj amasoj; kaj pere de ilia firma gvidado al la amasoj, la Partio atingas sian celon de faligo de la malamiko. Tiuj kadroj kaj ĉefoj devas esti liberaj de egoismo, individua heroismo, sinmontremo, maldiligenteco, pasiveco kaj aroganta sektismo, kaj ili devas esti sinforĝesaj naciaj kaj klasaj herooj; tiaj estas la kvalitoj

kaj laborstilo, kiujn devas posedi la membroj, kadroj kaj ĉefoj de nia partio.

“Lukti por Gajni la Amasojn en Milionoĵ por la Kontraŭjapana Nacia Unuĉfronto” (7 majo 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Post la difino de la politika linio, kadroj ja estas decida faktoro. Tial, laŭplane kulturi grandajn nombrojn da novaj kadroj estas nia batala tasko.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

La politiko de la Komunista Partio pri kadroj devas preni tion kiel sian kriterion, ĉu kadro povas firme sekvi la linion de la Partio, observi la partian disciplinon, strikte ligiĝi kun la amasoj, havi memstaran laborkapablon, labori aktive kaj tutkore,

kaj ne ĉasi profitojn por si mem. Tio ja estas linio "enoficigi nur laŭ personaj kvalitoj".

"La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito" (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Estas necese persisti pri la sistemo de la partopreno de kadroj en kolektiva produkta laboro. La kadroj de niaj partio kaj ŝtato estas ordinaraj laboruloj kaj ne grandsinjoroj rajdantaj sur la nuko de la popolo. Partoprenante kolektivon produktan laboron, ili tenas plej vastan, konstantan kaj intiman ligon kun la laboranta popolo. Tio estas granda afero de fundamenta graveco por socialisma sistemo; ĝi helpas venki burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismom.

Citita laŭ *Pri la Pseŭdokomunismo de Ĥruŝĉov kaj Ĝia Historia Leciono por la Mondo.*

Ni devas scii bone juĝi kadrojn. Juĝante kadron, ni devas konsideri lian agadon ne nur en mallonga periodo aŭ en unu afero, sed ankaŭ lian tutan vivon kaj lian tutan laboron. Tio estas la ĉefa metodo por juĝi kadrojn.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ni devas scii bone uzi kadrojn. La respondecoj de la gvidantoj, por diri resume, estas ĉefe nur du: doni ideojn kaj uzi kadrojn. Ĉiuj planoj, rezolucioj, ordonoj kaj direktivoj k. s. apartenas al la kategorio “doni ideojn”. Por efektivigi tiujn ideojn, estas necese unuigi kaj kuraĝigi la kadrojn al agado; tio apartenas al la kategorio “uzi kadrojn”.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Ni devas scii bone amzorgi kadrojn. Jen estas metodoj por tion fari:

Unue, gvidi ilin. Tio estas lasi ilin havi liberajn manojn en sia laboro, por ke ili havu kuraĝon preni sur sin respondecon; kaj samtempe doni al ili instrukciojn en ĝustaj momentoj, por ke ili povu disvolvi sian iniciatemon sub la gvido de la politika linio de la Partio.

Due, levi ilian nivelon. Tio estas eduki ilin provizante ilin per okazoj de lernado, por ke ili pliigu sian teoriant komprenon kaj laborkapablon.

Trie, kontroli iliajn laborojn kaj helpi ilin resumi siajn spertojn, disvolvi siajn atingajojn kaj korekti siajn erarojn. Asigni laborojn sen kontrolo kaj priatenti nur post kiam seriozaj eraroj estas jam faritaj, ne estas rimedo por bone prizorgi kadrojn.

Kvare, al kadroj kiuj faris erarojn, ĝenerale, oni devas adopti la metodon

de persvado por helpi ilin korekti la erarojn. La metodo de batalo devas esti adoptita nur kontraŭ tiuj, kiuj faras seriozajn erarojn, kaj, cetere rifuzas akcepti gvidadon. Ĉi tie pacienco estas necesa; estas erare facile etikedi aliajn per "oportunistoj" aŭ facile preni la metodon "ekfari batalon".

Kvine, helpi ilin en iliaj malfaciloj. Kiam kadroj malsanas aŭ havas malfacilojn en sia vivo aŭ familio, estas necese laŭeble doni al ili helpon el la tuta koro.

Tiuj estas metodoj por amzorgi kadrojn.

"La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito"
(oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Muŝ Zedong*, vol. II.

Gvidskeleto, kiu estas vere en plena unueco kaj ligiĝas kun la amasoj, devas formiĝi nur laŭgrade en la procezo de amasa batalo, sed ne fore de ĝi. En la procezo

de granda batalo, la konsisto de la gvidskeleto, en plej multaj okazoj, ne devas nek povas resti tute senŝanĝa en la komenca, meza kaj fina etapoj; estas necese konstante promocii aktivulojn, kiuj aperas dum la batalo, por anstataŭigi tiujn malnovajn membrojn de la gvidskeleto, kiuj montriĝas malsuperaj en komparo aŭ estas degenerintaj.

“Kelkaj Problemoj pri Metodoj de Gvidado” (1 junio 1943),
Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong,
vol. III.

Se nia partio ne havas grandan nombron da novaj kadroj unuanime kunlaborantaj kun la malnovaj kadroj, nia afero haltos mezvoje. Tial ĉiuj malnovaj kadroj devas bonvenigi kaj prizorgi la novajn kadrojn kun plej granda entuziasmo. Vere, la novaj kadroj havas siajn mankojn. Ili partoprenis en la revolucio nur antaŭ nelonge kaj ne havas multan sperton,

kaj neeviteble, iuj el ili portas kun si ankoraŭ voston de la malutila ideologio de la malnova socio, t. e. restaĵojn de la ideologio de etburĝa individuismo. Sed tiuj mankoj povas esti iom post iom forigitaj per edukado kaj hardado en la revolucio. Ilia fortaĵo, kiel Stalin diris, estas tio ke ili havas akran sentemon por novaj aferoj kaj estas tial entuziasmaj kaj aktivaj en alta grado — ĝuste tiuj kvalitoj mankas al iuj malnovaj kadroj. Kadroj, novaj kaj malnovaj, devas respekti unuj la aliajn, lerni unuj de la aliaj kaj plenigi siajn proprajn mankojn per lernado de la fortaĵo de la aliaj, por unuigi sin kiel unu homo en la komuna afero kaj gardi sin kontraŭ sektismaj tendencoj.

“Ĝustigo de la Partia Laborstilo”
(1 februaro 1942), *Elekciitaj Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. III.

Ni devas prizorgi ne nur la partiajn kadrojn, sed ankaŭ la nepartiajn. Ekster

la Partio ekzistas multaj kapabluloj, kiujn la Komunista Partio ne devas ignori. Ĉiu komunisto devas sin liberigi de apartiĝemo kaj aroganteco kaj scipovi kunlabori kun nepartiaj kadroj, sincere helpi ilin, trakti ilin varme kaj kamaradece kaj organizi ilian aktivecon en la grandan aferon de rezisto kontraŭ Japanio kaj konstruado de la lando.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito”
(oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

XXX. JUNULARO

La mondo estas via kaj ankaŭ nia, tamen, en la finanalizo, ĝi estas via. Vi junuloj, plenaj de vivfreŝeco, estas en la tempo de florado, kvazaŭ la suno je la oka aŭ naŭa horo en la mateno. La espero estas metita sur vin.

.....

La mondo apartenas al vi. La estonteco de Ĉinio apartenas al vi.

Parolo en renkontiĝo kun ĉinaj studentoj kaj trejnatoj en Moskvo (17 novembro 1957).

Ni devas komprenigi al ĉiuj niaj junuloj, ke nia lando estas ankoraŭ tre malriĉa kaj ne estas eble radikale ŝanĝi tiun ĉi staton dum mallonga tempo, kaj ke nur

per unuigita luktado dum kelkaj jardekoj de nia juna generacio kaj la tuta popolo laborantaj per siaj propraj manoj povos esti kreita prospera kaj potenca lando. La starigo de socialisma sistemo malfermis al ni la vojon kondukantan al la ideala stato de la estonteco, kies efektivigo tamen dependas ankoraŭ de nia peniga kaj diligenta laborado.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

Pro manko de sperto en politiko kaj socia vivo, ne malmulte da gejunuloj ne bone scias fari komparon inter la malnova Ĉinio kaj la nova, estas ne facile por ili plene kompreni kiajn malfacilojn la popolo de nia lando travivis en la luktado por sin liberigi de la subpremo de la imperiismo kaj la kuomintangaj reakciuloj kaj kia longtempa peniga laboro estas bezonata por starigi feliĉan socialisman socion.

Tial politika edukado en viveca kaj efika maniero devas esti konstante farata inter la popolamasoj. Ni devas ĉiam laŭvere klarigi al ili la malfacilojn okazintajn kaj diskuti kun ili pri la rimedoj kiel solvi tiujn malfacilojn.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

La junuloj estas la plej aktiva kaj vivplena forto en socio. Ili estas la plej avidaj al lernado kaj havas plej malmulte da konservativa penso, des pli tiel estas en la socialisma epoko. Ni esperas, ke kunlaborante kun la organizoj de la Junulara Ligo, diverslokaj partiaj organizoj atente esploros la demandon kiel elvolvi precipe la energion de niaj junuloj. La partiaj organizoj ne devas rigardi ilin ordinaraĵoj kiel ĉiuj aliaj kaj ignori iliajn specialajn karakterizojn. Kompreneble, la junuloj devas lerni de la maljunuloj kaj plen-

aĝuloj kaj klopodi por fari kiel eble kun ilia konsento ĉiuspeciajn utilajn aktivadojn.

Enkonduka noto al "Junula Sturma Brigado de la Agrikultura Produkta Kooperativo Nr. 9 en Hingping-subdistrikto, Ĝongŝan-gubernio" (1955), *Socialisma Alt-tajdo en la Ĉina Kamparo*, vol. III.

Kion oni prenu kiel kriterion por juĝi, ĉu iu junulo estas revolucia aŭ ne? Per kio oni lin distingu? La ununura distingilo estas, ĉu li volas aŭ ne volas kaj praktikas aŭ ne praktikas kombiniĝon kun la vastaj laboristaj kaj kamparanaj amasoj. Kiu volas kaj praktikas kombiniĝon kun la laboristoj kaj kamparanoj, estas revolucia, alie, estas nerevolucia aŭ kontraŭrevolucia. Se hodiaŭ li kombinas sin kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, do hodiaŭ li estas revolucia; sed se morgaŭ li ĉesos tion fari aŭ male subpremos la ordinarajn popol-

anojn, tiam li estos nerevolucia aŭ kontraŭrevolucia.

“La Direkto de la Junulara Movado” (4 majo 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Antaŭ ol sin ĵeti plene en la revoluciajn luktojn de la popolamasoj aŭ decidi definitive servi la interesojn de la popolamasoj kaj kombiniĝi kun ili, la intelektuloj ofte havas subjektivismajn kaj individuismajn tendencojn kaj vana estas ilia pensado kaj ŝanceliĝema estas ilia agado. Sekve, malgraŭ ke la vastaj amasoj de revoluciaj intelektuloj en Ĉinio povas funkcii kiel avangardo kaj ponto al la popolamasoj, ne ĉiuj intelektuloj povos revolucii ĝis la fino. Parto el ili forlasos la revoluciajn vicojn en krizaj momentoj kaj alprenos pasivan sintenon, dum kelkaj eĉ fariĝos malamikoj de la revolucio. Tiuj difektoj de la intelektuloj povas esti venkitaj nur

en ilia longtempa partopreno en popolamasa luktado.

“La Ĉina Revolucio kaj la Komunista Partio de Ĉinio” (decembro 1939), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Krom daŭre agi en kunordigado kun la Partio en ĝia centra tasko, la Junulara Ligo devas ankaŭ fari sian propran laboron konvenan al la specialaj karakterizoj de junuloj. Nova Ĉinio devas konsideri por siaj junuloj kaj zorgi pri la kresko de la juna generacio. Junuloj devas lerni kaj labori, sed ili estas en la aĝo de korpa kresko. Tial, plena atento devas esti donita kaj al iliaj laboro kaj lerno kaj al iliaj distriĝo, sporto kaj ripozo.

Direktivo je la akcepto por la Prezidantaro de la Dua Tutlanda Kongreso de la Junulara Ligo (30 junio 1953).

XXXI. VIRINARO

Viroj en Ĉinio ordinare estas submetitaj al la dominado de tri sistemigitaj aŭtoritatoj [politika, klana kaj religia — *Red.*]. . . . Rilate al virinoj, krom la suprediritaj tri aŭtoritatoj, ili estas submetitaj ankaŭ al la dominado de la viro (la aŭtoritato de la edzo). Tiuj kvar aŭtoritatoj — politika, klana, religia kaj edza — enkorpigas la tuton de feŭd-patriarkaj ideologio kaj sistemo, kaj estas kvar dikaj ŝnuregoj ligantaj la ĉinan popolon, precepte la kamparanojn. Kiel la kamparanoj renversis la politikan aŭtoritaton de la bienuloj en kamparo, tio jam estas skribita supre. La politika aŭtoritato de la bienuloj estas la spino de ĉiuj ceteraj aŭtoritatoj.

Ĉar ĝi estas jam renversita, sekve la klana aŭtoritato, la religia aŭtoritato kaj la edza aŭtoritato ĉiuj komencis ŝanceliĝi. ... Koncerne al la edza aŭtoritato, ĝi estas dekomence malpliforta inter la malriĉ-kampanoj, ĉar ekonomie ties virinoj ne povas ne partopreni en laboro pli multe ol la virinoj de la pli riĉaj klasoj, tial ili havas pli da rajto en parolo kaj decido pri familiaj aferoj. En lastaj jaroj, kun pliiĝo de la bankroto de la kampara ekonomio, la bazaj kondiĉoj por la vira dominado super la virinoj jam detruigis. Kun la leviĝo de la kamparana movado en la lasta tempo, la virinoj en multaj lokoj jam organizis kamparan virinan asocion; venis jam la ŝanco por la virinoj ke ili povas levi sian kapon, kaj la edza aŭtoritato ŝanceliĝas tagon post tago. Unuvorte, kun la kreskado de la kam-

parana potenco, ŝanceliĝas ĉiuj feŭd-patriarkaj ideologio kaj sistemo.

“Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan” (marto 1927), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Unuiĝu kaj partoprenu en produktado kaj politika aktivado por plibonigi la ekonomian kaj politikan staton de virinoj.

Surskribo por la gazeto *Virinoj de Nova Ĉinio*, la unua numero de la nomata gazeto, 20 julio 1949.

Protektu la interesojn de la junuloj, virinoj kaj infanoj, donu helpojn al la malriĉaj junuloj kiuj ne havas ŝancon viziti lernejon, kaj organizu la junulojn kaj virinojn por ke ili partoprenu en egala pozicio diversajn laborojn kiuj estas utilaj al la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj socia progresado, efektivigu liberecon de geedziĝo kaj egalecon inter viroj kaj virinoj,

kaj donu utilan instruon al junuloj kaj infanoj. . . .

“Pri Koalicia Registaro” (24 aprilo 1945), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Organizite alĝustigi la uzadon de laborforto kaj movi virinojn partopreni en kampa laboro estas la plej fundamenta tasko en nia agrikultura produktado.

“Nia Ekonomia Politiko” (23 januaro 1934), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Por konstrui grandan socialisman socion, mobilizi la vastajn amasojn de virinoj partopreni en produkta aktivado havas ekstreme gravan signifon. Viroj kaj virinoj devas ricevi egalan pagon por egala laboro en produktado. La vera egaleco inter la viroj kaj virinoj povas esti realigita

nur en la procezo de la socialisma transformo de la tuta socio.

Enkonduka noto al "Virinoj Suriris la Laboran Fronton" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo*, vol. I.

Post la kooperigo multaj kooperativoj trovas, ke mankas al ili laborforto, kaj estas necese mobilizi la vastajn amasojn de virinoj, kiuj ne laboris en la kampoj antaŭe, partopreni en la labora fronto. . . . La ĉina virinaro estas granda provizo de homa forto. Tiu ĉi provizo devas esti ĉerpata en la klopodo por konstrui grandan socialisman landon.

Enkonduka noto al "Mobilizante la Virinojn Partopreni en Produktado, Oni Solvis la Malfacilon de la Manko de Laborforto" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo*, vol. II.

Ebligu ĉiun virinon, kiu povas labori, senescepte partopreni en la labora fronto sub la principo de egala pago por egala laboro. Tiu ĉi postulo devas esti efektivigita en kiel eble plej mallonga tempo.

Enkonduka noto al "Projekto de la Demokratia Virina Federacio en Hingtaj-gubernio por Disvolvi Virinan Laboron en la Agrikultura Kooperiga Movado" (1955), *Socialisma Alttajdo en la Ĉina Kamparo*, vol. I.

XXXII. KULTURO KAJ ARTO

En la hodiaŭa mondo, ĉiu kulturo aŭ literaturo kaj arto apartenas al certa klaso kaj sekvas certan politikan linion. Fakte ne ekzistas tia afero kiaj arto por arto, arto staranta super klasoj, arto paralela kun aŭ sendependa de politiko. La proletaj literaturo kaj arto estas parto de la tuta revolucia afero de la proletaro, aŭ laŭ la vortoj de Lenin, “radeto kaj ŝraŭbeto” en la tuta revolucia maŝino.

“Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an” (majo 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Revolucia kulturo estas potenca revolucia armilo por la popolamasoj. Antaŭ la

revolucio, revolucia kulturo estas ideologia preparo al la revolucio; kaj dum la revolucio ĝi fariĝas unu necesa kaj grava batalfronto el la ĝenerala batalfronto de la revolucio.

“Pri Nova Demokratio” (januaro 1940), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

“Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an” (majo 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Niaj literaturaj kaj artaj laborantoj nepre devas plenumi tiun ĉi taskon, ili nepre devas ŝanĝi sian starpunkton, iom post

iom transigi ĝin al la flanko de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, al la flanko de la proletaro, en la procezo de enprofundiĝo en la amasojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, de enprofundiĝo en la aktualajn batalojn, kaj de studado de marksismo kaj la socio. Nur tiamaniere ni povos havi literaturon kaj arton vere por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj vere proletajn.

“Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an” (majo 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Nia celo estas por fari literaturon kaj arton konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino, fari ilin potenca batalilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon, kaj helpi la

popolon batali kontraŭ la malamiko unu-
kore kaj unuanime.

“Paroladoj ĉe la Literatura kaj
Arta Kunsido en Jan-an” (majo
1942), *Elektitaj Verkoj de Maŝ
Zedong*, vol. III.

Estas du kriterioj en literatura kaj arta
kritikado, unu politika kaj la alia arta. . . .

Estas kaj kriterio politika kaj kriterio
arta, kiel do ili rilatiĝas? Politiko ne
egalas al arto, nek ĝenerala mondkoncepto
al la metodo de arta kreado kaj kritikado.
Ni neas ne nur la ekziston de abstrakta kaj
absolute neŝanĝebla kriterio politika, sed
ankaŭ la ekziston de abstrakta kaj absolute
neŝanĝebla kriterio arta, ĉar ĉiu klaso en
ĉiu klasa socio havas siajn proprajn poli-
tikan kaj artan kriteriojn. Sed ĉiu ajn
klaso en ĉiu ajn klasa socio ĉiam metas
la politikan kriterion sur la unuan lokon
kaj la artan sur la duan. . . . Kaj nia
postulo estas unueco de politiko kaj arto,

unueco de enhavo kaj formo, unueco de revolucia politika enhavo kaj laŭeble plej perfekta arta formo. Artajo sen arta kvalito estas senforta, kiel ajn progresema ĝi estas politike. Tial ni oponas kaj al artaj verkoj kun erara politika vidpunkto kaj al la tendenco de t. n. "afiŝa kaj slogana stilo" nur kun ĝusta politika vidpunkto sed sen arta forto. Ni devas konduki batalon sur du frontoj en la problemo de literaturo kaj arto.

"Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an" (majo 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

La orientilo "kune floru cent floroj kaj voĉojn donu cent skoloj" estas tiu por akceli la disvolviĝon de la artoj kaj la progreson de scienco kaj estas tiu por akceli la prosperadon de socialisma kulturo en nia lando. Malsamaj formoj kaj stiloj en arto povas libere disvolviĝi kaj malsamaj

skoloj en scienco povas libere interargu-
menti. Ni opinias, ke deviga disvastigo
de iu stilo aŭ iu skolo kaj malpermeso
de alia stilo aŭ alia skolo per administraj
rimedoj estas malutilaj al la disvolviĝo de
arto kaj scienco. Problemoj de praveco
kaj malpraveco en la artoj kaj sciencoj
devas esti solvataj per libera diskutado
en artaj kaj sciencaj rondoj kaj pere de
praktikado en la artoj kaj sciencoj anstataŭ
per simpla metodo.

*Pri la Ĝusta Traktado de Kon-
traŭdiroj Interne de la Popolo* (27
februaro 1957).

Armeo sen kulturo estas malsaĝa armeo,
kaj malsaĝa armeo ne povas venki la
malamikon.

“La Unuecfonto en Kultura
Laboro” (30 oktobro 1944), *Elek-
titaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol.
III.

XXXIII. LERNADO

Por transformi postrestintan agrikulturan Ĉinion en progresintan industriigitan Ĉinion, la laboro antaŭ ni estas tre peniga kaj nia sperto estas ege malsufiĉa. Tial, ni devas esti lertaj en lernado.

Inaŭgura Parolado ĉe la Oka Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio (15 septembro 1956).

La cirkonstancoj estas senĉese ŝanĝiĝantaj. Por adapti nian penson al la novaj cirkonstancoj, necesas lerni. Eĉ tiuj, kiuj relative bone konas marksismon kaj havas relative firman proletan pozicion, ankaŭ

devas plu lerni, akcepti novajn aferojn kaj studi novajn problemojn.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Ni povas ellerni kion ni ne komprenis antaŭe. Ni bone kapablas ne nur detrui la malnovan mondon, sed ankaŭ konstrui la novan.

“Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio” (5 marto 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

Estas du malsamaj sintenadoj en lernado. Unu estas dogmisma sintenado: transpreni ĉion sen konsidero, ĉu ĝi taŭgas aŭ ne al la kondiĉoj de nia lando. Tio ne estas bona sintenado. La alia sintenado estas uzi niajn cerbojn dum lernado kaj lerni tiujn kiuj taŭgas al la kondiĉoj de nia lando, t. e., sorbi la al ni utilan sperton.

Tiu ĉi estas la sintenado kiun ni devas alpreni.

Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo (27 februaro 1957).

La teorio de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin estas teorio universale aplikbla. Oni ne devas rigardi ĝin kiel dogmon, sed orientilon de agado. Oni ne devas lerni nur terminojn kaj frazojn de marksism-leninismo, sed devas studi ĝin kiel revolucionan sciencon. Oni devas ne nur kompreni la konkludojn de la ĝeneralaj leĝoj ricevitaĵoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin en ilia vasta studado de reala vivo kaj revoluciaj spertoj, sed ankaŭ studi iliajn starpunktojn kaj metodojn en ekzamenado kaj solvado de problemoj.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŝ Zedong*, vol. II.

Se oni havus pravan teorion, kaj nur babilaĉus pri ĝi, ĝin flanken metus kaj ne praktikus, tiam la teorio, kvankam bona, estus tute sensignifa.

“Pri Praktiko” (julio 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Koncerne al marksisma teorio, estas necese majstre posedi ĝin kaj apliki ĝin; la celo de posedo kuŝas ekskluzive en aplikoj. Se vi povas klarigi unu aŭ du praktikajn problemojn, aplikante la vidpunkton de marksism-leninismo, vi estos laŭdata kaj kalkulata kiel havanta iaajn atingojn. Ju pli multaj problemoj estas de vi klarigitaj kaj ju pli multamplekse kaj profunde vi tion faras, des pli grandaj estos viaj atingoj.

“Ĝustigo de la Partia Laborstilo” (1 februaro 1942), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. III.

Kiamaniere marksism-leninisma teorio devas esti ligata kun la praktiko de la

ĉina revolucio? Por paroli populare, tio estas “pafi la sagon al iu celo”. La rilato inter marksism-leninismo kaj la ĉina revolucio estas ĝuste tiu inter sago kaj celo. Iuj kamaradoj, tamen, “pafas sen celo”, pafante al nenio celata, kaj tiaj homoj facile fuŝas la revolucion.

“Ĝustigo de la Partia Laborstilo”
(1 februaro 1942), *Elektitaj Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. III.

Homoj havantaj spertojn en laboro devas okupiĝi pri studo de teorio kaj legi serioze librojn; nur tiam ili povos sistemigi kaj sintezi siajn spertojn kaj levi ilin al la nivelo de teorio, nur tiam ili ne erare prenos sian sperton akiritan en limigita parto por universala vero kaj ne faros empirismajn erarojn.

“Ĝustigo de la Partia Laborstilo”
(1 februaro 1942), *Elektitaj Verkoj*
de Maŭ Zedong, vol. III.

Librolegado estas lerno, ankaŭ aplikado estas lerno kaj eĉ pli grava speco de lerno. Nia ĉefa metodo estas lerni militi en milito. Ankaŭ persono, kiu ne trovis ŝancon viziti lernejon, povas lerni militi, tio estas, lerni en milito. Revolucia milito estas afero de popolamasoj; oni ofte ne faras ĝin post ellerno, sed lernas post ekfaro, ĉar faro per si mem estas lerno.

“Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio” (decembro 1936), *Elektaĵoj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Sin trovas interspaco inter la “ordinara civilulo” kaj la militisto, sed ĝi ne estas Granda Muro, kaj tiu ĉi interspaco povas esti rapide forigita, kaj la metodo por forigi ĝin estas partopreni en revolucio kaj en milito. Diri ke nefacilaj estas lernado kaj aplikado, signifas ke nefacile estas ellerni ĝisfunde kaj aplikati lerte. Diri ke ordinaraĵoj povas rapide fariĝi mi-

litistoj, signifas ke estas nemalfacile transiri la sojlon. Por kunmeti la du asertojn, ni povas citi la ĉinan malnovan popoldiron: "Nenio en la mondo estas malfacila por tiu kiu metas sur ĝin sian menson." Transiti la sojlon ne estas malfacile, ankaŭ perfektigi estas eble, kondiĉe nur ke oni metu sian menson sur la taskon kaj bone lernu.

"Strategiaj Problemoj en la Revolucia Milito de Ĉinio" (decembro 1936), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

Ni devas lerni de ĉiuj spertuloj (kiuj ajn ili estas) ekonomian laboron. Prenu ilin kiel niajn instruistojn kaj lernu de ili respekte kaj konsciencie. Se ni ne scias, konfesu nescion kaj ne pretendu scion.

"Pri Popol-demokratia Diktaturo" (30 junio 1949), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. IV.

La problemo de scio estas problemo de scienco, kaj toleras neniom da malsincereco aŭ malmodesteco; male, nepre necesa estas ĝuste la kontraŭo — sinteno de sincereco kaj modesteco.

“Pri Praktiko” (julio 1937), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. I.

La malamiko de studo estas memkontento. Por vere ion ellerni, ni devas unue liberigi nin de memkontento. Por ni mem ni devas esti “nesatigeblaj en lernado”, kaj por aliaj ni devas esti “senlacaĵ en instruado” — jen la sinteno, kiun ni devas alpreni.

“La Rolo de la Komunista Partio de Ĉinio en la Nacia Milito” (oktobro 1938), *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, vol. II.

Iuj, leginte kelkajn librojn pri marksismo, opinias sin jam eruditoj. Sed efektive ili ne asimilis la legitaĵon, ne enradikis


ĝin en sia kapo, ne scipovas ĝin apliki, kaj iliaj klassentoj restas malnovaj. Aliaj montriĝas tre malmolestaj. Leginte nur kelkajn frazojn, ili jam rigardas sin tre altaj kaj tenas la nazon supren ĝis la ĉielo. Tamen, kiam okazas ŝtormo, ilia pozicio fariĝas tute malsama ol tiu de la laboristoj kaj la plejmulto de la laborantaj kamparanoj: la unua ŝanceliĝas kaj ambiguiĝas, dum la dua restas firma kaj klara.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).

Oni devas lerni marksismon ne nur de libroj, sed ĉefe tra la klasbatalo, laborpraktiko kaj kontaktado kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj; nur tiamaniere oni povas vere ĝin asimili. Se niaj intelektuloj legas iujn librojn pri marksismo kaj akiras ian komprenon pri ĝi en sia kontaktado kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj kaj en la praktiko de sia laboro,

ni do ĉiuj havas komunan lingvon, ne nur rilate al patriotismo kaj socialisma sistemo, sed ankaŭ al komunisma mondkoncepto. Tiel ni ĉiuj plenumos multe pli bone niajn laborojn.

Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro (12 marto 1957).



毛主席语录

*

外文出版社出版(北京)

1967年袖珍本第一版

编号(世)1050—564

00077

1—Es—734Pc

